



Cao Yu

Fulmotondro

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Tradukita de Liu Changsheng

1997 Pekino

e-Librigita de ELERNO

oktobro 2006

PERSONOJ

Zhou Puyuan prezidanto de karbokompanio, 55-jara.

Zhou Fanyi edzino de Zhou Puyuan, 35-jara.

Zhou Ping filo de Zhou Puyuan kaj Lu Shiping, 28-jara.

Zhou Chong filo de Zhou Puyuan kaj Zhou Fanyi, 17-ara.

Lu Gui servisto en la familio de Zhou, 48-jara.

Lu Shiping servistino en lernejo, edzino de Lu Gui, 47-jara.

Lu Dahai filo de Lu Shiping kaj Zhou Puyuan, karboministo, 27-jara.

Lu Sifeng servistino en la familio Zhou, filino de Lu Gui kaj Lu Shiping,
18-jara

Servistoj A, B...

Maljuna servisto

TEMPO KAJ LOKO

La unua akto en la salono de la familio Zhou, en varma somera mateno.

La dua akto en la sama loko, posttagmeze de la sama tago.

La tria akto en la malgranda interna ĉambro de la familio Lu, je la 10-a horo
vespere de la sama tago.

La kvara akto en la sama loko de la unua akto, post la noktomezo de la sama
tago.

UNUA AKTO

En somera mateno, en la salono de la familio Zhou. La pordo maldekstra kondukas al manĝejo kaj la dekstra al kabineto. La meza pordo estas malfermita. Ĝia faden-gaza ŝirmilo ebligas klaran vidon al ĝardeno, kie ombras arboj kaj ĉirpas cikadoj.

Dekstre en la salono kontraŭ la muro staras ŝranko, kovrita per flava tuko, sur kiu estas nombro da luksaĵetoj, inter kiuj okulfrapas malnova foto. Apud ĝi estas kameno kun horloĝo sur sia breto kaj supre sur la muro pandas olepenetraĵo. Antaŭ la kameno esters du foteloj. Maldekstre de la meza pordo staras vitroŝranko plena de antikvaĵoj. Tabureto staras antaŭ ĝi. Ĉe la maldekstra angulo estas kanapo kun kelke da dikaj brokataj kusenoj. Sur la tableto antaŭ la kanapo kuŝas cigaredujo. Iom dekstre de la centro de la scenejo staras du malgrandaj sofoj kaj ronda tablo. Sur la tablo estas cigarujo kaj ventumilo.

La kurtenoj estas en antikva gusto, la mebloj — pure brilaj.

Estas sufoke varme. La sensuna ĉielo kovriĝas de plumbaj nuboj. Ŝajne estos pluvego.

Leviĝas la kurteno. Lu Sifeng, staranta ĉe la tablo kontraŭ la meza muro kun dorso al la spektantaro, filtras drogherban dekoktaĵon kaj viŝas ŝviton de sur sia vizaĝo foje refoje. Lu Gui, sia patro, puragas la arĝentan cigarujojn de la tabteto antaŭ la kanapo.

Lu Sifeng estas sana, 18-jara knabino kun rozaj vangoj kaj bone kreskinta staturato kaj larĝaj blankaj manoj. Vestita per silkaj ĉemizo kaj pantalone kaj paro da malnovetaj ŝuoj, ŝi aspektas pura kaj bonorda. Ŝi estas vigla, parolas senafekte, malkaŝeme kaj diskrete. La brilaj okuloj kaj perlaĵ dentoj plibeligis ŝin. La sufoka varmo ŝvitigas ŝin, tiel ke ŝi foje refoje viŝas sian vizaĝon per naztuko. Ŝi estas ridetema, evidente, konscias pri sia beleco.

Ŝia patro, Lu Gui, 48-jara, estas viro graseta, senenergia kun ŝvelantaj palpebroj kaj malstreĉitaj lipoj. Samkiel aliaj servistoj en riĉaj familioj, li estas sprita kaj ĝentila. Li estas ĝibeta, kio aspektigas lin tenanta la pozon por diri “Jes” al la mastro en ajna mommto. Li ĉiam avide subrigardas. Ĉi-momente li purigas la arĝentan cigarujojn per viŝtuko, kaj ĉe liaj piedoj troviĝas paro daflavaj ŝuoj, kiujn li ĵus purigis. Jen kaj jen li viŝas sian ŝvitantan vizaĝon per maniko.

Lu Gui: Sifeng!

Lu Sifeng ŝajngigas sin neaŭdinta kaj daŭre filtras la dekoktaĵon.

Lu Gui: Sifeng!

Lu Sifeng (*ĵetas rigardon al sia patro*): Ho, varmege! (*Ŝi iras dekstren al la ŝranko, prenas palmfolian ventumilon kaj ventumas per ĝi.*)

Lu Gui (*ĉesigas la laboron kaj rigardas ŝin*): Sifeng, ĉu vi ne aŭdis?

Lu Sifeng (indiferente): Kion vi volas, patro?

Lu Gui: Mi demandas, ĉu vi aŭdis mian diron?

Lu Sifeng: Jes, mi aŭdis ĉiujn viajn vortojn.

Lu Gui (*ĉiam tiel traktata de sia filino, li povas fari nenion krom insulto*): Kiel malobeema filino!

Lu Sifeng (*returnas sin al sia patro*): Vi tro multe babilis! (*Ventumante al si*) Ho, tiel sufoka vetero plejeble aŭguras pluvon. (*Subite*) Ĉu vi ciris la ŝuojn por la sinjoro? (*Iras al Lu Gui, prenas unu el la ŝuoj kaj rigardas senatente.*) Ĉu tio estas via laboro? Ho, kiel malatente vi faris! Atendu la mastron, kaj jen vi havas!

Lu Gui (*reprenas la ŝuon*): Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon! Aŭskultu, Sifeng, mi diras al vi ankoraŭfoje: Neforgesu montri ĉiujn viajn novajn vestojn al via patrino, kiam vi vidos ŝin.

Lu Sifeng (*malpacience*): Jes.

Lu Gui: Lasu ŝin kompari, kiu estas malproksimvida — ŝi aŭ mi?

Lu Sifeng (*malestime*): Sendube, vi!

Lu Gui: Kaj plie, ne forgesu diri al ŝi, ke vi havas ĉi tie bonan manĝon kaj nur tage servas al la sinjorino kaj junaj mastroj. Tamen aŭskultu vian panjon, ke vi tranoktu hejme.

Lu Sifeng: Tio ja estas nenecesa. La panjo certe demandos pri tio.

Lu Gui (*memkontente*): Kaj iom pri mono. (*Ridas avare.*) Vi certe havas sumon da mono.

Lu Sifeng: Mono?

Lu Gui: Jes, la dujara salajro, trinkmono kaj (*ion aludante*) la ekstraj malgrandaj monsumoj foje refoje donitaj de ili...

Lu Sifeng (*rompas lin abrupte*): Jes, tamen vi jam forprenis de mi tiujn monsumojn kaj ĉiujn vi fordrinkis kaj perdis en hazardludo.

Lu Gui: Nu, vi denove malpacientiĝi. Ne, ne tiel. Mi ne postulas monon. Mi nur volas scii, (*mallaŭte*) ĉu li ofte ŝovas monon al vi en la manon.

Lu Sifeng (*surprizite*): Li? Kiu?

Lu Gui (*malkaŝe*): Sinjorido Zhou Ping.

- Lu Sifeng** (*ruĝiĝante*): Kiu diris, ke li donacas al mi monon? Patro, ĉu vi freneziĝis de malriĉeco? Ĉesigu tuj vian deliraĵon!
- Lu Gui:** Bone, bone. Li tion ne faris. Sed vi certe ŝparis iom da mono en la lastaj du jaroj. Estu trankvila, mi ne postulas de vi monon. Mi volas nur, ke vi prezentu la monon al via patrino, kiam ŝi venos. Tio certe larĝigos siajn vidkampojn.
- Lu Sifeng:** Hm, la panjo estas tute diferenca de vi. Pro mono vi povas fari ĉion. (*Ŝi returnas sin al la ŝranko por filtri la dekoktetaĵon.*)
- Lu Gui** (*sidiĝas sur la kanapo kun afektita rido*): Havi monon aŭ ne, tio tute ne gravas. Pensu, kie nun vi estas sen mia helpo? Kiel vi povus ĝui bongustajn manĝaĵojn kaj vesti vin per silkaĵo en tia varmega tago, se vi nur obeus vian patrinon sen veni ĉi tien por servi al la familio Zhou en ĉi tiuj dujaroj?
- Lu Sifeng:** Mia panjo ja esters honestulo. Ŝi esters klerigita kaj ne volas lasi sian filinon al alies dispono.
- Lu Gui:** Fi al ŝia honesteco! Ĝuste kopio de via patrino. Kies sinjoridino vi estas? Hm, filino de servisto kaj tamen timas perdi sian dignon pro la servado.
- Lu Sifeng** (*abomene*): Patro, rigardu vian vizaĝon, kiu plenas de makuloj de ciro. Plipurigu la ŝuojn!
- Lu Gui:** Ĉesu! Ne lernu de via patrino, kiu insistas pri sia digneco. Jen ŝi veturis 400 kilometrojn kaj tie servas en knabina lernejo nur por 8 juanoj ĉiumonate sub la kondiĉo reveni hejmen unufoje en du jaroj. Kia digno tio estas? Ĉu tio estas ŝia klereco? Nenio el ŝi eliros!
- Lu Sifeng** (*sin retenante*): Rezervu viajn vortojn por la hejmo. Sciu, ĉi tie estas la domo de Zhou!
- Lu Gui:** Kiu rajtas malpermesi al mi interparoli kun mia filino? Nu, aŭskultu, via patrino...
- Lu Sifeng** (*subite*): Aŭskultu min. Mi devas diri al vi, ke nia patrino tre malofte revenas hejmen. Ĉi-foje, ŝi venos nur por viziti mian fraton kaj min. Se vi ĉagrenos ŝin, mi do malkaŝos al la frato, kiel vi kondukas en la lastaj du jaroj.
- Lu Gui:** Kion eraran mi faris? (*Konsciante, ke lia digno perdiĝis antaŭ la filino.*) Mi estas baldaŭ 50-jara, ĉu mi timas diri al li, ke mi iom drinkas, hazardludas kaj distriĝas?
- Lu Sifeng:** Ho, tio tute ne interesas lin. Sed vi ŝtele fordandis la monon, kiun la frato sendis ĉiumonate de la minejo al la patrino. Se li sciis tion, li

neniel tolerus.

Lu Gui: Kion li aŭdacos fari kontraŭ mi? (*Levante sian voĉon*) Lia patrino edziniĝis al mi, mi do estas lia patro!

Lu Sifeng: Ts! Pro kio vi krias?

Lu Gui: Hm. (*Kun subita elokventeco*) Aŭskultu. Mi ja ofte ĉagreniĝas pro la edziĝo al via patrino. Ĉiu el la dekoj da homoj en la domo de Zhou laŭdas, ke mi esters sprita. Malpli ol du monatojn post mia laboro ĉi tie, ankaŭ mia filino akiris bonan laboron en la domo de Zhou. Kaj eĉ via frato — ĉu li povus akiri laboron en la minejo de la familio Zhou sen mia helpo? Ĉu via patrino iam akiris tian sukceson por vi kaj via frato? Tamen viaj patrino kaj frato daŭre kontraŭstaras min. Se via patrino ĉi-foje ree turnos malgajan vizaĝon al mi kiel antaŭe, mi do malakceptos ŝin en ĉeesto de via frato. Eble mi repudios ŝin malgraŭ, ke ŝi naskis por mi filinon kaj krome havigis al mi la damnindan duonfilon.

Lu Sifeng: Patro, vi...

Lu Gui: La ĉielo scias, kies bastardo li estas.

Lu Sifeng: Pro kio vi tiel parolas pri mia frato? Kion malbonan li faris al vi?

Lu Gui: Kion malbonan li faris al mi? Li estis soldato, rikiŝisto, maŝinisto kaj lernanto, sed kiam li estis diligenta en la afero? Mi multe klopodis kaj rekomendis lin al la minejo de mia mastro Zhou, sed li malpacigiĝis al la laborestro kaj eĉ batis lin!

Lu Sifeng (*singardeme*): Sed mi aŭdis, ke la laboristoj nenion faris antaŭ ol la mastro venigis policanojn kaj ordonis al ili pafi.

Lu Gui: En la plej malgrava senco li estas malsaĝulo. Li ja devas kompreni, ke se oni pagas al li salajron, li do devas obei ilian ordonon. Sed li partoprenis en striko, kaj nun venas mia vico peti indulgon de la mastro al tiu stultulo.

Lu Sifeng: Ŝajne vi misaŭdis. Mi informiĝis, ke la frato venis ĉi tien por mem intertrakti kun la mastro, sed ne peti vian propeton.

Lu Gui (*memkontente*): Oho, sed mi estas lia patro, tial mi ne povas stari flanke kaj lasi lin fari ĉion laŭvole.

Lu Sifeng (*turnas malestimon rigardon al Lu Gui kaj veas*): Nu, vi ripozu, kaj mi devas porti la dekoktaĵon al la sinjorino. (*Ŝi prenas la bovlon de dekoktaĵo kaj iras maldekstren al la manĝejo.*)

Lu Gui: Momenton! Mi havas ion por diri al vi.

Lu Sifeng (*penante ŝanĝi la temon*): Estas tempo por tagmanĝo. Ĉu vi pretigis teon?

Lu Gui: Tian bagatelon mi ne zorgas, aliulo faras tion.

Lu Sifeng: Do mi iru for.

Lu Gui (*baras al ŝi la vojon*): Sifeng, ne hastu. Mi havas ankoraŭ ion por konsiliĝi kun vi.

Lu Sifeng: Kion?

Lu Gui: Vi scias, ke hieraŭ estis la datreveno de la naskiĝotago de nia mastro, kaj sinjorido Ping donacis al mi trinkmonon — 4 juanojn.

Lu Sifeng: Tre bone. (Ŝprucigante la vortojn) Se mi estus li, eĉ grosan mi ne donus al vi.

Lu Gui (*humilaĉe*): Estas prave. Por kio taŭgas 4 juanoj? Post kvitigo neniu groso restos al mi.

Lu Sifeng (*sprite*): Vi do postulu kelkajn juanojn de mia frato, kiam li venos.

Lu Gui: Sifeng, ne estu tia! Ĉu mi, via patro, ne redonis al vi la pruntitan monon? Nun vi ja havas monon, ĉu vi ne povus pruntedoni al mi sep-ok juanojn?

Lu Sifeng: Mi ne havas monon. (Post paŭzo) Patro, ĉu vi vere uzis la monon por liberigi la ŝuldon?

Lu Gui: Sendube! (Ĵure) Mi estu damnita, se mi trompas mian propran filinon! Efektive tio ne estas mia kulpo. La trinkmono, kiun mi ricevis hieraŭ, ne sufiĉas por liberigi la grandan ŝuldon. Sed restis kelkaj grosetoj post liberigo de malgranda ŝuldo, kaj mi ludis kartojn, esperante malŝuldigi min per gajno. Sed ho ve! La perdo plus drinkaĵo faris al mi novan ŝuldon de dekelke da juanoj.

Sifeng fikse rigardas sian patron.

Lu Gui: Tio ja estas sen ajna mensogo.

Lu Sifeng: Do ankaŭ mi diru al vi la veron: Mi ne havas monon. (*Dirante, ŝi iras preni la bovlon de dekoktaĵo.*)

Lu Gui (*maltrankvitiĝe*): Nu, Sifeng, kion tio signifas? Vi ja estas mia propra filino.

Lu Sifeng: Sed via propra filino ne povas ĉiutage doni al vi monon por liberigi viajn vetludajn ŝuldojn.

Lu Gui (*serioziĝante*): He, mia infano, estu prudenta: Via patrino amas vin nur buŝe, dum mia prizorgo pri vi estas solida.

Lu Sifeng (*klariĝas pri lia aludo*): Kion vi sugestas?

Lu Gui (*rigardinte ĉirkaŭen, iras proksimen al Sifeng*): Aŭskultu, sinjorido

Ping ofte mencias vin al mi. Ha, li diris...

Lu Sifeng (*perdante sinregon*): Ho, ĉiam temas pri li, pri li ! Ĉu vi freneziĝis? Mi devas foriri. Ŝi baldaŭ vokos min.

Lu Gui: Momenton! Mi havas ankoraŭ demandon. Antaŭhieraŭ mi vidis, ke sinjorido Ping aĉetis ŝtofon...

Lu Sifeng (*malsereniĝas*): Kion tio rilatas?

Lu Gui (*rigardas sin de la kapo ĝis la piedoj*): Jes! (*Liaj okuloj fiksĝas sur ŝian manon.*) Ĉi tiu ringo... (*Ridante*) Ĉu tio ne estas lia donaco?

Lu Sifeng (*abomene*): Fi! Kiel cinike vi parolas!

Lu Gui: Ne ŝajngu vin sanktulino! Vi estas mia filino. (*Subite ridas avare.*) Nenio hontinda estas tio, ke filino de servisto akceptas alies donacaĵon kaj monon. Ne gravas. Mi tute komprenas.

Lu Sifeng: Diru do rekte, kiom da mono vi deziras?

Lu Gui: Ne multe, 30 juanoj jam sufiĉas.

Lu Sifeng: Nu, bonvolu postuli rekte de sinjorido Ping!

Lu Gui (*kolere*): Ha, mia infano, ĉu vi opinias, ke mi estas tiel stulta kaj ne scias, kio okazis ĉe vi kaj la kanajla sinjorido?

Lu Sifeng (*penante sin reteni koleriĝi*): Ĉu vi indas esti patro? Ĉu la patro devas tiel paroli al sia filino?

Lu Gui: Ĝuste pro tio, ke mi estas via patro, mi devas admoni vin. Nun, respondu! Nokte antaŭhieraŭ...

Lu Sifeng: Nokte antaŭhieraŭ?

Lu Gui: Jes, tiun nokton, dum mi forestis hejme, vi revenis hejmen noktomeze. Kion vi faris tiam?

Lu Sifeng (*elpensante pretekston*): Mi estis serĉanta ion por la sinjorino.

Lu Gui: Sed kial tiel malfrue?

Lu Sifeng (*malestime*): Patro de via speco ne rajtas tiel demandi min!

Lu Gui: Ho brave. Vi ne kuraĝas konfesi.

Lu Sifeng: Kial mi ne kuraĝas?

Lu Gui: Do respondu!

Lu Sifeng: Fakte estis, ke la sinjorino ordonis al mi pretigi vestojn por la sinjoro, ĉar li ĵus revenis.

Lu Gui: Ha, (*mallaŭte, sed minace*) kiu estas tiu, kiu aŭte portis vin hejmen en la noktomezo? Kiu estas la ebriulo, senĉese elĵetante deliraĵojn?

Lu Sifeng: Tiu, tiu...

Lu Gui (*ridegas*): Respondi vi ne bezonas nun. Tiu estas mia riĉa bofilo! Al mia kaduka kabano venis sinjoro en aŭto pro mia filino, filino de servisto!

(*Subite severe*) Nu, diru, kiu li estas?

Lu Sifeng konsterniĝis.

Lu Dahai, frato de Sifeng kaj duonfilo de Lu Gui, enira. Li estas altstatura kun densaj brovoj kaj iom kaviĝintaj vangoj. Lia malcedemo enkorpiĝas en lia rektangula mentono kaj akraj okuloj. Liaj maldikaj lipoj akrekontrastas kun la dikaj kaj ruĝaj de lia fratino, markantaj la fervorecon de sudanoj. Kun apenaŭa balbuto, li parolas tamen akre en ekscitiĝo. Hodiaŭ li, membro de la strik-estraro, revenis de la minejo distanca je 300 km., kie eksplodis striko. Spirita streĉiteco en la lastaj monatoj aspektigis lin laca. Kun malordaj haroj li aspektas kvazaŭ frato de Lu Gui. Sed proksima observado rimarkigas, ke liaj voĉo kaj rigardoj estas tiel junaj kaj entuziasmaj, kiel tiuj de lia fratino, tiel energiaj, kiel vulkano tuj erupcionta. Li portas ministan bluan bluzon kaj tenors oleplenan pajloĉapelon en la mano. Unu el liaj nigraj ledŝuoj perdis la laĉon. Enpaŝante, li aspektas iom ĝeniĝa. Li parolas koncize, aspektante malvarme.

Lu Dahai: Sifeng.

Lu Sifeng: Frato.

Lu Gui (*al Si feng*): Diru! Ne estu muta!

Lu Sifeng (*sin turnante al la frato*): Frato.

Lu Gui (*tion ignorante*): Vi konfesu, malgraŭ ke venis via frato.

Lu Dahai: Kio okazis?

Lu Gui: Tio ne estas via afero.

Lu Sifeng: Nenio grava. (*Al Lu Gui*) Bone, patro, ni interkonsiliĝu poste.

Lu Gui: Poste? (*Jetas rigardon al Sifeng.*) Nu, tiel estu! (*Arogante al Dahai*)

Kiu permesis al vi veni ĉi tien?

Lu Dahai (*lakone*): Mi longe atendis ĉe la pordistejo.

Lu Gui: Vi ja estas kruda ministro kaj ne konas la regulojn de la granda domo.

Lu Sifeng: Vi sciu, li ne estas servisto ĉi tie.

Lu Gui: Lia vivtenado dependas de la familio Zhou.

Lu Dahai (*malvarme*): Kie li estas?

Lu Gui (*ŝajnigante sin nekomprenanta*): Li? Pri kiu temas?

Lu Dahai: Prezidanto de la direktoraro de la minejo.

Lu Gui: Nenia prezidanto ĉi tie estas, mi scias nur la sinjoron.

Lu Dahai: Anoncu al li, ke la ministra reprezentanto jam venis.

Lu Gui: Laŭ mi, pli bone estas, ke vi iru hejmen unue. (*Memfide*) Mi zorgos

pri via afero en la minejo. Restu kelke da tagoj hejme kun la patrino kaj fratino. Post kiam via patrino foriros, vi iru al la minejo kaj denove laboru tie.

Lu Dahai: Vi ne komprenas nian aferon. Pri tio vi ne zorgu!

Lu Sifeng (*esperante, ke Lu Gui foriros*): Patro, ĉu vi bonvolus rigardi, ĉu foriris la gastoj. Se jes, vi konduku mian fraton al la sinjoro.

Lu Gui (*kapskuante*): Mi pensas, ke li ne akceptos vin.

Lu Dahai (*kun plena justeco*): Sciigu lin, ke la laborista reprezentanto Lu Dahai venis lin vidi. Ni venis ĉi tien laŭ lia invito. Antaŭhieraŭ ni jam renkontiĝis kun li ĉi tie en la kompanio.

Lu Gui (*hezite*): Do, mi iru demandi.

Lu Sifeng: Vi iru!

Lu Gui (*returnas sin ĉe la pordo de la kabineto*): Ne diru krudajn vortojn, se li akceptos vin! Ĉu vi aŭdis? (*Li iras en la kabineton per paŝoj de aroganta servisto.*)

Lu Dahai (*sekvas Lu Gui per la okuloj ĝis li malaperas en la kabineto*): Hm, li forgesas, ke li estas homo.

Lu Sifeng (*kun delikata kulpigo*): Frato, (*timeme rigardas Lu Dahai*) Mallaŭte! La sinjoro estas en la kabineto!

Lu Dahai (*rigardas ŝin*): Jes. La panjo baldaŭ revenos. Mi pensas, ke vi forlasu ĉi tiun laboron kaj restu hejme.

Lu Sifeng (*kun miro*): Kial?

Lu Dahai: Ĉi tie ne estas via loko.

Lu Sifeng: Kial?

Lu Dahai (*en malamo*): Ĉiuj de la famiho Zhou estas fiuloj. Mi multe sciigis pri iliaj fiagoj en la lastaj du jaroj en la minejo. (*Malrapide*) Mi malamas ilin.

Lu Sifeng: Pri kiaj fiagoj vi sciigis?

Lu Dahai: Prenu ĉi tiun luksan domon kiel ekzemplon, Sifeng. Ĝi ja estas konstruita sur la ostoj de ni ministoj subpremitaj en la minejo.

Lu Sifeng: Oho, ne diru plu. Mi aŭdis, ke la domo estas hantata.

Lu Dahai (*subite*): Ĵus antaŭe mi vidis junulon en la ĝardeno. Li kuŝas tie kun fermitaj okuloj, kaj lia vizaĝo estas tiel pala, ke li estas mortanta. Oni diris, ke li estas la pliaĝa filo de la prezidanto de la direktoraro de la minejo. Ha, punodestinita!

Lu Sifeng (*kolere*): Vi eraris. (*Abrupte*) Li traktas aliajn afable, ĉu vi scias?

Lu Dahai: Ĉu li povus esti bona homo? Lia patro faras ĉiajn malnoblaĵojn por

akiri monon.

Lu Sifeng (*rigardas Dahaj*): Dum du jaroj mi ne vidis vin, kaj vi multe ŝanĝiĝas.

Lu Dahai: En tiuj du jaroj, (*li faras kelkajn paŝojn, returnas sin al Sifeng kaj rigardas fikse en ŝian vizaĝon*) laŭ mia opinio, ŝanĝiĝis vi!

Lu Gui aperas el la kabineto.

Lu Gui: Ho, la gastoj finfine foriris, sed kiam mi estis anonconta vian alvenon, eniris alia gasto. (*Turnas sin al Lu Da-hai.*) Laŭ mi, estos bone, ke ni eliru kaj tie atendu.

Lu Dahai: Tiukaze, mi eniru kaj interparolu kun li. (*Pretas iri al la pordo de la kabineto.*)

Lu Gui (*barante al li la vojon*): Kien vi iras?

Lu Sifeng: Haltu! Frato, ne iru tien! Pli bone...

Lu Dahai (*post momenta pripenso*): Bone.

Lu Gui: Nu, iru! (*Alproksimiĝas al la meza pordo kaj returniĝas al Sifeng.*) Sifeng, vi ne foriru! Mi tuj revenos. Ĉu vi aŭdas?

Lu Sifeng: Vi iru!

Lu Gui kaj Lu Dahai forzras kune.

Lu Sifeng lace sidiĝas en sofo.

El la ĝardeno aŭdiĝas mallaŭta, junula voko: "Sifeng", kiu iom post iom proksimiĝas al la enirejo de la meza pordo.

Lu Sifeng (iom konsternite): Oho, venas sinjorido Chong!

Voĉo de Zhou Chong: Sifeng! Sifeng!

Lu Sifeng konsterniĝe leviĝas kaj kaŝas sin post la sofo.

Zhou Chong, la dua filo de Zhou Puyuan, 17-jara, en blanka tenisista kostumo, kun rakedo sub la maldekstra brako, eniras per rapidaj paŝoj, viŝante al si la ŝvitan vizaĝon per tuko. Same kiel aliaj junuloj en lia aĝo, li estas fantaziema. Lia vizaĝo ruĝe briletas kaj la okulparo trembrile radias de gajeco.

Zhou Chong: Sifeng! Sifeng! (*Rigardas ĉirkaŭen.*) Ŝi ne estas ĉi tie. (*Piedpinte iras dekstren al la manĝejo, malfermas la pordon kaj vokas mallaŭte.*)

Eliru, Sifeng! Mi havas novaĵon. (*Senbrue iras al la kabineto kaj vokas en plimallaŭta voĉo.*) Sifeng!

Voĉo de Zhou Puyuan (*el la kabineto*): Ĉu estas Chong?

Zhou Chong (*timeme*): Jes, patro.

Voĉo de Zhou Puyuan: Kion vi faras?

Zhou Chong: Mi serĉas Sifeng.

Voĉo de Zhou Puyuan: Ŝi ne estas ĉi tie.

Zhou Chong (*retiras sin el la pordo kaj faras grimacon*): Strange! (Iras dekstren al la manĝejo.)

Post kiam Zhou Chong foriris, Lu Sifeng eliras de la kaŝejo kaj elspiras pro liberiĝo.

Lu Gui iras el la meza pordo.

Lu Gui (*al Sifeng*): Kiu vin volas?

Lu Sifeng: Sinjorido Chong.

Lu Gui: Kion li volas fari?

Lu Sifeng: Mi ne scias.

Lu Gui (*malkontente*): Kial vi evitis lin?

Lu Sifeng: Vi ja diris, ke mi restu ĉi tie, ĉu ne? Nu, diru, kion vi volas?

Lu Gui: Bone. Antaŭ momento, kiam mi iris al la servistejo, tiuj bastardoj baris al mi la vojon ĉe la pordo kaj postulis de mi pagon. Mi pensas, ke mi ne elliberiĝos sen 20 junaĵoj.

Lu Sifeng (*elprenas monon*): Jen la tuta sumo, kiun mi havas. Mi intencas aĉeti per tiu sumo vestojn por la patrino. Nun akceptu, se vi bezonas!

Lu Gui (*malsincere*): Sed al vi restas neniu groŝo.

Lu Sifeng: Ne estu tiel ĝentila!

Lu Gui (*akceptas la monon kun rido kaj kalkulas*): Nur 12 junaĵoj?

Lu Sifeng (*senkaŝe*): Mi havas nur tiom da kontanta mono.

Lu Gui (*embarasite*): Kiel do mi povos liberiĝi de tiuj kreditoroj?

Lu Sifeng (*pene sin regas*): Diru do al ili, ke ili havu en nia hejmo ĉi-vespere. Poste mi interkonsiliĝu kun la patrino. Kaj tiu monsumo estu je via dispono.

Lu Gui (*ĝoje*): Al mi? Mi do prenu ĝin kiel vian donacon al la patro. De longe mi scias, ke vi amas vian patron.

Lu Sifeng (*senhelpo*): Ŝajne nun vi lasas min supreniri. (*Ŝi prenas la bovlon de drogherba dekoktaĵo.*)

Lu Gui: Jes, tute laŭ via volo. Ĉu mi malpermesas al vi? Iru kaj diru al la sinjorino, ke Lu Gui maltrankvilas pri ŝia farto.

Lu Sifeng: Tion mi ne povas forgesi.

Lu Gui (*kontente*): Aĥ, Sifeng, mi devas diri al vi iun aferon.

Lu Sifeng: Pli bone vi diru iom poste.

Lu Gui (*ion aludante*): El, tio ja estas via afero. (*Ridas afekte.*)

Lu Sifeng (*malsereniĝas sia vizaĝo*): Kio min koncernas? (*Demetas la bovlon.*)
Bone, mi iros post kiam vi ĉion klare eldiros.

Lu Gui: Jen vi denove malpacientiĝis. Vi kondutas simple kiel sinjoridino kaj ekflamigas ĉe bagatelo.

Lu Sifeng: Diru do!

Lu Gui: Ne estu tia, mia infano! (*Serioze*) Mi volas atentigi, ke vi estu singrdema.

Lu Sifeng (*mokante*): Nun mi jam havas neniun groŝon. Kial mi ankaŭ bezonas singardemon?

Lu Gui: Aŭskultu! Mi rimarkis, ke lastatempe la sinjorino ne estas en bona humoro.

Lu Sifeng: Ĉu tio koncerms min?

Lu Gui: Mi pensas, ke ŝi sentas malagrablecon ĝuste pro via alesto.

Lu Sifeng: Kial?

Lu Gui: Kial? Mi rememorigu vin. La sinjoro estas multe pli maljuna ol la sinjorino, dum sinjorido Ping estas nur ŝia duonfilo.

Lu Sifeng: Mi scias.

Lu Gui: Ĉu vi scias, kial neniu iras en tiun ĉambron post vesperiĝo kaj, kial neniu venas ĉi tien eĉ tage, kiam la sinjoro estas en la minejo?

Lu Sifeng: Ĉar ĝi estis hantata.

Lu Gui: Ho jes. Mi ja vidis fantomojn.

Lu Sifeng: Ĉu?

Lu Gui (*memkontente*): Jes, tio estas feliĉo por mi.

Lu Sifeng: Kio okazis?

Lu Gui: Tio okazis antaŭ via alveno. La sinjoro estis en la minejo, en ĉi tiu granda domo estis nur la sinjorino kaj la du sinjoridoj. Tiam ĉi tiun ĉambron frekventis fantomoj, kaj sinjorido Chong, malkuraĝa knabo, insistis, ke mi dormu ekster lia ĉambro por lin gardi. Mi memoras, ke estis aŭtuna noktomezo. Sinjorido Chong subite vekis min, firante, ke li aŭdis fantoman bruon en la salono kaj petis min rigardi. Ankaŭ mi timis, tamen mi, novveninta servisto, ne kuraĝis malobei.

Lu Sifeng: Ĉu vi iris rigardi?

Lu Gui: Mi iom drinkis por firmigi mian nervon. Poste mi trapasis la lotusan lageton kaj ŝtele iris al la pordo. Tie mi aŭdis, ke dolore ploris fantomino. Timplena, mi fariĝis tamen pli scivolema. Mi min kuraĝigis kaj rigardis en la ĉambron tra la fendo de la fenestro.

Lu Sifeng (*fiksante timeman rigardon sur lin*): Kion vi vidis?

Lu Gui: Ĝuste sur tiu ĉi tablo pale flagris kandelo. Frapis miajn okulojn du fantomoj en nigraj vestoj, sidantaj ŝultro ĉe ŝultro, kun la dorso kontraŭ mi. La fantomino ŝajne sinapogis al la viro kaj ploris, kaj la virfantomo veadis kun mallevita kapo.

Lu Sifeng: Ĉu vere?

Lu Gui: Jes ! Duonebria, mi tusetis, kio tuj disigis la fantomojn. Ili ambaŭ turnis sin al mi. Ho, en tiu momento mi ja klare vidis iliajn vizaĝojn. Mi vere vidis fantomojn.

Lu Sifeng: Kiaj ili estas?

Lu Gru paŭzas kaj rigardas ĉirkaŭen.

Lu Sifeng: Kiuj ili estas?

Lu Gui: Tiu virino (*sin turnas kaj mallaŭtigas sian voĉon*) estas mastrino.

Lu Sifeng: Mastrino?

Lu Gui: Kaj la viro — sinjorido Ping.

Lu Sifeng: Li?

Lu Gui: Jes, estas li. Absolute ĝuste. Li kaj lia duonpatrino ja hantis ĉi tiun lokon nokte.

Lu Sifeng (*kun ŝajnigita indiferenteco*): Mi ne kredas. Certe vi misvidis.

Lu Gui: Ne mi eraris. Ne trompu vin mem. Vi devas esti prudenta kaj nestulta. Tiaj ja estas la homoj de la familio Zhou!

Lu Sifeng: Ne, neblas.

Lu Gui: Ĉu vi forgesas, ke sinjorido Ping estas nur 6-7 jarojn pli juna ol la mastrino?

Lu Sifeng (*parolas al si mem*): Ne, mi ne kredas,

Lu Gui: Vi ne kredas? Forĵetu vian revon! Pensu nur, kiu vi estas kaj kiu li estas? Vi ja estas servista filino. Ĉu sinjorido Ping povus...

Lu Sifeng (*subite*): Ĉesu ! (*Stariĝas.*) Ĉu vi volas ĉagreni min per tiuj stultaĵoj, vidante, ke mi estas ĝoja pro la hejmen-reveno de mda patrino?

Lu Gui: Oj! Mi diris al vi la veron por prudentigi vin, sed vi koleriĝis. Ve,

mi ne scias, kion fari. (*Kun aroganteco rigardas al Lu Sifeng, iras al la te-tableto, lerte prenas kelke da cigaredoj kaj metas ilin en sian cigaredujon.*)

Lu Sifeng (*malvarme, rigardas lin*): Se vi ne havas plu, mi iros. (*Ŝi prenas la bovlon kaj pretas iri for.*)

Lu Gui: Momenton! Mi ja ne finis. (*Senzorge*) Via patrino venos ĉi tien vidi vin.

Lu Sifeng (*paligás*): Kio?

Lu Gui: Ŝi rekte venos ĉi tien de la fervoja stacio.

Lu Sifeng: Kial vi venigos ŝin ĉi tien? Vi ja scias, ke ŝi ne volas, ke mi faru servistinan laboron. Kaj krome, ĉiuvespere mi revenas hejmen. Pro kio ja venigi ŝin ĉi tien?

Lu Gui: Ne mi, sed la mastrino volas venigi ŝin.

Lu Sifena: Ĉu?

Lu Gui: Ho, jes. (*Mistere*) Strange, ĉu ne? Ŝi ja estas en neniu rilato kun via patrino. Sed ŝi intencas babilu kun via patrino.

Lu Sifeng: Ĉu vi povus diri ne tiel heziteme?

Lu Gui: Ĉu vi scias, kial la mastrino sin fermas supre kaj ŝajnigas sin malsana?

Lu Sifeng: Ŝi ĉiam estas tia, kiam la mastro estas hejme.

Lu Gui: Ĉu ĉi-foje vi ne rimarkis ion nekutiman?

Lu Sifeng: Ne!

Lu Gui: Ĉu vi nenion rimarkis? Kaj krome, sinjorido Ping ne diris ion al vi?

Lu Sifeng: Ne. Mi scias nur, ke en ĉi tiu duonjaro li malofte parolas kun la mastrino.

Lu Gui: Nu, kaj kiel la mastrino traktas vin?

Lu Sifeng: En la lastaj tagoj pli bone ol antaŭe.

Lu Gui: Ĝuste mi divenis. Nun aŭskultu! La mastrino klare scias, ke mi ne volas, ke vi forlasu vian laboron ĉi tie. Tial ŝi intencas rekte diri al via patrino, ke ŝi portu vin for!

Lu Sifeng (*mallaŭte*): Ŝi volas maldungi min — sed pro kio?

Lu Gui: Vi bone scias pri la kialo!

Lu Sifeng (*mallaŭte*): Sed kial ŝi volas venigi mian patrino?

Lu Gui: Ŝi havas ion por malkaŝi al via patrino.

Lu Sifeng (*subite komprenas*): Ho, patro! Vi neniel sciigu la patrino, ke mi laboras ĉi tie. (*Larmas pro timo kaj bedaŭro.*) Patro, ne forgesu, ke antaŭ du jaroj, kiam mia patrino estis forironta de ni, ŝi atentigis vin neniel lasi min servi en riĉula domo, sed vi ne aŭskultis kaj servis min ĉi tie. Pri

ĉio ĉi ŝi ne scias, kaj mi neniel volas, ke ŝi informiĝos pri ĉio ĉi tie. (*Ŝi sin apogas sur la tablo kaj ploras.*) Ho, panjo, panjo!

Lu Gui: Ho, mia infano. (*Karesas ŝin.*) Nun vi estas klara, ke mi faras ĉion por vi. Mi amas vin, kaj nenio timinda estas ĉi tie! Ŝi faros nenion malutilan al vi. Ŝi ne kuraĝas maldungi vin. Ĉi tie estas homo timinda por ŝi.

Lu Sifeng: Kiu?

Lu Gui: Ŝi timas min! Ĉu vi forgesas la du fantomojn? Mi ja estas lerta kapti fantomojn. Kiam mi petis de ŝi forpermeson por vi hieraŭ vespere, ŝi diris, ke mi venigu vian patrino en ĉi tien, se via patrino vizitos vin. Nu, rigardu, en kia humoro ŝi estas en tiuj du tagoj, mi ja divenis la kaŭzon. Tiam mi menciis pri la okazaĵo en tiu nokto. Ŝi estas saĝa kaj ne povas malkompreni mian aludon. Hm, se ŝi ŝajniĝos sin, ŝi falos en embarason kaj precipe nun, dum la mastro estas hejme. Mi scias, ke ŝi estas akra ino, sed mi morte venĝos kontraŭ tiu, kiu aŭdacos ofendi mian filinon!

Lu Sifeng (*levas sian kapon*): Ne faru senpripensaĵon!

Lu Gui: Mi timas neniun en ĉi tiu domo, escepte la maljunan mastron. Estu trankvila, kaj via patro zorgas pri ĉio. Cetere tio eble estas mia miskompreno. Eble ŝi tute ne havas tiun intencon. Supraĵe, ŝi ja diris al mi, ke ŝi volas konatiĝi kun via patrino, ĉar ŝi aŭdis, ke via patrino scipovas legi kaj skribi.

Lu Sifeng (*subite streĉas siajn orelojn*): Ts! Ŝajne iu tudas en la manĝejo.

Lu Gui (*aŭskultas atente*): Ĉu venas la mastrino? (*Iras al la pordo de la manĝejo kaj rigardas tra la serurtruo, poste turnas sin.*) Vere estas ŝi! Strange, ke ŝi malsupreniras. Estu sentima! Nenion diru! Mi iras for!

Lu Sifeng (*forviŝas larmojn*): Hm. Informu min, tuj post kiam mia patrino alvenos!

Lu Gui: Ho jes, kaj kiam via patrino venos, ŝajnigu, ke vi aŭdis nenion, ĉu bone? (*Li iras al la meza pordo kaj returnas sin.*) Ne forgesu diri al la mastrino, ke mi maltrankvilas pro ŝia sanstato. (*Haste foriras al la meza pordo.*)

Lu Sifeng iras al la manĝejo kun la bovlo de dekoktaĵo. Zhou Fanyi eniras renkonte al ŝi. La vizaĝo de la mastrino estas pala dum la vizaĝa konturo estas bela. Melankolio klare legiĝas sur ŝiaj brovoj. Videblas, ke malĝojo brulas interne en sia koro, kaj la

okuloj estas plenaj de doloro kaj ĉagreniĝo pro malespero de juna virino. Ŝi ĉiam pene retenas sin. Estante virino klerigita per la nova eduka metodo sed influata de la malnova etiko, ŝi havas siajn naturan kvietemon kaj saĝon. Ŝi ŝatas poemojn kaj prozojn. Tamen neretenebla pasio kaj forto ondas en ŝia koro. Ŝia karaktero de neregebla rigideco instigas ŝin fari spiteman decidon. Ŝi amas pasie kaj malamas ĝisoste. Ŝia eksteraĵo estas kvieta, kvazaŭ malpeza aŭtuna folio ĉe la vesperiĝo. Ŝi konscias, ke ŝia somero jam forpasis kaj la vesperruĝo de la vivo baldaŭ malheliĝos.

En nigraj vestoj borderitaj per arĝenta pasamento, kun ronda ventumilo en la mano, ŝi eniras rigardante al Lu Sifeng.

Lu Sifeng: Sinjorino! Kial vi malsupreniris? Mi estas portonta al vi la medikamenton.

Zhou Fanyi: Ĉu la mastro estas en la kabineto?

Lu Sifeng: Jes, tie li havas gaston.

Zhou Fanyi: Kiu venis?

Lu Sifeng: Antaŭ momento estis policestro, sed la nunan mi ne scias. Ĉu vi volas vidi lin?

Zhou Fanyi: Ne. (Paŭzas kaj rigardas ĉirkaŭen. Dum du semajnoj mi ne malsupreniris, kaj la aspekto de ĉi tiu ĉambro jam ŝanĝiĝis.)

Lu Sifeng: Jes. La mastro ne ŝatas la antaŭan aranĝon kaj ordonis elporti kelke da viaj mebloj, kaj nun la ĉambro estas aranĝita laŭ lia volo.

Zhou Fanyi (*rigardante la spegul-ŝrankon en la dekstro*): Tiu malnova ŝranko estas refoje metita ĉi tie. Ĉion bagatelan li ŝatas decidi. (*Ŝi tudas kaj sidiĝas.*)

Lu Sifeng: Via vizaĝo vidigas febron, sinjorino. Bonvolu supreniri kaj tie ripozi.

Zhou Fanyi: Ne, supre estas tro varme. (*Tudas refoje.*)

Lu Sifeng: La mastro diris, ke vi pli bone kviete kuŝu supre en la lito, ĉar via sanstato estas malbona.

Zhou Fanyi: Mi ne ŝatas kuŝadi en la lito. Ho, mi forgesis, kiam la mastro revenis de la minejo?

Lu Sifeng: En nokto antaŭ tri tagoj. Li trovis, ke vi terure febras, li dormas unusola malsupre, por ne ĝeni vin.

Zhou Fanyi: Ŝajne mi ne vidis lin en la tago.

Lu Sifeng: Ĉiutage li iris ĉeesti kunvenon de la provinca registaro, kaj kiam li

supreniris viziti vin vespere, via pordo ĉiam estis ŝlosita.

Zhou Fanyi (*senzorge*): Oj, kial tiel sufoke varme ankaŭ ĉi tie?

Lu Sifeng: Jes, sufiĉe sufoke. De mateno pezaj nuboj kovris la ĉielon. Eble estos pluvego.

Zhou Fanyi: Donu al mi pli grandan ventumilon. Mi sufokiĝas de varmego.

Lu Sifeng donas al ŝi grandan ventumilon. Zhou Fanyi rigardas ŝin por momento kaj intence turnas sian rigardon.

Zhou Fanyi: Kial mi ne vidis sinjoridon Ping en tiuj tagoj?

Lu Sifeng: Probable li estas tre okupita.

Zhou Fanyi: Mi aŭdis, ke ankaŭ li volas iri en la minejon, ĉu vere?

Lu Sifeng: Mi ne scias.

Zhou Fanyi: Ĉu vi ne aŭdis ion pri tio?

Lu Sifeng: Ne. Mi scias nur, ke lia servistino estas tre okupita por prepari por li vestojn.

Zhou Fanyi: Kion via patro nun faras?

Lu Sifeng: Mi ne scias. Oho, li diris, ke li tre maltrankvilas pro via sanstato.

Zhou Fanyi: Hm, li ja zorgas pri mi. (*Post paŭzo kaj subite*) Ĉu li ankoraŭ ne ellitiĝis?

Lu Sifeng: Kiu?

Zhou Fanyi (*konsternite de la neatendita demando de Sifeng, haste kaŝas sian senton*): Sinjorido Ping.

Lu Sifeng: Mi ne scias.

Zhou Fanyi (ĵetas rigardon al ŝi): Ĉu?

Lu Sifeng: Ne, mi ne vidis lin.

Zhou Fanyi: Kiam li revenis hieraŭ nokte?

Lu Sifeng (*ruĝiĝas*): Mi ne scias, ĉar mi ĉiam noktas hejme.

Zhou Fanyi (*senvole*): Ĉiam noktas hejme? (*Konsciante sian maldecan demandon*) Sed kial vi ĉiun nokton iras hejmen nun, kiam la mastro estas hejme? Kiu lin servas?

Lu Sifeng: Sed sinjorino, ĉu ne vi ordonis al mi nokti hejme?

Zhou Fanyi: Jes, sed tiam la mastro ne estis hejme.

Lu Sifeng: Mi pensas, ke tia piulo, kia nia mastro, ne ŝatas knabinon apud si.

Zhou Fanyi: Oho. (*Subite levas la rigardon.*) Mi pensas, se li tuj foriros en la lastaj tagoj, do kien li iros?

Lu Sifeng (*timeme*): Ĉu vi mencias pri sinjorido Ping?

Zhou Fanyi (*fikse rigardas ŝin*): Jes.

Lu Sifeng: Mi ne aŭdis. (*Balbuta*) Li hejmenrevenas la 2-an aŭ 3-an nokte. Ĉi-matene mia patro grumblis, ke li malfermas la pordon por la sinjorido post noktomezo.

Zhou Fanyi: Ĉu li ebriiĝis?

Lu Sifeng: Pri tio mi ne estas klara. (*Penas ŝanĝi paroltemon.*) Sinjorino, prenu la medikamenton, mi petas!

Zhou Fanyi: Medikamento? Kies ideo tio estas?

Lu Sifeng: La mastro ordonis.

Zhou Fanyi: De kie estas tia medikamento? Vi ja scias, ke mi ne vizitis kuraciston.

Lu Sifeng: La mastro diris, ke via malsano radikiĝas en la hepato, tial ĉi-matene li rememoris iun preskribon, kiun vi prenis antaŭe, kaj ordonis aĉeti kaj dekokti ĝin.

Zhou Fanyi: Ĉu ĝi estas pretigita?

Lu Sifeng: Jes. Jen ĝi estas. (*Donas al ŝi la bovlon.*) Bonvolu preni.

Zhou Fanyi (*trinkas iom*): Tenure amara. Kiu ĝin pretigis?

Lu Sifeng: Mi.

Zhou Fanyi: Ĝi estas abomeninda. Forverŝu ĝin!

Lu Sifeng: Forverŝi?

Zhou Fanyi (*rememoras la severan mienon de sia edzo Zhou Puyuan*): Oho, metu ĝin tie! Ne, (*Kun abomeno*) plibone vi forverŝu ĝin!

Lu Sifeng (*heziteme*): Jes.

Zhou Fanyi: Tiaj amaraj medikamentoj sufiĉe min turmentis en tiuj jaroj.

Lu Sifeng (*kun la bovlo en la mano*): Estu kuraĝa, sinjorino! Maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango.

Zhou Fanyi (*subite flamiĝas*): Kiu volas vian admonon? Verŝu ĝin for! (*Konsciiĝas pri sia maldeca parolo.*) Mia servistino diris al mi, ke la mastro aspektas maldika ĉi-foje.

Lu Sifeng: Jes, li estas pli maldika kaj sunbruna. Nun li tre maltrankvilas pro la ministra striko.

Zhou Fanyi: Ĉu li estas tre malĝoja?

Lu Sifeng: Li estas sama kiel antaŭe. Li parolas preskaŭ neion en la hejmo, escepte de ĉeesto de gastoj.

Zhou Fanyi: Ĉu li ne alparolis la sinjoridojn?

Lu Sifeng: Li nur kapjesis al sinjorido Ping, sen alparolo. Nur ĉe la renkontiĝo kun sinjorido Chong, li demandis lin pri lia lernado. Ho, jes, mi

rememoras, ke sinjorido Chong demandis pri via sanstato ĉi-matene.

Zhou Fanyi: Diru al li, ke mi sentas tre bone. Kaj plie, diru al la kasisto, ke li donu al sinjorido Chong 40 juanojn por libroaĉeto.

Lu Sifeng: Sinjorido Chong deziras viziti vin.

Zhou Fanyi: Lasu lin supreniri kaj vidi min. (*Ŝi leviĝas kaj faras du paŝojn.*)
Ho, kial tiel sufoke varme estas ĉi tie? Kvazaŭ ĉio en la domo ŝimus.

Lu Sifeng (post momenta pripenso): Sinjorino, mi volas peti de vi forpermeson por hodiaŭ.

Zhou Fanyi: Ĉar via patrino venis de Ji-nan, ĉu? Pri tio via patro diris al mi.

Voĉo de Zhou Chong (*el la ĝardeno*): Sifeng! Sifeng!

Zhou Fanyi: Sinjorido Chong vin vokas. Iru demandi, kion li volas.

Voĉo de Zhou Chong: Sifeng!

Lu Sifeng: Mi estas ĉi tie.

Zhou Chong eniras tra la meza pordo.

Zhou Chong (*vidas nur Lu Sifeng*): Mi serĉis vin la tutan matenon. (*Subite vidas Zhou Fanyi.*) Panjo, kial vi malsupreniris?

Zhou Fanyi: Chong, kion vi faris? Via vizaĝo estas en ŝvito.

Zhou Chong: Mi ludis tenison kun mia kunlernanto. (*Ameme*) Mi havas multon por diri al vi, panjo. Ĉu vi sentas vin pli bone? (*Sidiĝas apud Fanyi.*) Mi supreniris vidi vin plurfoje en la lastaj tagoj, sed via pordo ĉiam estis fermita.

Zhou Fanyi: Mi volas kvietecon. Kiel mi aspektas nun? Sifeng, prenu sodakvon por Chong!

Sifeng eliras el la pordo de la manĝejo.

Zhou Chong (*ĝoje*): Mi rigardu vin! Laŭ mi, vi esters tute bona, neniom malsana. Kial oni prenas vin malsana? Vi ŝlisis vin en la ĉambro kaj eĉ ne vidis la patron 3 tagojn post lia reveno.

Zhou Fanyi (*rigardas al li melankolie*): Mi sentas sufokiĝon. (*Subite*) Chong, ĉu vi esters 17-jara?

Zhou Chong: Ho, panjo, se vi ankoraŭ ne memoras mian aĝon, mi koleros kontraŭ vi.

Zhou Fanyi (*ridante*): Ho, pardonon, mi kulpas. Iafoje mi eĉ forgesas, kie mi mem estas. (*Perdiĝas en meditado.*) Ho, jam pasis 18 jaroj de post

mia alveno en ĉi domon. Nu, diru al mi, ĉu mi maljuniĝis?

Zhou Chong: Ne. Kio vin maltrankviligas?

Zhou Fanyi: Nenio.

Lu Sifeng eniras kun sodakvo.

Lu Sifeng: Bonvolu, sinjorido Chong.

Zhou Chong: Dankon!

Sifeng ruĝiĝas, elverŝas akvon por li.

Zhou Chong: Bonvolu doni tason ankaŭ al la sinjorino, ĉu bone?

Sifeng iras for.

Zhou Fanyi (*rigardas al ili fikse*): Chong, kial vi estas tiel afabla al ŝi?

Zhou Chong (*trinkas*): Panjo, jen estas, kion mi volas diri al vi, ĉar...

Sifeng eniras.

Zhou Chong: ...Panjo, kie estas ventumilo de vi pentrita?

Zhou Fanyi: Ĉu vi forgesas, ke mi estas malsana?

Zhou Chong: Pardonon, panjo. Kial tiel sufoke varme ĉi tie?

Zhou Fanyi: Ŝajne la fenestro ne estas malfermita.

Zhou Chong: Mi malfermu ĝin.

Lu Sifeng: La mastro volas, ke ĝi estu fermita, dirante, ke eksterdome estas pli varme.

Zhou Fanyi: Ne, malfermu! Dum lia dujara foresto li tute ne scias la mortan atmosferon en ĉi domo.

Sifeng tiras flanken la fenestran kurtenon.

Zhou Chong (*vidas, ke ŝi malfacile movas la flolvazon antaŭ la fenestro*): Ĉesu, Sifeng! Lasu min fari. (*Iras al Sifeng.*)

Zhou Fanyi (*turnas sin al Lu Sifeng*): Sifeng, iru al la kuirejo kaj rigardu, kiujn vegetarajn pladojn oni preparas por la mastro.

Sifeng eliras el la meza pordo.

Zhou Fanyi: Chong!

Zhou Chong returnas sin.

Zhou Fanyi: Sidiĝu, nun diru!

Zhou Chong (*rigardas al sia patrino kun ĝojo*): Panjo, mi estas tre ĝoja en la lastaj tagoj.

Zhou Fanyi: Tre bone, ke vi sentas ĝojon en la hejmo.

Zhou Chong: Mi havas neniun sekreton por vi, panjo, vi ne estas ordinara patrino, vi estas la plej kuraĝa, plej imagema kaj plej simpatia al miaj ideoj.

Zhou Fanyi: Dankon!

Zhou Chong: Mi volas diri al vi ion, aŭ pli ĝuste, peti vian konsilon.

Zhou Fanyi: Bone. Mi aŭskultas.

Zhou Chong: Panjo, (*Mistere*) ĉu vi ne kulpigos min?

Zhou Fanyi: Ne. Diru do!

Zhou Chong (*ĝoje*): Ho, panjo, (*Hezitas.*) pli bone rni silentu.

Zhou Fanyi (*ekridas*): Kial?

Zhou Chong: Mi, mi timas, ke tio malagrabiligos vin. Ĉu vi ankoraŭ ŝatos min, post mia konfeso?

Zhou Fanyi: Stultuleto, mi por ĉiam ŝatos vin.

Zhou Chong: Ĉu vere?

Zhou Fanyi: Certe.

Zhou Chong: Panjo, nun mi enamiĝis al iu knabino.

Zhou Fanyi (*ŝiaj suspekto kaj timo estas konfirmitaj*): Ho!

Zhou Chong (*renkontas la fiksan rigardon de la patrino*): Nu, panjo, via mieno ŝajne vidigas vian malaprobon.

Zhou Fanyi (*kapskuas*): Ne, absolute ne. Vi daŭrigu. (*Vigliĝas.*) Kiu estas tiu knabino?

Zhou Chong (*per neretenebla fervoro*): Ŝi estas la plej, la plej (jetas rigardon al la patrino), laŭ mi, ŝi estas la plej bona knabino en la mondo. Ŝi, bonkora kaj kompatema, konas feliĉon de la vivo kaj komprenas la signifon de laboro. Kaj plej grave estas, ke ŝi ne estas dorlotata.

Zhou Fanyi (*senzorge*): Mi scias, ke vi ŝatas klerigitajn knabinojn. Ĉu ŝi estas klera?

Zhou Chong: Ne, ŝi ne estas klerigita. Tio estas sia sola malfortaĵo, sed tio ne estas ŝia kulpo.

Zhou Fanyi: Oho, (*ŝiaj okuloj malheliĝas.*) Chong, ĉu vi aludas Sifeng?

Zhou Chong: Jes, panjo. Mi scias, ke oni mokos min, sed mi kredas, ke vi simpatias min.

Zhou Fanyi (*surpriziĝas kaj parolas en si mem*): Sed, mia infano...

Zhou Chong (*malpacienciĝas*): Ĉu vi malaprobas? Ĉu vi opinias, ke mi eraras?

Zhou Fanyi: Ne, ne. Tiel mi ne opinias, sed mi timas, ke tia knabino, kia ŝi, ne alportos al vi feliĉon.

Zhou Chong: Ne. Ŝi estas saĝa kaj simpatia, kaj komprenas min.

Zhou Fanyi: Ĉu vi ne timas, ke tio malagrabiligos vian patron?

Zhou Chong: Tio esters mia propra afero.

Zhou Fanyi: Kaj la aliaj mokridos vin?

Zhou Chong: Tion mi des pli ignoras.

Zhou Fanyi: Tia devas esti mia filo. Sed mi maltrankvilas, ke ŝi, neklerigita, estas homo de la malsupera klaso. Se vi ŝin ŝatas, kompreneble ŝi rigardas tion sia feliĉo.

Zhou Chong: Panjo, ĉu vi pensas, ke ŝi estas ventkapa?

Zhou Fanyi: Chong, kial vi alte taksas ĉiujn?

Zhou Chong: Panjo, mi pensas, ke tiaj vortoj ne decas por ŝi. Ŝi estas la plej pura kaj firmdecida knabino. Hieraŭ mi jam petis ŝian manon.

Zhou Fanyi (*en granda surpriziĝo*): Kio? Vi petis ŝian manon? (*Ekridas.*) Vi petis ŝian manon?

Zhou Chong (*malŝatas la sintenon de la patrino*): Ne ridu. Ŝi rifuzis min, tamen mi estas ĝoja, ĉar tio montras, ke ŝi estas pli nobla, kvankam ŝi **diris, ke ŝi ne volas edziniĝi al mi.**

Zhou Fanyi: Kio? Ŝi eĉ rifuzis vin?

Zhou Chong: Ĉu vi opinias tion hipokriteco? Ne, ŝi diris, ke ŝia koro estas okupita de alia homo.

Zhou Fanyi: Kiu?

Zhou Chong: Mi ne demandis. Certe estas ŝia najbaro, kiun ŝi ofte renkontas. Tamen vera amo ĉiam estas akompanata de zigzago. Mi amas ŝin. Pri tio ŝi komprenos iom post iom kaj certe donos sian manon al mi.

Zhou Fanyi (*neeltenebde*): Mia filo neniel prenu ŝin kiel sian edzinon.

Zhou Chong (*ekster atendo*): Kial, panjo? Ŝi estas bona knabino. Malantaŭ via dorso ŝi ĉiam montras respekton al vi.

Zhou Fanyi: Kion vi volas fari nun?

Zhou Chong: Mi diros ĉion ĉi al la patro.

Zhou Fanyi: Ĉu vi forgesas, kia homo estas via patro?

Zhou Chong: Mi nepre diros al li. Estontece eble mi ne edziĝos al ŝi. Mi daŭre respektos ŝin kaj volonte helpos ŝin, eĉ se ŝi ne ŝatos min. Tamen mi esperas, ke ŝi ricevos edukadon, kaj mia patro permesos al mi doni duonon de mia poreduka mono al ŝi por ŝia lernado.

Zhou Fanyi: Kia naiva knabo!

Zhou Chong (*ŝokite*): Panjo, mi jam ne estas infano.

Zhou Fanyi: Per nur unu vorto via patro senrevigos vin.

Zhou Chong: Mi ne kredas. (*Kun ĉagreniĝo*) Ni lasu tiun temon. Panjo, hieraŭ mi renkontis la fraton. Li diris al mi, ke li iros labori en la minejo kaj forveturos morgaŭ, kaj pro troa okupiteco li ne venos adiaŭi vin. Ĉu vi kulpigos lin?

Zhou Fanyi: Kial kulpigi lin?

Zhou Chong: Mi trovis, ke la rilatoj inter vi kaj la frato ne estas tiel intimaj kiel antaŭe. Panjo, vi nur pensu, ke de la infaneco mia frato perdis sian patrinon, kio tre facile strangigis lian karakteron. Mi pensas, ke lia patrino certe estis tre sentimentala, ĉar la frato ja estas tia homo.

Zhou Fanyi: Via patro estas hejme, kaj vi ne menciu la patrinon de via frato, alie via patro havos longan vizaĝon kaj malgajigos la tutan domon.

Zhou Chong: Panjo, nun la frato estas vere stranga. Li multe drinkas kaj ofte estas malbonhumora. Antaŭ 3 tagoj li ebriiĝis kaj, tenante miajn manojn, diris al mi, ke li malamas sin mem. Li diris ankaŭ multe da nekompreneblaj vortoj.

Zhou Fanyi: Hm.

Zhou Chong: Fine li subite diris, ke antaŭe li amis iun virinon, kiun li absolute ne devis ami.

Zhou Fanyi (*al si mem*): Antaŭe?

Zhou Chong: Kaj tuj poste li ploregis kaj devigis min foriri el lia ĉambro.

Zhou Fanyi: Kaj kion alian li diris?

Zhou Chong: Nenion plu. Li verŝajne estas tre soleca. Ankaŭ mi malĝojas por li, sed kial li ankoraŭ ne edziĝis?

Zhou Fanyi (*murmure*): Kiu scias? Kiu scias?

Zhou Chong (*aŭdas paŝbruon el ekstere kaj returnas sin*): Ho, mia frato venas.

Malfermiĝas la meza pordo, kaj eniras Zhou Ping. Li estas

28-jara, tre pals kaj pli altkreska ol sia frato. Lia vizaĝo estas bela. En liaj senbrilaj okuloj legiĝas hezitemo, malkuraĝo kaj kontraŭdiro. Li verŝajne pentas pri siaj antaŭaj eraroj. En nova impeto de la sento fervoro kaj pasio kiel tajdo refoje englutis lin. Lia minimuma prudento similas al velkiĝinta branĉo turniĝanta en akvokirlo. Tial eraroj unu post alia trafas lin. Li cagreniĝas kaj malamas sin mem. Li envias ĉiujn senskrupulajn homojn, kiuj aŭdacas fari ĉiajn malbonaĵojn. Kaj samtempe li envias ĉiujn kapablulojn fari grandan aferon kaj fariĝi “modela civitano” kaj “modela patriarko” laŭ la “moralo” de la mondumanoj. Li admiras sian patron, kiu en liaj okuloj estas senmanka viro malgraŭ ioma malcedemo kaj malvarmeco. Sed ankaŭ malcedemo kaj malvarmeco plaĉas al li, ĉar ili mankas al li. Li ne volas plu pensi la patron, kiu trompis lin. Li decidas sin “elsavi”. Li bezonas novan “amon” kaj liberigi sin el maldolĉeco de la “malnova amo”. Li trovis Lu Sifeng, kiu elspiras ĉion, kion li bezonas. Ŝi estas juna, bela kaj fervora, kaj ankaŭ iom maldelikata. Nun li abomenas ĉiujn tro melankolajn virinojn kaj ilian tro delikatan senton.

Tamen ia nekontenteco latentas en lia koro. Kiam li opinias, ke Sifeng ne komprenas nek simpatias lin, li nereteneble drinkas kaj diboĉas por serĉi ĝojon, dronante en nova ekscito.

En malhelblua robo, eŭropa pantalono kaj brilantaj ŝuoj, li oscedas kaj vidiĝas tre deprimita.

Zhou Chong: Frato Ping.

Zhou Ping: Estas vi, Chong.

Zhou Fanyi (trovas, ke Ping ŝin neglektas): Ping!

Zhou Ping: Ho, (mallevas la kapon kaj tuj levas.) Mi ne rimarlas, ke ankaŭ vi estas ĉi tie.

Zhou Fanyi: Mi ĵus malsupreniris.

Zhou Ping (al Zhou Chong): Ĉu la patro estas hejme?

Zhou Chong: Jes, ĉu vi volas vidi lin?

Zhou Ping: Mi volas interparoli kun li antaŭ mia foriro. (Rekte al la kabineto.)

Zhou Chong: Nun ne iru tien!

Zhou Ping: Pri kio li estas okupita?

Zhou Chong: Li probable diskutas kun vizitanto pri oficaĵaj aferoj. Ĵus mi vidis lin. Li diris, ke li baldaŭ venos ĉi tien kaj petis nin atendi lin ĉi tie.

Zhou Ping: Do mi revenu mian ĉambron kaj skribu leteron. (*Pretas foriri.*)

Zhou Chong: Ne iru. La patrino diris, ke ŝi ne vidis vin dum longa tempo. Ĉu estas bone, ke vi restu kun ni kaj iom babilu?

Zhou Fanyi: Ne ĝenu lin. Lasu lin foriri kaj ripozi, ĉar li ŝatas esti sola.

Zhou Ping (*iom pikita*): Ne ĉiam tiel estas. Mi pensas, ke vi havas multon por fari, kiam la patro estas hejme, kaj mi...

Zhou Chong: Ĉu vi ne scias, ke la patrino estas malsana?

Zhou Fanyi: Ĉu via frato degnas zorgi pri mia malsano?

Zhou Chong: Ej, panjo !

Zhou Ping: Ĉu vi sentas vin pli bone?

Zhou Fanyi: Dankon. Mi ĵus malsupreniris.

Zhou Ping: Jen mi pretas foriri al la minejo morgaŭ.

Zhou Fanyi: Ho, (*paŭzo*) Tre bone. — Kiam vi revenos?

Zhou Ping: Nun mi ne estas certa. Eble post 2 aŭ 3 jaroj. Ho, kiel sufoke ĉi tie.

Zhou Chong: La fenestro jam estas malfermita. Mi supozas, ke baldaŭ pluvegos.

Zhou Fanyi (*post paŭzo*): Kion vi faros en la minejo?

Zhou Chong: Panjo, ĉu vi forgesas, ke lia fako estas karbominologio?

Zhou Fanyi: Ĉu tio estas la motivo de via foriro, Ping?

Zhou Ping (*prenas la ĵurnalon*): Mi ne povas diri precize. Ŝajne mi enuiĝis pro tro longa restado hejme.

Zhou Fanyi (*ridete*): Mi pensas, ke vi ektimis.

Zhou Ping: Kion vi aludas?

Zhou Fanyi: Ŝajne vi forgesis, ke ĉi tiun ĉambron vizitis fantomoj.

Zhou Ping: Mi ne forgesis. Sed mi enuiĝis de tiu ĉi loko.

Zhou Fanyi (*ridetante*): Se mi estus vi, mi malŝatus ĉiujn ĉirkaŭajn homojn kaj forlasus ĉi tiun malbenindan lokon.

Zhou Chong: Vi ne tiel diru, panjo !

Zhou Ping (*melankolie*): Hm, mi ne sufiĉe malamas min mem, do kiel mi rajtas malŝati aliajn? (*Vespiras*) Chong, mi volas foriri.

La pordo de la kabineto malfermiĝas.

Zhou Chong: Ne foriru, eble la patro venas.

Voĉo de Zhou Puyuan: Faru laŭ mia ideo! Nun estas solvita la problemo. Bone, ĝis revido!

Larĝe malfermiĝas la pordo, kaj eniras Zhou Puyuan. Li estas 55-jara, grizhara. Glimbrilas liaj okuloj post la ovalaj or-framaj okulvitroj. Samkiel ĉiuj aliaj fondintoj de riĉa familio, li aspektas severa antaŭ la filoj. Sur la vizaĝo legaĝas arbitreco, memfido kaj obstineco. Li estas vestita en modo antaŭ 20 jaroj — atlasa robo kaj blanka silka ĉemizo. La kolumo malbutonumita. La pura vesto tre bone sidas sur li. Li estas graseta, ĝibeta. Liaj grizajharoj, brile kombitaj, montras lian antaŭan belecon. En la sunlumo lia vizaĝo aspektas arĝente pala. Oni diras, ke tio estas trajto de riĉuloj, jen kial li posedas tiel grandan minejon.

Zhou Ping kaj Zhou Chong: Saluton, paĉjo!

Zhou Chong: Ĉu foriris la gasto?

Zhou Puyuan (*kapjesas kaj turnas sin al Fanyi*): Kial vi malsupreniris hodiaŭ? Ĉu vi tute resaniĝis?

Zhou Fanyi: Mi ne estis grave malsana. Kiel vi fartas nun?

Zhou Puyuan: Bone. Vi devas ripozi supre. Chong, kiel vi opinias, ĉu via patrino aspektas pli bone ol antaŭe?

Zhou Chong: Fakte ŝi havas neniun gravan malsanon.

Zhou Puyuan (*ne ŝatas tiajn respondojn al li*): Kiu tion diris al vi? Ĉu vi ofte zorgis pri sia malsano dum mia foresto?(*Sidiĝas sur la kanapo.*)

Zhou Fanyi (*evitante lian denovan lecionon*): Puyuan, ŝajne vi iom maldikiĝi. Kiel statas nun la striko de la ministoj?

Zhou Puyuan: Hieraŭ matene oni jam denove komencis labori. Estas neniuj problemoj.

Zhou Chong: Paĉjo, kial Lu Dahai volas vidi vin ĉi tie?

Zhou Puyuan: Kiu estas Lu Dahai?

Zhou Chong: Duonfilo de Lu Gui. Li fariĝis mimsto antaŭ du jaroj kaj nun estas reprezentanto de la strikantoj.

Zhou Puyuan: Hm, li certe estas subinstigita, sed li jam estas eksigita.

Zhou Chong: Eksigita? Paĉjo, ĵus antaŭe mi interparolis kun li kaj trovis, ke li estas prudenta. La reprezentanto de la strikantoj ne nepre devas esti eksigita.

Zhou Puyuan: Hm. Ja estas moda afero por iuj junuloj interparoli kun labonstoj ka j diri kelke da simpatiaj vortoj.

Zhou Chong: Mi opinias, ke ni devas simpata lin, ĉar li penas fari bonon por

siaj kamaradoj. Estas maljuste, ke ni vivas feliĉe kaj deprenas de ili manĝaĵojn. La afero modon ne koncemas.

Zhou Puyuan (*levas la okulojn*): Kion vi scias pri la socio? Kiun libron pri soci-ekonomiko vi legis? Mi opinias, ke kiam mi studis en Germanio, mi ja havis multe pli profundan socian ideon ol vi.

Zhou Chong (*subigita*): Paĉjo, mi informiĝis, ke ĉi-foje la minejo donis neniom da kompensa mono al la vunditaj laboristoj.

Zhou Puyuan (*levas la kapon*): Mi pensas, ke vi jam diris sufiĉe multe. (*Turnas sin al Fanyi.*) Li fariĝas tute simila al vi en tiuj 2 jaroj. (*Rigardas horloĝon.*) Venos gasto post 10 minutoj. Kion vi havas pri viaj propraj aferoj?

Zhou Ping: Paĉjo, mi volas paroli kun vi.

Zhou Puyuan: Pri kio?

Zhou Ping: Mi planas iri al la minejo morgaŭ.

Zhou Puyuan: Ĉu vi jam finis la laboron en la oficejo de la kompanio?

Zhou Ping: Preskaŭ. Mi deziras, ke vi donu al mi konkretan laboron. Mi ne volas nur rigardi.

Zhou Puyuan (*paŭzas kaj rigardas lin*): Ĉu vi povas elteni penigan laboron? Faru ĝisfine, se vi komencos. Mi ne volas, ke aliaj klaĉos pri mia filo.

Zhou Ping: Tiujn du jarojn mi vivas ĉi tie tro komforte kaj vere volas iri en la kamparon.

Zhou Puyuan: Mi pripensu! (*Paŭzo*) Jes, vi povas ekiri morgaŭ. Koncerne vian oficon, mi sciigos vin telegrame post via alveno al la minejo.

Lu Sifeng eniras kun tetaso en la manoj.

Zhou Chong (*hezite*): Paĉjo.

Zhou Puyuan (*perceptas, ke li ree ion novan havas*): Oho, kio?

Zhou Chong: Mi volas interkonsiĝi kun vi pri io grava.

Zhou Puyuan: Pri kio?

Zhou Chong (*mallevas sian kapon*): Mi volas elpreni parton de mia poreduka mono.

Zhou Puyuan: Por kio?

Zhou Chong (*sin kuraĝigante*): Por doni al...

Sifeng prezentas la teon al Zhou Puyuan.

Zhou Puyuan: Sifeng, (*turnas sin al Zhou Chong*) nur momenton! (*Al Sifeng*)

Kie estas la tizano por la sinjorino?

Lu Sifeng: Jam preta.

Zhou Puyuan: Kial vi ne alportis?

Lu Sifeng rigardas Zhou Fanyi sen respondi.

Zhou Fanyi (*konscias la serioziĝon de la atmosfero*): Ŝi jam alportis al mi, sed mi ne prenis.

Zhou Puyuan: Kial? (*Paŭzas kaj al Sifeng.*) Kie la tizano?

Zhou Fanyi (*haste*): Ŝi forverŝis ĝin laŭ mia ordono.

Zhou Puyuan (*malrapide*): Forverŝis? (*Al Sifeng*) Ĉu ankoraŭ iom restas?

Lu Sifeng: Restas iomete en la vazo.

Zhou Puyuan: Prenu do ĉi tien!

Zhou Fanyi (*kontraŭstarante*): Mi ne volas tiun amaraĵon.

Zhou Puyuan (*al Sifeng*): Iru kaj prenu!

Lu Sifeng iras maldekstren kaj elverŝas la restajon el la vazo.

Zhou Chong: Paĉjo, kial vi devigas panjon, se ŝi ne volas?

Zhou Puyuan: Vi kaj via patrino ambaŭ ne scias, kie estas via malsano. (*Mallaŭte al Zhou Fanyi*) Trinku, kaj vi resaniĝos. (*Al Sifeng*) Donu al la sinjorino la tizanon!

Zhou Fanyi (*penas sin regi*): Bone, metu do ĉi tien!

Lu Sifeng metas la bovlon.

Zhou Puyuan (*neĝoje*): Pli bone vi trinku nun!

Zhou Fanyi (*subite*): Sifeng, portu ĝin for!

Zhou Puyuan (*subite severe*): Prenu ĝin! Ne estu tiel arbitra antaŭ la infanoj!

Zhou Fanyi (*per voĉo tremanta*): Mi ne volas.

Zhou Puyuan: Chong, donu la tizanon al via patrino!

Zhou Chong (*rezistante*): Patro!

Zhou Puyuan (*rigardas kolere*): Iru!

Zhou Chong devigite donas la tizanon al sia patrino.

Zhou Puyuan: Nu, petu ŝin preni!

Zhou Chong (kun la bovlo en la tremantaj manoj): Patro, ne estu tia!

Zhou Puyuan: Kion vi diris?

Zhou Ping (*iras antaŭ Zhou Chong kun mallevita kapo kaj mallauĝte*): Obeu la patron! Pri lia karaktero vi ja estas klara.

Zhou Chong (*kun larmoj en la okuloj, al la patrino*): Vi prenu, prenu iom por mi! Alie la patro ne kvietiĝos de kolero.

Zhou Fanyi (*petegante*): Mi prenu ĝin vespere, ĉu bone?

Zhou Puyuan (*malvarme*): Fanyi, estante patrino, vi devas pensi pri viaj infanoj ĉiam kaj ĉie. Se vi ne zorgas pri via propra sano, almenaŭ vi devas fari ekzemplon de obeo.

Zhou Fanyi (*rigardas Zhou Puyuan kaj poste Zhou Ping. Prenas la bovlon kaj tuj demetas ĝin*): Ne, mi ne volas.

Zhou Puyuan: Ping, vi petu ŝin preni!

Zhou Ping: Patro! Mi...

Zhou Puyuan: Iru kaj genuiĝu kaj petu ŝin!

Zhou Ping (*iras antaŭ Fanyi, rigardas al Zhou Puyuan, Petante indulgon*): Patro!

Zhou Puyuan (*laŭte*): Genuiĝu!

Zhou Ping rigardas Zhou Fanyi, kaj tiu larmas. Zhou Chong tremas de kolero.

Zhou Puyuan: Mi volas, ke vi genuiĝu!

Zhou Ping pretas genuiĝi.

Zhou Fanyi (*rigardante Zhou Ping, haste*): Mi prenas tuj.

(*Trinkas du glutojn. Larmoj ŝprucas el la okuloj. Ŝiaj rigardoj renkontas la severajn okulojn de sia edzo kaj la malĝojan vizaĝon de Zhou Ping. Englutinte indignon, ŝi eltrinkas unuspire.*) Ho! (*Plorante forkuras el la dekstra pordo.*)

Longa silento.

Zhou Puyuan (*rigardas la horloĝon*): Restas 3 minutoj. (*Al Zhou Chong*) Kion vi ĵus volis diri?

Zhou Chong (*levas la kapon kaj malrapide*): Kio?
Zhou Puyuan: Por kio vi volas elpreni parton de via poreduka mono?
Zhou Chong (*mallaŭte*): Neniun aferon mi havas nun.
Zhou Puyuan: Ĉu vere neniun freŝan problemon vi havas?
Zhou Chong (*plorante*): Neniun, neniun. — La patrino diris prave. (*Kuras al la manĝejo.*)
Zhou Puyuan: Chong, kien vi kuras?
Zhou Chong: Supren al mia patrino.
Zhou Puyuan: Ĉu tiamaniere?
Zhou Chong (*pene retenante sin, returniĝas*): Jes, patro. Mi foriras. Kion vi ankoraŭ ordonas?
Zhou Puyuan: Iru do!

Zhou Chong iras du paŝojn al la manĝejo.

Zhou Puyuan: Haltu!
Zhou Chong: Patro.
Zhou Puyuan: Transdiru al via patrino, ke mi jam invitis la germanan doktoron Kramer ĉi tien por ekzameni ŝin.
Zhou Chong: Sed ŝi jam prenis vian tizanon.
Zhou Puyuan: Ŝi estas anormala en la psiko. Ŝajnas, ke ŝi grave malsanas. (*Returnas sin al Zhou Ping.*) Laŭ mi, ankaŭ vi estas anormala.
Zhou Ping: Patro, mi volas ripozi.
Zhou Puyuan: Ne, vi ne iru. Mi havas ion diri al vi. (*Al Zhou Chong*) Diru al via patrino, ke doktoro Kramer estas fama fakulo de encefalopatio. Mi konatiĝis kun li en Germanio. Ŝi nepre lasu lin ekzameni. Ĉu vi aŭdis?
Zhou Chong: Jes. (*Faras du paŝojn.*) Ĉu nenion plu, patro?
Zhou Puyuan: Ne, nenion. Vi iru do!

Zhou Chong eliras tra la manĝejo.

Zhou Puyuan (*returnas sin al Lu Sifeng*): Sifeng, mi jam diris al vi, ke vi ne estu en ĉi ĉambro senkaŭze.
Lu Sifeng: Jes, via sinjora moŝto. (*Eliras tra la manĝejo.*)

Eniras Lu Gui el la kabineto.

Lu Gui (*sin fleksante*): Via sinjora moŝto, la gasto jam venis.

Zhou Puyuan: Invitu lin en la salonon!

Lu Gui: Jes, via sinjora moŝto. (*Eliras*)

Zhou Puyuan: Kiu malfermis la fenestron?

Zhou Ping: Frato kaj mi.

Zhou Puyuan: Fermu ĝin! (*Viŝas la okulvitrojn.*) Enlasu neniun subulon en ĉi ĉambro! Iom poste mi ripozos ĉi tie.

Zhou Ping: Jes.

Zhou Puyuan (*purigante la okulvitrojn, rigardas la meblojn ĉirkaŭe*): Plejparto de la mebloj en ĉi ĉambro estis ŝatata de via propra patrino. Malgraŭ transloĝiĝoj mi kunportis ilin. (*Surmetas la okulvitrojn kaj ektusas.*) Mi volas, ke la aranĝo de ĉi tiu ĉambro ĉiam havu la malnovan aspekton kiel antaŭ 30 jaroj. Tio min plezurigas. (*Malrapide iras al la tablo kaj rigardas la foton.*) Via patrino ŝatis, ke la fenestro estu fermita somere.

Zhou Ping (*kun afekta rido*): Sed, paĉjo, vi ne bezonas tiel fari, eĉ se por memori mian patrinon.

Zhou Puyuan (*subite levas la kapon*): Mi aŭdis, ke vi faris ion hontigan por vi mem.

Zhou Ping (*surprizite*): Kio?

Zhou Puyuan (*iras antaŭ Zhou Ping*): Via konduto estas hontiga por via patro. Ĉu vi scias? Kaj krome, (*Paŭzo*) ankaŭ hontiga por via patrino.

Zhou Ping (*konsternite*): Patro.

Zhou Puyuan (*ameme*): Vi estas mia unua filo, pro tio mi ne volas diri antaŭ aliaj. (*Post paŭzo, pli severe*) Mi aŭdis, ke en ĉi tiuj du jaroj dum mia foresto via konduto en la hejmo estas maldeca.

Zhou Ping (*pli konsternite*): Patro, ne, absolute ne.

Zhou Puyuan: Vi devas havi kuraĝon konfesi pri via faro.

Zhou Ping (*paliĝas*): Patro.

Zhou Puyuan: En la kompanio oni diris, ke vi ofte dronas en dancado. Precipe en la lastaj tri monatoj vi drinkas, hazard-ludas kaj forestas en la hejmo tutan nokton.

Zhou Ping: Ho. (*Trankviliĝas*) Ĉu vi aludas pri...

Zhou Puyuan: Ĉu tio estas vera? (*Post longa paŭzo*) Diru!

Zhou Ping: Jes, patro. (*Ruĝiĝas*)

Zhou Puyuan: Baldaŭ vi aĝos 30 jarojn kaj devas scii la memamon. Ĉu vi memoras, kial via persona nomo estas Ping?

Zhou Ping: Jes, mi memoras.

Zhou Puyuan: Diru do!

Zhou Ping: Ĉar mia patrino nomiĝas Shiping. Antaŭ sia forpaso ŝi donis al mi la nomon Ping.

Zhou Puyuan: Tial mi petas vin komplete ŝanĝi vian konduton ekde nun por via patrino.

Zhou Ping: Jes, mi obeas. Tio kaŭziĝis de momenta perdiĝo de la prudento.

Eniras Lu Gui el la kabineto.

Lu Gui: Sinjora moŝto, la gasto jam atendas longe.

Zhou Puyuan: Mi scias.

Lu Gui foriras.

Zhou Puyuan: Mi opinias mian familion la plej feliĉa kaj plej bonorda, kaj miajn filojn — perfektaj. Mi absolute ne volas, ke aliaj klaĉu pri la filoj edukitaj de mi.

Zhou Ping: Jes, paĉjo.

Zhou Puyuan: Homo! (*Al si mem*) Ho, mi laciĝis.

Zhou Ping helpas sian patron sidiĝi sur la kanapo. Lu Gui eniras.

Lu Gui: Sinjora moŝto.

Zhou Puyuan: Petu la gaston ĉi tien.

Lu Gui: Jes, via sinjora moŝto.

Zhou Ping: Paĉjo, vi ripozu.

Zhou Puyuan: Ne, vi ne zorgu pri tio! (*Al Lu Gui*) Nun iru alkonduki la gaston.

Lu Gui: Jes, via sinjora moŝto. (*Foriras.*)

Zhou Puyuan prenas cigaron. Zhou Ping bruligas ĝin por li, kaj Zhou Puyuan malrapide fumas, rekte sidante.

(La kurteno falas.)

DUA AKTO

Posttagmeze. Estas pli malhele kaj sufoke varme. La humida aero estas malbonhumoriga. Zhou Ping iras el la manĝejo. Li rigardas al la ĝardeno, silenta kaj senhoma. Li ŝtele iras al la pordo de la kabineto, en kiu estas neniu. Subite li rememoras, ke la patro estas parolanta kun la gasto. Trankviliĝinte, li iras al la fenestro, malfermas ĝin kaj rigardas al la malhele verdaj arboj. Li fajfas strangan signalon kaj vokas "Ŝifeng" kelkfoje permallaŭtigita voĉo.

Lu Sifeng senbrue eniras en la ĉambron.

Zhou Ping (*returnas sin, mallaŭte, varme*): Sifeng! (Prenas ŝiajn manojn.)

Lu Sifeng: Ne. (*Puŝas lin for.*) Ne estu tiel! (*Aŭskultas streĉite kaj rigardas ĉirkaŭen.*) Nu, rigardu, eble venas iu.

Zhou Ping: Neniu estas. Sifeng, sidiĝu. (*Li kondukas ŝin al la kanapo.*)

Lu Sifeng (*maltrankvile*): Kie estas la sinjora moŝto?

Zhou Ping: Li parolas kun la gasto en la salono.

Lu Sifeng (*sidiĝas, longe suspiras kaj rigardas*): Vi ĉiam tiel ŝtele kondutas.

Zhou Ping: Hm.

Lu Sifeng: Vi eĉ ne kuraĝas alparoli min.

Zhou Ping: Jen pro kio mi foriros de ĉi tie.

Lu Sifeng (*post momenta medito*): Mi vere kompatas la sinjorinon. Kial la sinjora moŝto boliĝas de kolero je la unua vidiĝo kun ŝi post sia hejmenreveno?

Zhou Ping: La patro ĉiam estas tia. Lia vorto ja esters leĝo kaj neŝanĝebla.

Lu Sifeng (*timeme*): Mi, rni tre timas.

Zhou Ping: Kion?

Lu Sifeng: Mi timas, ke la sinjora moŝto informiĝos pri nia afero. Vi ja diris, ke vi sciigos al li nian aferon.

Zhou Ping (*kapskuas, serzoze*): Tio ja ne esters timinda.

Lu Sifeng: Kio ankoraŭ pli?

Zhou Ping (*subite*): Ĉu vi ne aŭdis ion?

Lu Sifeng: Pri kio? (*Paŭzo*) Nenion mi aŭdis.

Zhou Ping: Koncerne min, ĉu vi vere nenion aŭdis?

Lu Sifeng: Nenion.

Zhou Ping: Kaj neniam?

Lu Sifeng (*nevole*): Neniam. Kion vi diris?

Zhou Ping: Do, nenio okazis, nenio.

Lu Sifeng (*sincere*): Mi fidas je vi kaj kredas, ke vi neniam trompos min estontece. Tio sufiĉas por mi. Ĝus mi informiĝis, ke vi morgaŭ iros al la minejo.

Zhou Ping: Pri tio mi jam diris al vi hieraŭ vespere.

Lu Sifeng (*senkaŝe*): Do kial vi ne kunportu min?

Zhou Ping: Ĉar... (*Ridas*) mi ne volas.

Lu Sifeng: Sed vi sciu, ke frue aŭ malfrue mi forlasos la laboron. Eble la sinjorino hodiaŭ maldungos min.

Zhou Ping (ekster sia atendo): Ŝi volas maldungi vin? Pro kio?

Lu Sifeng: Pri tio vi ne demandu!

Zhou Ping: Mi devas scii.

Lu Sifeng: Certe pro mia eraro. Mi pensas, ke eble ŝi ne havas tiun ideon. Eble tio esters mia misjuĝo. (*Paŭzo*) Ping, vi kunportu min, ĉu bone?

Zhou Ping: Ne.

Lu Sifeng (*tenere*): Ping, mi faros ĉion por via komforto. Vi bezonas mian servon. Mi faros vestojn kaj preparos manĝaĵojn por vi kaj mi nur bezonas esti ĉe vi.

Zhou Ping silentas.

Lu Sifeng: Mi estas certa, ke vi unusola ne povos resti longe ekstere.

Zhou Ping: Ĉu vi ne scias la kialon, ke mi ne povas preni vin kun mi? Ĉesigu vian infanan fantazion.

Lu Sifeng: Ping, kunportu min! Mi ne ĝenos vin. Ekstere, se iu ajn kalummos vin pro mi, mi tuj foriros de vi. Ping, ne timu!

Zhou Ping (*senpacience*): Sifeng, vi ne devas opinii min egoisma. Hm, kion mi timas? (*Perdas sinregon.*) En ĉi tiuj jaroj mia koro mortis. Mi malamas min mem. Nun mi akiris iom da vikleco kaj kuraĝas ami virinon. Ĉu mi ree timas la onidiron? Lasu ilin klaĉi, ke la unua filo de la familio Zhou enamiĝis al sia servistino. Kio timinda estas en tio? Mi ŝin amas.

Lu Sifeng (*konsole*): Ping, ne ĉagreniĝu! Mi neniom plendas kontraŭ vi. (*Meditas.*)

Zhou Ping (kvietiĝinte): Pri kio vi meditas?

Lu Sifeng: Li ripetis, kion li diris al mi antaŭ monato.

Zhou Ping: Li diris, ke li vin amas, ĉu?

Lu Sifeng: Ne. Li nur demandis, ĉu mi volas edziniĝi al li.

Zhou Ping: Kaj kiel vi respondis?

Lu Sifeng: Mi diris, ke mi jam fianĉiniĝis.

Zhou Ping: Ĉu li ne demandis plu?

Lu Sifeng: Ne. Sed li diris, ke li volantas pagi por mia lernejavizito.

Zhou Ping: Viziti lernejon? (*Ridas*) Idioto! Sed, kiu scias, eble vi ekĝojiĝis je lia promeso. Mi baldaŭ estos 30-jara, dum vi nur 18-jara. Kaj mia estonteco ne estas pli bela ol la lia. Cetere, mi faris multe da hontindaĵoj.

Lu Sifeng: Ping, ne diru sensencaĵon! Nun mi estas tre malĝoja pri ĉio ĉi. Vi devas doni ideojn por helpi min. Li ja estas knabo. Mi ne ŝatas, ke mi tiel afektante malserioze traktas lin. Sed vi ne permesas al mi malkaŝi al li la veron.

Zhou Ping: Mi neniam malpermesis al vi tion fari.

Lu Sifeng: Sed kian mienon vi havas, trovinte min kune kun li?

Zhou Ping: Estas nature, ke mi ne ĝojas, kiam mi vidas, ke mia amata knabino ofte estas apud iu alia, eĉ se tiu estas mia frato!

Lu Sifeng: Jen vi denove diras sensencaĵon! Kiel vi traktas min? Malkaŝe diru al mi!

Zhou Ping: Kiel mi traktas vin? (*Li ridas, kiam li rememoras, ke la saman demandon faris al li ankaŭ iu alia virino. Li opinias, ke ĉiuj virinoj estas stultaj.*) Vi volas, ke mi malkaŝe diru al vi? (*Ridas.*) Sed kion mi diru?

Lu Sifeng (*ĉagrenate*): Ping, vi ne tiel traktu min. Vi jam klare scias, ke mi apartenas al vi. Sed vi ankoraŭ min turmentas.

Zhou Ping (*ne ŝatas ŝiajn vortojn kaj pensas, ke ŝi iagrade miskomprenas lin*): Ho! (*Profunde suspiras.*) Ho, ĉielo!

Lu Sifeng: Vi scias, Ping, ke mia patro interesiĝas nur pri mia mono. Mia frato malestimas min, dirante, ke mi estas senaspira. Kaj mia patrino certe rompos la rilatojn kun mi, se ŝi informiĝos pri nia afero. Vi estas ĉio por mi. Ili eble forlasos min iutage, sed vi ne devas... (*Plorsingultas.*)

Zhou Ping: Sifeng, lasu min bone pripensi!

Lu Sifeng: Mia patrino plej ŝatas min. Ŝi ne volas, ke mi laboru kiel servistino en sinjora domo. Mi timas, ke ŝi informiĝos pri nia afero... Kaj se vi ne estas serioza pri la afero... tio certe korŝiros mian patrinon. (*Ploras.*) Kaj krome...

Zhou Ping: Ne suspektu min, Sifeng! Mi vizitos vin ĉi-vespere.

Lu Sifeng: Ne! Mia patrino venos hodiaŭ.

Zhou Ping: Ni do intervidiĝu ekstere, ĉu bone?

Lu Sifeng: Ne eble, ĉar mia patrino certe interparolos kun mi hodiaŭ vespere.

Zhou Ping: Sed mi forveturos morgaŭ matene.

Lu Sifeng: Ĉu vi decidis ne kunporti min?

Zhou Ping: Ho, infano, kiel mi povos tion fari?

Lu Sifeng: Do lasu min pripensi.

Zhou Ping: Nun mi foriru sola, kaj poste mi konfesos ĉion al la patro kaj venigos vin al mi.

Lu Sifeng (*rigardas lin en la okulojn*): Nu, bone. Venu do al mia hejmo ĉi-nokte. Mi supozas, ke mia ĉambro ne estos okupata en la noktomezo, ĉar la patro kaj patrino tranoktos en la antaŭĉambro, kaj la frato kutime ne tranoktas hejme.

Zhou Ping: Bone. Mi fajfos unue kiel kutime. Ĉu vi povos aŭdi?

Lu Sifeng: Se la afero iros glate, mi metos lampon sur la fenestrobreton. Se tie ne videblos lampo, vi nepre ne proksimiĝu al mia hejmo!

Zhou Ping: Ne?

Lu Sifeng: Tio signifas, ke mi ŝanĝis la decidon pro multe da gastoj hejme.

Zhou Ping: Bone, tute laŭ via aranĝo. Ni renkontigu je la 11-a horo.

Lu Sifeng: Bone, je la 11-a.

Lu Gui sursceniĝas de la meza pordo.

Lu Gui: Ha, (*al Lu Sifeng*) mi ja serĉas vin. (*Al Zhou Ping*) Bonan tagon, sinjorido Ping.

Lu Sifeng: Kion vi volas?

Lu Gui: Via patrino venis.

Lu Sifeng (*radias de ĝojo*): Ĉu? Kie ŝi estas?

Lu Gui: En la pordistejo, ĵus ŝi renkontiĝis kun via frato kaj interparolas kun li.

Lu Sifeng kuras al la meza pordo.

Zhou Ping: Sifeng, transdonu mian saluton al via patrino!

Lu Sifeng: Dankon! Ĝis revido! (Iran for.)

Lu Gui: Sinjorido Ping, morgaŭ vi forveturos, ĉu?

Zhou Ping: Jes.

Lu Gui: Mi akompanu vin al la stacio.

Zhou Ping: Ne, dankon.

Lu Gui: Vi ĉiam estas bonkora al mi. Dum via foresto mi kaj mia filino des pli sopiros je vi.

Zhou Ping (*ridas*): Ŝajne al vi ree mankas mono, ĉu?

Lu Gui: Vi ŝercas, via sinjorida moŝto. Mi ja diris la veron. Sifeng klare scias, ke mi ĉiam dankas vin malantaŭ via dorso.

Zhou Ping: Do, vi volas nenion, ĉu?

Lu Gui: Nenion. Sed mi havas bagatelan peton. Vi scias, ke la patrino de Sifeng venis. La sinjorina moŝto volas ŝin renkonti...

Lu Gui englutas siajn vortojn, vidante, ke Zhou Fanyi aperas el la manĝejo.

Lu Gui: Bonan tagon, sinjorino! Ĉu vi resaniĝis komplete?

Zhou Fanyi kapjesas.

Lu Gui: Mi ĉiam maltrankvilas pri via sano.

Zhou Fanyi: Bone, vi povas foriri.

Lu Gui riverencas al ŝi kaj foriras tra la meza pordo.

Zhou Fanyi (*al Zhou Ping*): Kien li iris?

Zhou Ping (*sen kompreno*): Pri kiu temas?

Zhou Fanyi: Via patro.

Zhou Ping: Li estas okupita kaj havas la gaston. Li venos baldaŭ. Kie estas mia frato?

Zhou Fanyi: Li iris for. Li scipovas nur plori.

Zhou Ping (*timas resti sola kune kun ŝi en la ĉambro*): Ho, (*paŭzo*) mi vojaĝos. Mi nun devas pretigi pakaĵojn. (*Iras al la manĝejo.*)

Zhou Fanyi: Minuton.

Zhou Ping haltas.

Zhou Fanyi: Mi petas, ke vi sidu kun mi por momento.

Zhou Ping: Por kio?

Zhou Fanyi (*moroze*): Mi volas paroli kun vi pri io. (*Zhou Ping iras al ŝi kaj staras silente.*)

Zhou Fanyi: Mi esperas, ke vi komprenas la ĵusan okazintaĵon. Tio jam ne estas la unuafoja.

Zhou Ping (*evitante*): La patro estas ĉiam tia. Kion li diras, tion oni devas plenumi.

Zhou Fanyi: Sed tio ne konformas al mia naturo. Mi ne volas vivi komplete laŭ alies volo.

Zhou Ping: Mi komprenas vin. (Ŝajnigas ridon.) Do lasu liajn vortojn preter viajn orelojn !

Zhou Fanyi: Ping, mi esperas, ke vi restos tiel honesta kaj bonkora kiel antaŭe. Mi ne ŝatas, ke vi prenu la teniĝon de malseriozeco kaj indiferenteco. Vi devas scii, kiel dolore mi suferas, kiam vi forestas de mi.

Zhou Ping: Jen kial mi tuj forveturos. Tiamaniere ni povos ne plu vidi unu la alian kaj ne rememongi la aferon, bedaŭrindan por ni ambaŭ.

Zhou Fanyi: Mi ne sentas bedaŭron. Mi neniam bedaŭras por mia faro.

Zhou Ping (*kontraŭvole*): Mi pensas, ke mi jam klare diris al vi, Mi pensas, ke vi komprenas la kialon, ke mi ne rendezuis kun vi dum la lastaj tagoj.

Zhou Fanyi: Komplete.

Zhou Ping: Do, mi estas nebulkapulo, perfekta stultulo. Mi bedaŭras, ke mi faris grandan eraron en mia vivo. Mi sentas honton antaŭ mi mem, antaŭ mia frato kaj precipe antaŭ mia patro.

Zhou Fanyi (en mallaŭta voĉo): Sed vi forgesas la homon, antaŭ kiu vi devas honti plej multe.

Zhou Ping: Pri kiu vi aludas?

Zhou Fanyi: Pri mi, via duonpatrino, la virino, kiun vi tentis.

Zhou Ping (*timante*): Ĉu vi freneziĝas?

Zhou Fanyi: Vi ŝuldas al mi. Vi havas respondecon pri mi ! Vi ne devas forkuri unusola, restiginte min ĉi tie.

Zhou Ping: Kiel terurajn vortojn vi diris. Estas maldece uzi tiajn vortojn en tiel respektinda familio, kia tiu de mia patro.

Zhou Fanyi (*furioziĝas de kolero*): “Patro”, “patro”, ĉesu paroli pri via patro ! “Respektinda”? Ĉu vi rajtas tion diri? (*Rikane*) Mi vivis jam 18 jarojn en via respektinda familio. La krimojn de via familio mi aŭdis, vidis kaj ankaŭ faris. Dekomence mi ne estas membro de la familio Zhou. Mi mem respondecas pri mia faro. Mi diferencas de via avo, lia frato kaj via patro, kiuj faris multe da malnoblaĵoj postdorse, sed antaŭ la publiko

ŝajnigas sin noblaj filantropoj kaj respektataj personuloj de la socio.

Zhou Ping: Certe ne ĉiuj en granda familio estas respektindaj, sed el nia branĉo...

Zhou Fanyi: Nenia diferenco. Via patro estas la unua hipokritulo. Antaŭ multe da jaroj li delogis junulinon de malaltaklaso.

Zhou Ping: Ĉesigu vian babilaĉon!

Zhou Fanyi: Vi ja estas bastardo de via patro.

Zhou Ping (*surprzite kaj konsternite*): Vi mensogas. Kiun ateston vi havas?

Zhou Fanyi: Demandu vian respektindan patron! Li malkaŝis ĉion al mi antaŭ 15 jaroj, kiam li ebriiĝis. (*Montras La foton sur la tablo.*) Vi ja estas naskita de tiu ĉi junulino. Ŝi dronigis sin en rivero, ĉar via patro forĵetis ŝin.

Zhou Ping: vi, vi, vi — jes. (Ŝajnigas sin ridanta.) Mi konfesas ĉion ĉi. Nu, kion vi volas ankoraŭ? Kion vi volas diri al mi?

Zhou Fanyi: Via patro estas ŝulda al mi. Per la sama artifiko li trompe akiris min. Mi ne sukcesis fugi kaj naskis Chong. Dum tiuj dekelke da jaroj liaj krueleco kaj aroganteco, kiujn li montris antaŭtagmeze, ŝtonigis min. Subite vi venis el la hejmloko kaj faris min nek via duonpatrino, nek via konkubino. Estas vi, kiu delogis min.

Zhou Ping: Delogi? Mi petas vin ne uzi ĉi vorton. Ĉu vi ne memoras la tiamajn cirkonstancojn?

Zhou Fanyi: Ĉu vi forgesas, kion vi diris al mi ĉi tie, ĝuste en ĉi tiu ĉambro, en noktomezo? Vi diris, ke vi malamas vian patron, ke vi esperas lian morton. Vi diris, ke vi ne bedaŭros eĉ mortpunon pro via amo al mi.

Zhou Ping: Ne forgesu, ke tiam mi estis juna. Mi senprudentiĝis pro impulso.

Zhou Fanyi: Ne forgesu, ke kvankam mi pli aĝas ol vi nur je kelkaj jaroj, mi estas via duonpatrino. Ĉu vi scias, ke vi ne devis diri tion al mi?

Zhou Ping: Ĉu vi ne pardonas junulon, kiu faris erarojn pro stulto? (*Li sulkigas la brovojn de malĝojo.*)

Zhou Fanyi: Tio ne koncernas pardonon. Mi jam rezignaciis al mia sorto. Ĝuste tiam aperis homo, kiu revivigis min, sed tiu poste apudmetis min, velkigis kaj soifigis min ĝis morto. Diru, kion mi devas fari?

Zhou Ping: Ej, ankaŭ mi ne scias, vi mem diru!

Zhou Fanyi (*martelas vorton post vorto*): Mi volas, ke vi ne foriru.

Zhou Ping: Kio? Ĉu vi deziras, ke mi akompanu vin en tia familio ka j ĉiutage rememoru pyi nia krimo kaj mortu de sufokiĝo?

Zhou Fanyi: Kial vi hastas foriri unusola kaj lasas min ĉi tie, se vi estas klara

pri ĉio ĉi?

Zhou Ping: Vi ne rajtas tiel diri. Vi estas patrino de mia frato Chong.

Zhou Fanyi: Ne! Ne! De post kiam mi donis mian vivon kaj mian reputacion al vi, mi jam ne zorgas pri ĉio alia. Ne, mi ne estas lia patrino, nek edzino de Zhou Puyuan.

Zhou Ping (*malvarme*): Se vi ne rigardas vin edzino de mia patro, mi ankoraŭ rekonas min lia filo.

Zhou Fanyi (*Silentas momenton, ne atendente ke li tiel diris*): Ha, vi estas lia filo. Ĉu vi ne vizitis min en tiuj tagoj pro timo al via patro?

Zhou Ping: Eble oni povas tiel opinii.

Zhou Fanyi: Kaj ĉi-foje vi foriros al la minejo ĝuste por imiti lian modelon kaj forlasi la homon, kiu vin komprenas kaj amas, ĉu ne?

Zhou Ping: vi povas tiel pensi.

Zhou Fanyi (*malvarme*): Jen, vi vere estas filo de via patro. (*Ridas.*) La filo de la patro. (*Subite aplombiĝas.*) Fi! vi ambaŭ estas same sentaŭgaj kaj malkuraĝaj kaj tute ne indas je alies sinofero. Mi bedaŭras, ke mi ne travidis vin pli frue!

Zhou Ping: Nun vi jam travidis min. Mi jam diris al vi mian bedaŭron. Mi jam detale eksplikis al vi, ke mi abomenas tiajn rilatojn inter vi kaj mi. Mi jam sciigis vin, ke mi abomenas. Miajn erarojn mi konas. Tamen vi ne estas tute senkulpa. Vi estas virino, laŭ mi, la plej saĝa kaj plej simpatia, kaj ĝuste pro tio mi kredas, ke vi pardonos min. Se vi riproĉas, ke mi estas malserioza aŭ senkonscienca, tion mi ne zorgas. Mi esperas, ke la nuna interparolo estos la lasta por ni ambaŭ. Jen mia sinteno. (*Iras al la manĝejo.*)

Zhou Fanyi (*per peza voĉo*): Momenton!

Zhou Ping haltas.

Zhou Fanyi: Mi esperas, ke vi komprenos miajn vortojn. Mi petas nenion de vi. Mi esperas, ke vi pripensos, kion ni diris antaŭe en ĉi tiu ĉambro. (Paŭzas, kun ĉagreniĝo.) Pripensu, kion ni diris unu al la alia. Memoru, ke neniu virino devas esti humiligita de du generacioj.

Zhou Ping: Mi jam sufiĉe pripensis. Kredeble vi ne estas surda al miaj suferoj en la lastaj tagoj. Nu, permesu al mi foriri. (Li malaperas el la maĝejo.)

Zhou Fanyi sekvis Zhou Ping per la okuloj. Larmoj fluas el

ŝiaj okuloj. Ŝi klinas sian vizaĝon sur la kanapo kaj esploras.

Lu Gui enŝteliĝas de la meza pordo kaj rimarkas la plorantan Zhou Fanyi.

Lu Gui (*mallaŭte*): Sinjorino!

Zhou Fanyi (*stariĝas*): Kion vi volas?

Lu Gui: Mia edzino venis jam antaŭ longe.

Zhou Fanyi: Kiu?

Lu Gui: Mia edzino. Vi ordonis venigi ŝin ĉi tien, tion mi memoras.

Zhou Fanyi: Kial vi ne sciigis min pli frue?

Lu Gui: Mi ja memoras, (*mallaŭtigas sian voĉon.*) sed mi vidis, ke vi interparolas kin sinjorido Ping, tial mi ne kuraĝis vin ĝeni.

Zhou Fanyi: Ho, ĵus vi...

Lu Gui: Mi? Mi servis al la sinjoro kaj lia gasto en la ĉefa salono. (*Ŝajnigas sin nekomprena.*) Sinjorino, kion vi volas?

Zhou Fanyi: Petu do ŝin ĉi tien.

Lu Gui (*kaŝole ridas*): Mia edzino estas de la malsupera klaso kaj ne scias ĝentilecon. Vi estu pardonema.

Zhou Fanyi: Ni ĉiuj estas samaj. Mi nur volas renkontiĝi kaj iom babili kun ŝi.

Lu Gui: Dankon pro via degno. Ho, mi rememoras, sinjorino, la sinjoro ordonis transdiri al vi pretigi lian malnovan pluv-mantelon, ĉar eble falos pluvego.

Zhou Fanyi: Sifeng zorgas pri liaj vestoj. Ĉu ŝi ne povas tion fari?

Lu Gui: Ankaŭ mi tiel diris sciante, ke vi sentas vin ne sana, sed la sinjoro insistas, ke vi pretigu ĝin.

Zhou Fanyi: Do iom poste.

Lu Gui: La sinjoro ordonis, ke li bezonas ĝin nun. Eble li baldaŭ eliros.

Zhou Fanyi: Bone. Mi faros tion tuj. Venigu vian edzinon kaj petu ŝin atendi ĉi tie.

Lu Gui: Jes, sinjorino. (*Eliras.*)

La vizaĝo de Zhou Fanyi aspektas pli pala. Ŝi pene regas sin.

Zhou Fanyi (*profunde enspiras kaj parolas al si mem*): Ho, terure varme, tenure sufoke! Vere neelteneble! (*Ŝi apatie rigardas tra la fenestro.*)

Eniras Lu Gui.

Lu Gui: La siujoro sendis preni la pluvmantelon. Li bezonas ĝin tuj.

Zhou Fanyi (*levas sian kapon*): Bone, vi ne bezonas atendi. Mi sendos ĝin tuj per iu alia. (Ŝi eliras tra la manĝejo.)

Lu Gui eliras tra la meza pordo.

Post momento Lu Shiping eniras kune kun Sifeng. Shiping estas virino 46 – 47-jara. Inter ŝiaj haroj vidiĝas iom da grizaj haroj. Ŝia vizaĝo blanka kaj pura aspektigas ŝin ne pli ol 38-39 jara. Ŝia rigardo estas iom malvigla. Tamen el ŝiaj longaj belaj okulharoj kaj grandaj rondaj okuloj oni povas legi la ĉarmon dum ŝia juneco. Vestita mallukse kaj pure, ŝi tre similas al virino de dekadencinta familio.

Sur ŝia kapo estas blanka lavtuko. Ŝi parolas ĉiam klare kaj ridetante, en mallaŭta senhasta voĉo. Ŝia akento montras, ke ŝi estas sudano longe vivinta norde. Kiam ŝi ridas, vidiĝas ŝiaj perlaĵdentoj kaj paro da ĉarmaj kavetoj ĉe ŝiaj lipanguloj.

Ŝi eniras, tenante la manon de sia filino, kiu intime apogas sin al ŝi. Lu Gui sekvas post ili.

Lu Sifeng: Kie estas la sinjorino?

Lu Gui: Ŝi tuj venos.

Lu Sifeng: Sidiĝu, panjo !

La Shiping sidiĝas.

Lu Sifeng: Ĉu vi laciĝas?

Lu Shiping: Ne.

Lu Sifeng (*ĝoje*): Nu, panjo, atendu iom. Mi prenu por vi glason da glacia akvo.

Lu Shiping: Ne, estu trankvila, mi ne sentas varmon.

Lu Gui: Prenu botelon da sodakvo, Sifeng! (*Al sia edzino*) Kio mankas en tia granda domo? Somere estas limonado, frukta suko, akvomelono, oranĝo, banano kaj freŝa licio. Kion vi volas, tion vi trovas.

Lu Shiping: Ne, ne aŭskultu vian patron. Ĉiuj tiuj aferoj estas alies objektoj. Estas pli bone, ke vi sidu apud mi, kaj poste mi interparolu kun sinjorino Zhou.

Lu Gui: La sinjorino baldaŭ malsupreniros. Jen, via blanka kaptuko. Vi ĉiam ne volas demeti de sur la kapo.

Lu Shiping (*kun afabla rideto*): Bone, bone. Mi ensorbiĝis en la parolo... (*Kun rideto al Sifeng*) kaj tute forgesis demeti ĝin. (*Ŝi demetas la kaptukon.*) Ĉu mia vizaĝo estas malpura? Estis granda polvo en la vagono. Ĉu miaj haroj en ordo? Mi ne volas, ke aliaj ridas je mi.

Lu Sifeng: Ne, tute ne. Vi neniom ŝangiĝis dum tiuj du jaroj.

Lu Gui (*malestime*): Rigardu, kiel povre vi kondutas! Rigardu, kiel luksa estas ĉi tiu domo. Ne plu babilu! Sifeng, montru al via patrino viajn vestojn faritajn en la pasintaj du jaroj!

Lu Sifeng: La panjo ne interesiĝas pri ili.

Lu Gui: Do montru viajn ormanaĵojn al via patrino, por ke ŝi havu pli larĝan vidkampon. Lasu ŝin juĝi, ĉu mi aŭ ŝi estas prava?

Lu Shiping (*al Lu Gui*): Mi atentigis vin ĉe mia foriro kaj ripetadis en miaj leteroj, ke mi ne ŝatas, ke mia filino estu servistino. Sed vi... (Subite konscias, ke ĉi tie ne estas loko por diskuti pri la familiaj aferoj kaj returnas sin al Sifeng.) Kie estas via frato?

Lu Sifeng: Ĉu li ne atendas nin en la pordistejo?

Lu Gui: Li atendas ne vin, sed la sinjoron. (*Al Shiping*) Lastjare mi petis sciigi vin, ke Dahai akiris laboron en la minejo dank' al mia rekomendo.

Lu Sifeng (*sentas abomenon pro la fanfarono de la patro*): Patro, kien vi ensaltas? Iru rigardi mian fraton!

Lu Gui: Ve al li. Mi tute forgesis lin. (*Iras al la meza pordo kaj returnas sin.*) Vi sidu ĉi tie kaj ne moviĝu. La sinjorino baldaŭ venos. (*Iras for.*)

Post foriro de Lu Gui, Lu Shiping kaj Lu Sifeng sentas sin multe pli senĝene. Kun rideto ili ĵetas melankolian rigardon unu al la alia.

Lu Shiping (etendas siajn manojn al Sifeng): Lasu min pririgardi vin!

Lu Sifeng proksimiĝas al sia patrino.

Lu Sifeng: Ĉu vi ne koleras kontraŭ mi, panjo?

Lu Shiping: Ne, farita, finita. Sed kial vi neniam menciis tion al mi? Pri tio mi informiĝis de onklino Zhang nur post mia hejmenreveno.

Lu Sifeng: Mi timas, ke vi koleros kontraŭ mi, tial mi ne kuraĝas sciigi al

vi. Efektive, panjo, nenio malbona estas, ke mi estas servistino.

Lu Shiping: Ĉu vi pensas, ke mi timas esti malriĉa kaj hontas pro nia malriĉo? Ne! Neniom! Via patrino tion tute malatentas. Sed mi ofte maltrankvilas pro via juneco kaj timas, ke vi eliros el prudento. (*Vespiras.*) Nu, lasu tion! (*Stariĝas.*) Pro kio la sinjorino volas renkonti min? Strange!

Lu Sifeng: Jes. (Teruro kaptas ŝin, tamen ŝi instinkte kondukas sin al la bona rezulto.) La sinjorino havas malmulte da amikinoj ĉi tie. Ŝi informiĝis, ke vi scipovas skribi kaj legi, kaj eble ŝi opinias, ke interese estas interparoli kun vi.

Lu Shiping: Ĉu? (*Ŝi malrapide pririgardas la meblaron en ĉi tiu ĉambro kaj montras la malnovan ŝrankon kun spegulo.*) La ĉambro estas eleganta, sed la mebloj iom malnovaj.

Lu Sifeng: Jes, la mebloj estas de pli ol 30 jaroj. Oni diras, ke ili estis ŝatataj de la unua edzino de la sinjoro, t. e. la patrino de sinjorido Ping. Rigardu, kiel pezaj ili estas!

Lu Shiping (*deviŝas ŝviton de la frunto per tuko*): Strange. Kial la fenestro estas fermita?

Lu Sifeng: Ankaŭ vi opinias tion stranga? Stranga estas la karaktero de nia sinjoro. Li tre emas fermi la fenestron somere.

Lu Shiping (*penas rememori*): Sifeng, ŝajnas al mi, ke mi ie vidis ĉi tiun ĉambron.

Lu Sifeng (*ridas*): Ĉu vere? Eble en sonĝo vi vidis ĝin pro sopiro al mi.

Lu Shiping: Ho, jes, tute kvazaŭ en sonĝo. Sed strange estas, ke la loko ŝajnas tre konata. (*Mallevas la kapon.*)

Lu Sifeng (*konsternite*): Panjo, ĉu vi sentas vin malbona? Ĉu vin atakis sunfrapo? Mi prenu glason da malvarma akvo por vi, ĉu bone?

Lu Shiping: Ne, ne. Vi tion ne faru!

Lu Sifeng: Kio okazas al vi, panjo?

Lu Shiping (*atenteme rigardas ĉion en la ĉambro kaj dronas en meditado*): Strange! (*Etendas la manojn kaj kaptas Sifeng.*) Sifeng!

Lu Sifeng (*palpas la manojn de sia patrino*): Viaj manoj estas glacie malvarmaj, panjo.

Lu Shiping: Ne gravas. Mi sentas min bone. Ŝajnas, ke mia animo iam estis ĉi tie.

Lu Sifeng: Ne diru sensencaĵon, panjo! Kiel vi povus esti ĉi tie? Ili transloĝiĝis ĉi tien antaŭ 20 jaroj, kiam vi estis en la sudo.

Lu Shiping: Ne, mi vere estis ĉi tie. Tiujn meblojn — mi vidis ie antaŭe, sed

mi ne memoras, kie.

Lu Sifeng: Kion vi rigardas, panjo?

Lu Shiping: Tiun ŝrankon, tiun ŝrankon. (*Ŝi diras pli kaj pli mallauĉe kaj penas rememori.*)

Lu Sifeng: Ĝi, ĝi estas ŝranko de la forpasinta sinjorino.

Lu Shiping (*al si mem*): Ne, ne eblas.

Lu Sifeng (*amplene al sia patrino*): Ne diru plu, panjo. Vi ripozu!

Lu Shiping: Nenio grava, ĵus mi aŭdis ĉe la pordistejo, ke en tiu familio estas du sinjoridoj, ĉu vere?

Lu Sifeng: Jes, ambaŭ estas afablaj, panjo, ĉiuj en la familio Zhou estas afablaj.

Lu Shiping: Zhou? La familia nomo estas Zhou?

Lu Sifeng: Ho, panjo, vi ja venis ĉi tien serĉante laŭ la adreso de la familio Zhou, kiel vi povus forgesi? Panjo, vi certe suferis de varmego survoje. Mi prenu akvon por vi. (*Preterpasas la ŝrankon.*) Panjo, rigardu, tio ja estas foto de la unua sinjorino de la familio Zhou. (*Donas la foton al sia patrino, starante post ŝi.*)

Lu Shiping (*rigardante la foton*): Ho! (*Surpriziĝas de mirego.*)

Lu Sifeng (*starante post la patrino*): Kiel bela ŝi estas! Ŝi ja estas patrino de sinjorido Ping. Oni diras, ke ŝi iom similas al mi. Ho, bedaŭrinde, ŝi jam mortis.

Tremas la manoj de Lu Shiping tenantaj la foton.

Lu Sifeng: Panjo!

Lu Shiping: Donu al mi akvon!

Lu Sifeng: Panjo, iru ĉi tien! (*Kondukas ŝin al to kanapo, subtenante sian patrinon je la brako.*)

Lu Shiping ankoraŭ tenas la foton en sia mano.

Lu Sifeng: Panjo, kuŝu ĉi tie! Mi prenu akvon por vi. (*Kuras for el la pordo de la manĝejo.*)

Lu Shiping: Ho, mia ĉielo! Mi estas homo mortinta! Ĉu tio estas vera? Ho, ĉi foto, ho ĉi tiuj mebloj! La mondo estas vasta, red kial post dekoj da jaroj mia mizera infano venis en lian hejmon? Ho, ĉielo!

Lu Sifeng eniras kun akvo.

Lu Sifeng: Panjo, trinku!

Lu Shiping trinkas.

Lu Sifeng: Panjo, ĉu vi sentas vin pli bone?

Lu Shiping: Jes, pli bone. Mia infano, ni iru hejmen nun.

Lu Sifeng (*mire*): Kio okazas al vi, panjo?

Aŭdiĝas la voko de Zhou Fanyi el la manĝejo pri Sifeng.

Lu Sifeng (*aŭskultas*): Venas la sinjorino.

Voĉo de Zhou Fanyi: Sifeng!

Lu Sifeng: Jes, mi estas!

Voĉo de Zhou Fanyi: Venu ĉi tien, Sifeng! Kien vi metis la pluvmantelon de la sinjoro?

Lu Sifeng (*per laŭta voĉo*): Mi venas tuj. (*Al sia patrino*) Vi atendu, panjo. Mi tuj revenos.

Lu Shiping: Vi iru!

Lu Sifeng iras for. Lu Shiping rigardas ĉirkaŭen kaj iras al la ŝranko. Subite aŭdiĝas paŝbruo el la ĝardeno. Ŝi returnas sin kaj atendas.

Lu Gui aperas el la meza pordo.

Lu Gui: Kie estas Sifeng?

Lu Shiping: La sinjorino elvokis ŝin.

Lu Gui: Diru al la sinjorino, ke la sinjoro jam ne bezonas la pluvmantelon. Li venos ĉi tien por ion diri al ŝi.

Lu Shiping: La sinjoro venos ĉi tien?

Lu Gui: Jes. Vi klare sciigu al ŝi. La sinjoro koleriĝos, se la sinjorino ne estos ĉi tie ĉe lia alveno.

Lu Shiping: Vi mem sciigu al la sinjorino.

Lu Gui: Mi estas tre okupita de la labordivido por ĉiuj servistoj. Mi ne havas tempon atendi.

Lu Shiping: Mi iros hejmen kaj ne plu atendas la sinjorinon.

Lu Gui: Pro kio? Ŝi alvokas vin ĉi tien, eble por diskuti kun vi pri io grava.

Lu Shipping: Mi intencas rezigni Sifeng je la servistina laboro kaj kunporti ŝin hejmen.

Lu Gui: Kio? Kial vi volas tion?

Aperas Zhou Fanyi el la manĝejo.

Lu Gui: Sinjorino!

Zhou Fanyi (*al la pordo*): Sifeng, vi prenu du pluvmantelojn kaj demandu, kiun el ili la sinjoro bezonas? (*Al Shipping*) Ĉu vi estas patrino de Sifeng? Pardonon, ke mi atendigis vin longe.

Lu Gui: Ŝi devas tion fari. Estas ja granda honoro por ŝi, ke via sinjorina moŝto permesas al ŝi veni por saluti vin.

Lu Sifeng eniras kun pluvmanteloj en la manoj.

Zhou Fanyi: Vi longe atendis. Sidiĝu!

Lu Shipping (*pririgardas Zhou Fanyi, sed ne sidiĝas*): Ne, nur momenton, sinjorino.

Lu Sifeng: Ĉu mi portu tiujn tri pluvmantelojn al la sinjoro?

Lu Gui: La sinjoro ordonis meti ilin ĉi tien kaj li mem venos preni. Li ankaŭ petas vin, sinjorino, atendi ĉi tie, ĉar li volas ion diri al vi.

Zhou Fanyi: Mi scias. (*Al Sifeng*) Vi iru en la kuirejon kaj sciigu prepari la vespermanĝon.

Lu Sifeng: Jes, sinjorino. (*Ŝi ĵetas rigardon al Lu Gui kaj poste miran kaj timeman rigardon al Zhou Fanyi kaj eliras el la meza pordo.*)

Zhou Fanyi: Lu Gui, diru al la sinjoro, ke mi estas interparolanta ĉi tie kun la patrino de Sifeng, kaj li venu iom poste.

Lu Gui: Jes, sinjorino. (*Sed li ne movas sin.*)

Zhou Fanyi (*vidante, ke li ankoraŭ restas tie*): Kion vi ankoraŭ bezonas diri?

Lu Gui: Sinjorino, ĉi-matene la sinjoro ordonis venigi la germanan doktoron ĉi tien.

Zhou Fanyi: Sinjorido Chong jam diris al mi.

Lu Gui: La sinjoro ĵus diris, ke vi vizitu la kuraciston tuj post lia alveno.

Zhou Fanyi: Mi scias. Vi povas foriri.

Lu Gui iras for tra la meza pordo.

Zhou Fanyi (*al Lu Shiping*): Sidiĝu! Estu kiel hejme. (*Ŝi mem sidiĝas sur la kanapo.*)

Lu Shiping (*sidiĝas sur la apuda seĝo*): Tuj post mia elvagoniĝo, oni diris al mi, ke vi volas renkonti min.

Zhou Fanyi: Mi ofte aŭdis de Sifeng, ke vi estas klera kaj de bona familio.

Lu Shiping (*ne volas tuŝi la pasintajn aferojn*): Sifeng estas knabino malsaĝa kaj neinteligenta. Ŝi certe kaŭzis al vi multe da zorgoj dum tiuj du jaroj.

Zhou Fanyi: Ne. Ŝi estas tre saĝa kaj ankaŭ tre plaĉa al mi. Ŝi ne devas esti servistino. Estas bone trovi decan laboron por ŝi.

Lu Shiping: Mi samopinias kun vi. Ankaŭ mi ne volas, ke ŝi estas servistino.

Zhou Fanyi: Mi bone komprenas vin. Mi scias, ke vi estas homo instruita kaj prudenta, kaj je la unua rigardo mi jam scias, ke vi estas malkaŝema. Tial mi senkaŝe diru al vi, kial mi invitas vin.

Lu Shiping (*maltrankvile*): Ĉu ŝia konduto vekis alies malkontenton?

Zhou Fanyi (*ridas, ŝajnigante neadon*): Ne, ne. Unue mi prezentu al vi la staton de mia familio, kie virinoj estas malmultaj.

Lu Shiping: Jes.

Zhou Fanyi: Estas la sinjoro kaj du sinjoridoj. Krom mi kaj unu-du maljunaj servistinoj, ĉiuj servistoj estas viroj.

Lu Shiping: Ho, jes.

Zhou Fanyi: Sifeng estas juna. Ŝi estas nur 19-jara, ĉu?

Lu Shiping: 18-jara.

Zhou Fanyi (*afable*): Ho, jes. Ŝi estas pli aga ol mia filo je unu jaro. Estante tiel juna kaj bela, ŝi laboras kiel servistino.

Lu Shiping (*urĝe*): Kian maldiskretaĵon ŝi faris? Sinjorino, vi neniel kaŝu al mi, mi petas.

Zhou Fanyi: Ne, ne. (*Ridas denove.*) Ŝi ja estas bona. Mi nur volas sciigi pri la familia stato. Mi havas filon 17-jaran. Verŝajne vi lin renkontis en la ĝardeno. Li estas knabo naiva.

Lu Gui aperas el la kabineto.

Lu Gui: La sinjoro urĝas vin tuj al la doktoro.

Zhou Fanyi: Ĉu neniuj akompanas la doktoron?

Lu Gui: La Buroestro Zhang foriris antaŭ momento, kaj la sinjoro mem akompanas lin.

Zhou Fanyi: Diru al la sinjoro, ke mi ne havas malsanon kaj ne invitis

kuraciston.

Lu Gui: Jes, sinjorino. (*Sed ne moviĝas.*)

Zhou Fanyi (*rigardas Lu Gui*): Kion vi volas plu?

Lu Gui: Mi atendas vian plian ordonon.

Zhou Fanyi (*subite rememoras*): Jes, post transdiro de miaj vortoj al la sinjoro, vi sendu voki elektriston. Oni diris al mi, ke la malnova elektra drato sur la visteria pergolo falis kaj likas. Tuj venigu ripari, alie estiĝos elektra frapo.

Lu Gui eliras el la meza pordo.

Zhou Fanyi (*vidas, ke Lu Shiping stariĝas*): Onjo Lu, sidiĝu! Ho, ree sufoke varmiĝas ĉi tie. (*Venal al la fenestro kaj malfermas ĝin, returnas sin.*) En la lastaj tagoj mi trovis, ke mia filo kondutas strange. Kiu scias, li subite diris al mi, ke li tre ŝatas Sifeng.

Lu Shiping (*surprizite*): Ĉu?

Zhou Fanyi: Li volas monhelpi ŝin por ke ŝi vizitu lernejon. (*Ekridas.*) Ho, kiel stulta knabo, li eĉ diris, ke li edziĝos al ŝi.

Lu Shiping: Vi ne bezonas diri plu. Ĉion mi komprenas.

Zhou Fanyi: Sifeng estas pli aĝa ol mia filo, kaj ŝi estas tre inteligenta. En tia stato...

Lu Shiping (*ofendiĝas de la ambigua paroltono de Zhou Fanyi*): Mi kredas, ke mia filino estas diskreta kaj povas distingi pravon disde malpravo. Mi ĉiam malaprobas, ke ŝi servu en granda domo. Mi fidas al ŝi, kaj ŝi faros nenian malprudentaĵon.

Zhou Fanyi: Jes, onjo Lu. Ankaŭ mi estas certa, ke ŝi estas diskreta. Sed nun tiu malfeliĉa situacio, laŭ mi, facile kaŭzos miskomprenon.

Lu Shiping (*suspiras*): Estas tute ekster mia atendo, ke mi venis ĉi tien hodiaŭ. Mi tuj forportos ŝin, kaaj mi petas vian forpermeson por ŝi.

Zhou Fanyi: Bone. Se vi tion preferas, tion mi opinias konvena. Sed mi timas, ke mia obstina filo enrudigos en vian hejmon por renkonti Sifeng.

Lu Shiping: Estu trankvila! Mi tre bedaŭras, ke mi konfidis la filinon al ŝia patro. Postmorgaŭ mi foriros de ĉi tie, kaj mia filino ne plu vidos ajnan membron de via familio. Sinjorino, mi forportu mian filinon jam nun.

Zhou Fanyi: Bone, se vi tiel decidis. Mi sciigos la kasiston kalkuli sian salajron. Ŝiaj propraj havaĵoj estos senditaj rekte en vian hejmon. Kaj mi donos al ŝi kofron da miaj malnovaj vestoj.

Lu Shiping (*al si mem*): Mia kompatinda infano!

Zhou Fanyi (*iras al Shiping*): Ne ĉagreniĝu, onjo Lu! Se vi havos financan malfacilon, turniĝu al mi, mi certe vin helpos. Nun konduku ŝin hejmen. Kun la bona patrino, kia vi, ŝi certe fariĝos pli bona ol labori ĉi tie.

Zhou Puyuan aperas el la kabineto.

Zhou Payuan: Fanyi!

Zhou Fanyi returniĝas. Lu Shiping glitas en angulon.

Zhou Puyuan: Kial vi ankoraŭ ne iras?

Zhou Fanyi (*intence*): Kien?

Zhou Puyuan: Ĉu vi ne scias, ke D-ro Kramer atendas vin?

Zhou Fanyi: D-ro Kramer? Kiu li estas?

Zhou Puyuan: Ho, li estas kuracisto, kiu iam kuracis vin.

Zhou Fanyi: Mi ne havas malsanon.

Zhou Puyuan (*pacience*): Li estas mia bona amiko en Germanio. Li havas bonan studon pri encefalopatio. Vi estas iom nervoza. Li certe resanigos vin.

Zhou Fanyi (*eksplozas*): Kiu tiel diras? Kial vi malbenas min? Mi ne havas malsanon. Vi sciu, mi ne havas malsanon.

Zhou Puyuan (*malvarme*): Kial vi kriaĉas antaŭ fremdulo kaj rifuzas viziti kuraciston neante vian malsanon? Kio estas tio krom nervozeco?

Zhou Fanyi: Hm, se mi havus malsanon, ĝi estas malfacile kuracebla. (Iras al la manĝejo.)

Zhou Puyuan (*laŭte*): Haltu! Kien vi iras?

Zhou Fanyi (*indiferente*): Supren.

Zhou Puyuan (*ordonante*): Vi devas obei!

Zhou Fanyi: Vi! (*Malestime rigardas lin.*) Ĉu vi forgesas, kia vi estas! (Foriras de la manĝejo.)

Zhou Puyuan: Homo!

Aperas servisto.

Servisto: Je via dispono.

Zhou Puyuan: La sinjorino nun estas supre. Transdiru al la sinjorino Ping,

ke li akompanu D-ro. Kramer supren por kuraci la sinjorinon.

Servisto: Jes, via sinjora moŝto.

Zhou Puyuan: Kaj petu sinjoridon Ping diri al D-ro Kramer, ke mi laciĝis kaj ne povas plu akompani lin.

Servisto: Jes, via, sinjora moŝto. (*Iras for.*)

Zhou Puyuan (*ekfumas cigaron, trovas la pluvmantelojn sur la tablo kaj direktas sin at Shiping*): Ĉu tiuj estas pretigitajde la sirdorino?

Lu Shiping (*rigardas al li*): Verŝajne.

Zhou Puyuan: Ne, ne. Ili estas novaj, sed mi volas la malnovan. Transdiru tion al la sinjorino.

Lu Shiping: Jes.

Zhou Puyuan (*trovas, ke ŝi ne foriras*): Ĉu vi ne scias, ke estas malpermesate al servistoj eniri ĉi tiun ĉambron?

Lu Shiping: Mi ne scias, sinjoro.

Zhou Puyuan: Ĉu vi estas novveninto?

Lu Shiping: Ne, mi venis por viziti mian filinon.

Zhou Puyuan: Vian filinon?

Lu Shiping: Jes, mian filinon Sifeng.

Zhou Puyuan: Do vi erare iris en ĉi tiun ĉambron.

Lu Shiping: Nu, kion vi volas ankoraŭ?

Zhou Puyuan (*montras al la fenestro*): Kiu malfermis ĝin?

Lu Shiping: Ho, jes. (*Ŝi senhaste iras al la fenestro, fermas ĝin kaj malrapide iras al la meza pordo.*)

Zhou Puyuan (*subite trovas ion strangan en ŝia maniero*): Momenton!

Lu Shiping haltas.

Zhou Puyuan: Kiel vi — vi nomiĝas?

Lu Shiping: Mia familia nomo estas Lu.

Zhou Puyuan: Lu. Laŭ viaj prononcoj vi ne estas de la nordo.

Lu Shiping: Vi pravas. Mi venas de Jiangsu-provinco.

Zhou Puyuan: El via parolo aŭdeblas akcento de Wuxi.

Lu Shiping: Mi kreskis tie.

Zhou Puyuan (*meditas*): Wuxi? Hm, Wuxi... (*Subite*) Kiam vi estis en Wuxi?

Lu Shiping: Proksimume antaŭ 30 jaroj.

Zhou Puyuan: Ĉu? Antaŭ 30 jaroj vi estis en Wuxi?

Lu Shiping: Tute ĝuste. Mi memoras, ke tiam oni ankoraŭ ne havis alumeton.

Zhou Puyuan (*dronas en profunda medito*): La pasintaj 30 jaroj, jes, estas jam de multaj jaroj. Lasu min rememori. Kiam mi aĝis iom pli ol 20 jarojn, mi estis tie.

Lu Shiping: Ankaŭ vi vends de Wuxi, sinjoro?

Zhou Puyuan: Jes. (*Meditas.*) Wuxi estas ĉarma loko.

Lu Shiping: Jes, tre ĉarma.

Zhou Puyuan: Vi diris, ke antaŭ 30 jaroj vi estis tie?

Lu Shiping: Jes, sinjoro.

Zhou Puyuan: Io okazis en Wuxi antaŭ 30 jaroj, tre fama akcidento.

Lu Shiping: Jes.

Zhou Puyuan: Ĉu vi scias?

Lu Shiping: Eble. Sed mi ne scias, pri kiu akcidento temas, sinjoro.

Zhou Puyuan: Ho, ĝi okazis antaŭ longe, eble ĉiuj jam forgesis.

Lu Shiping: Eble troviĝas iu, kiu bone memoras.

Zhou Puyuan: Mi demandis dekojn da homoj, kiuj estis en Wuxi siatempe, kaj mi ankaŭ sendis demandi, tamen ĉiuj, kiuj estis tiam en Wuxi, aŭ maljuniĝis, aŭ mortis, dum la vivantoj aŭ ne scias, aŭ forgesis. Eble vi scias, ke tiam en Wuxi estis familio Mei.

Lu Shiping: Mei?

Zhou Puyuan: En tiu familio estis juna fraŭlino, klera kaj virta. Sed iunokte ŝi subite sin dronigis. Ĉu vi scias, kio okazis poste?

Lu Shiping: Ne estas dece por mi babili pri tio.

Zhou Puyuan: Ĉu?

Lu Shiping: Mi konas fraŭlinon Mei.

Zhou Puyuan: Nu, diru pri ŝi.

Lu Shiping: Ŝi ne estis el riĉa familio, nek virta, male oni diris, ke ŝi estas malĉasta.

Zhou Puyuan: Eble vi mencias alian personon. Tamen mi volas aŭskulti plu.

Lu Shiping: Tiu fraŭlino vere sin dronigis en rivero iunokte, tamen ŝi dronis ne unusola, sed kun bebo naskita antaŭ nur 3 tagoj. Oni diris, ke ŝi estis malvirta dum la vivo.

Zhou Puyuan (*dolore*): Oj!

Lu Shiping: Ŝi estis el malalta klaso, malbonkondata. Oni diris, ke ŝi havis seksajn interrilatojn kun sinjorido Zhou kaj naskis du filojn. Sed 3 tagojn post la nasko de la dua filo sinjorido Zhou forĵetis ŝin. Ŝia unua filo restis ĉe li, kaj la ĵus naskita bebo estis en ŝia sino. Ŝi dronigis sin kune kun la

bebo en rivero antaŭvespere de la Printempa Festo.

Zhou Puyuan (*en ŝvito*): Oj.

Lu Shiping: Ŝi estas filino de iu servistino Mei en la domo de Zhou. Ŝi nomiĝis Shiping.

Zhou Puyuan (*levas la kapo*): Kio estas via familia nomo?

Lu Shiping: Lu, sinjoro.

Zhou Puyuan (*profunde vespiras, meditante*): Shiping, Shiping, jes. Oni diris, ke ŝia kadavro estis enterigita de iu malriĉulo. Ĉu vi povas informi pri ŝia tombo?

Lu Shiping: Kial vi interesiĝas pri tiu bagatelo?

Zhou Puyuan: Ŝi estis mia parenco.

Lu Shiping: Parenco?

Zhou Puyuan: Jes. Mi volas renovigi ŝian tombon.

Lu Shiping: Ĉu? Sed tio jam ne estas necesa.

Zhou Puyuan: Kial?

Lu Shiping: Ŝi ankoraŭ vivas.

Zhou Puyuan (kun mirego): Kio?

Lu Shiping: Ŝi ne mortis.

Zhou Puyuan: Ŝi ankoraŭ vivas? Neeble! Mi vidis sur la bordo ŝiajn vestojn kun ŝia testamento ene.

Lu Shiping: Ŝi estis savita.

Zhou Puyuan: Savita?

Lu Shiping: Kaj poste neniu en Wuxi vidis ŝin, opiniante, ke ŝi mortis.

Zhou Puyuan: Do, kie estas ŝi?

Lu Shiping: Ŝi nun vivas unusola fore de la hejmloko.

Zhou Puyuan: Kaj la bebo?

Lu Shiping: Ankaŭ li vivas.

Zhou Puyuan (*subite stariĝas*): Kiu vi estas?

Lu Shiping: Mi estas patrino de Sifeng, sinjoro.

Zhou Puyuan: Ho.

Lu Shiping: Ŝi jam maljuniĝis, edziniĝis al iu de la malsupra klaso kaj naskis filinon. Ili vivas tre mizere.

Zhou Puyuan: Kie ŝi estas nun?

Lu Shiping: Mi renkontis ŝin antaŭ kelke da tagoj.

Zhou Puyuan: Kio? Ĉu si estas en nia urbo?

Lu Shiping: Jes.

Zhou Puyuan: Ho.

Lu Shiping: Ĉu vi volas renkontiĝi kun ŝi, sinjoro?

Zhou Puyuan (*haste*): Ne, ne, ne.

Lu Shiping: Ŝia sorto estis mizera. Post ŝia foriro de la familio Zhou, sinjorido Zhou edziĝi al riĉa fraŭlino. Ŝi sola migris kunportante sian filon kaj faris ĉian laboron por vivtenado! Ŝi almozpetis, flikadis kaj servis en grandsinjora domo kaj lernejo.

Zhou Puyuan: Do kial ŝi ne revenis en la domon de la familio Zhou?

Lu Shiping: Ŝajne ŝi ne volas. Por sia filo ŝi reedziniĝis dufoje.

Zhou Puyuan: Ho, dufoje?

Lu Shiping: Jes. Ili ambaŭ estis de la malsupra klaso, kaj ŝi vivas malfeliĉe. Ĉu vi volas sin helpi, sinjoro?

Zhou Puyuan: Nu, vi povas foriri.

Lu Shiping: Ĉu neniu demandon vi havas plu, sinjoro? (*Ŝi rigardas Zhou Puyuan, kaj larmoj ondiĝas en la okuloj.*)

Zhou Puyuan: Bonvolu diri al Sifeng, ke ŝi elprenu la malnovan pluvmantelon el la kamfor-ligna kofro kaj ankaŭ la malnovajn ĉemizojn.

Lu Shiping: Malnovajn ĉemizojn?

Zhou Puyuan: Diru al ŝi, ke la ĉemizoj, silkaj sen kolumo, estas en la plej malnova kofro.

Lu Shiping: Vi havas 5 tiajn ĉemizojn, ĉu ne? Kiun el ili vi volas?

Zhou Puyuan: Kiun el ili?

Lu Shiping: Ĉu estas tiu ĉemizo, ĉe kies dekstra maniko troviĝas brultruo? La truo estas flikita per silka fadeno en umeflora formo, kaj la dua ĉemizo...

Zhou Puyuan (*mirigite*): Umefloro?

Lu Shiping: Kaj apud la floro estas brodita ideogramo "Ping".

Zhou Puyuan (*leviĝas malrapide*): Do, vi... vi estas...

Lu Shiping: Mi estas unu el viaj antaŭaj servistinoj.

Zhou Puyuan: Ho, vi estas Shiping. (*Mallaŭte*) Ĉu esters vi?

Lu Shiping: Vi certe ne supozis, ke iutage ankaŭ Shiping aspektas tiel maljuna, ke vi eĉ ne povas rekoni.

Zhou Puyuan pretervole rigardas la foton sur la tablo kaj poste Shiping.

Longa silento.

Zhou Puyuan (*subite rigore*): Por kio vi venis ĉi tien?

Lu Shiping: Ne laŭ mia volo.

Zhou Puyuan: Do kiu sendis vin?

Lu Shiping (*indigne*): Destino! La maljusta destino kondukis min ĉi tien.

Zhou Puyuan (*malvarme*): Finfine, vi sukcesis trovi min post 30 jaroj.

Lu Shiping (*Plende kaj indigne*): Sed mi ne, me ne serĉis vin! Mi pensis, ke vi mortis antaŭ longe. Mi ne supozis, ke mi venis ĉi tien hodiaŭ. Estas la sorto, kiu vidigas nin ĉi tie.

Zhou Puyuan: Ne estu flamiĝema! Ni ambaŭ havas infanojn nun. Se vi sentas vin ofendita kaj volas plendi, almenaŭ ne ploru en tia aĝo, kia la nia.

Lu Shiping: Hm. Miaj larmoj sekiĝis jam de longe. Mi ne plendas, sed malamas kaj bedaŭras pri miaj suferoj dum la pasintaj jaroj. Vi certe forgesis, kion vi faris. Antaŭ 30 jaroj, antaŭvespere de la Printempa Festo, t. e. en la 4-a tago post kiam mi naskis vian duan filon, vi elpelis min el via hejmo en ŝtorma tago por edziĝi al riĉa fraŭlino.

Zhou Puyuan: Ne estas necese menci la aferon antaŭ dekoj da jaroj.

Lu Shiping: Ne necese?! Ĉu pro tio, ke sinjorido Zhou estas sukcesa kaj respektata en la socio? Mi malsukcesis en memmortigo, kaj mia patrino mortis de indigno. Via familio devigis min lasi miajn du filojn ĉe vi.

Zhou Puyuan: Sed vi ja kunportas vian duan filon.

Lu Shiping: Jes, mi kunportis lin, ĉar via patrino kredis, ke li ne vivos plu pro malsano. (*Al si mem*) Ho, ĉielo! Ŝajne miestus en la songo.

Zhou Puyuan: Laŭ mi, pli bone ne tuŝu la pasintajn aferojn.

Lu Shiping: Ĝuste male! Mi parolos! Mi parolos! Mi estis sufokita jam ĉ. 30 jarojn. Vi transloĝiĝis tuj post via edziĝo. Mi pensis, ke mi neniam renkontos vin dum mia vivo, sed kiu scias, ke mia infano nun servas en la familio Zhou kaj faras la laboron, kiun mi faris antaŭe.

Zhou Puyuan: Estas ne mirinde, ke Sifeng tre similas al vi.

Lu Shiping: Mi servis al vi, kaj mia filino servas al viaj filoj. Tio ja estas puno. Ho, puno!

Zhou Puyuan: Estu kvieta! Estu diskreta! Ne pensu, ke mia koro mortis. Ĉu vi opinias, ke oni povas facile forgesi la bedaŭrindaĵojn, kiujn li mem faris? Rigardu la ĉambron: Ĉiuj tiuj mebloj estis ŝatataj de vi. Mi konservas ilin en tiuj jaroj ĝuste por memori vin.

Lu Shiping (*mallevas la kapon*): Ho.

Zhou Puyuan: Mi ĉiam memoras vian naskiĝotagon — la 18-an de aprilo, kaj ĉiam prenas vin mia laŭleĝa edzino. Vi malsanis post nasko de Ping, kaj ĉiam insistis ĉe fermo de fenestro. Mi ankoraŭ tenas tiun kutimon por ne forgesi vin kaj ripari mian pekon.

Lu Shiping (*suspiras*): Bonvolu ne daŭrigi! Ni ambaŭ estas maljunaj.

Zhou Puyuan: Des pli bone. Nu, ni povas paroli malkaŝe.

Lu Shiping: Sed mi ne trovas tion interesa.

Zhou Puyuan: Male, ŝajnas al mi, ke vi malmulte ŝanĝiĝis en la karaktero. Lu Gui ŝajnas homo malhonesta.

Lu Shiping: Estu trankvila. Li neniam scios pri tio.

Zhou Puyuan: Tiel estos bone por ni ambaŭ. Mi volas demandi, kie estas la filo, kiun vi kunportis?

Lu Shiping: Li laboras en via minejo.

Zhou Puyuan: Mi demandas, kie li estas nun?

Lu Shiping: En via pordistejo, atendante vin.

Zhou Puyuan: Kio? Lu Dahai? Vi diras, ke li estas mia filo?

Lu Shiping: Ĝuste li. Tamen li kaj vi estas homoj tute malsamaj.

Zhou Puyuan (*rikanas*): Ho, mia propra filo kontraŭstaras min kaj instigas strikon.

Lu Shiping: Ne revu, ke li rekonos vin kiel sian patron.

Zhou Puyuan (*subite*): Bone! Lasu nin paroli rekte! Kiom da mono vi postulas?

Lu Shiping: Kion vi diras?

Zhou Puyuan: Mono por via vivteno en la maljuneco.

Lu Shiping (*amare ridas*): Ha! Ĉu vi pensas, ke mi venis ĉi tien por vin ĉantaĝi?

Zhou Puyuan: Nu, portempe ni ne parolu pri tio. Unue mi diru al vi, kion mi volas. Aŭskultu! Mi tuj maldungos Lu Gui kaj ankaŭ Sifeng devas foriri, sed...

Lu Shiping: Ne timu! Ĉu vi pensas, ke mi volas ĉantaĝi vin per niaj pasintaj rilatoj? Estu trankvila! Mi tion ne faros. Postmorgaŭ mi revenos al mia antaŭa loko kune kun Sifeng. Tio estas sonĝo. Mi absolute ne plu loĝos ĉi tie.

Zhou Puyuan: Tre bone! Mi pagos por via vojaĝo kaj ĉiuj aliaj kostoj.

Lu Shiping: Kio?

Zhou Puyuan: Tio povas iom maŝarĝi mian konsciencon.

Lu Shiping: Via konscienco? (*Ridas.*) Mi unusola vivis proksimume 30 jarojn. Ĉu mi nun bezonas vian monon?

Zhou Puyuan: Bone, bone! Do, kion vi volas?

Lu Shiping (*paŭzas*): Mi, mi volas ion.

Zhou Puyuan: Kion?

Lu Shiping (larmoj ŝprucas el la okuloj): Mi, mi, mi volas vidi mian filon Ping.

Zhou Puyuan: Vi volas renkonti lin?

Lu Shiping: Jes. Kie li estas?

Zhou Puyuan: Nun li estas ĉe sia duonpatrino konsultanta kuraciston. Mi povas venigi lin ĉi tien, sed (*paŭzo*) li elkreskis. (*Paŭzo*) Li kredas, ke lia patrino mortis antaŭlonge.

Lu Shiping: Ho, vi ne imagu, ke mi plore petos, ke li rekonu en mi patrinon. Mi ne estas tiel stulta. Mi scias, ke liaj socia pozicio kaj edukiteco ne permesas al li rekoni min kiel sian patrinon. Tempo faris min prudenta. Mi volas nur rigardi lin, ĉar li ja estas mia propra filo. Vi ne timu! Eĉ se mi malkaŝos al li la veron, li nur ĉagreniĝos kaj ne rekonos min.

Zhou Puyuan: Jen konsentite. Mi vokas lin malsupren. Vi rigardu lin kaj poste neniu el la familio Lu aperu en mia hejmo.

Lu Shiping: Jes, Mi esperas, ke mi neniam vidos vin estontece.

Zhou Puyuan (elpoŝigas ĉekon kaj subskribas): Tre bone. Jen estas ĉeko de 5 000 juanoj. Akceptu. Mi pensas, ke mi iagrade riparos mian pekon.

Lu Shiping transprenas ĝin kaj disŝiras.

Zhou Puyuan: Ho, Shiping!

Lu Shiping: Vi neniam estos kvita kontraŭ miaj suferoj en tiuj jaroj!

Zhou Puyuan: Sed vi...

Aŭdiĝas kverelo de ekstere. La voĉo de Lu Dahai: "Cedu al mi la vojon!" Voĉas servistoj: "Ne, ne! La sinjoro estas dormanta."

Zhou Puyuan (*iras al la meza pordo*): He ho!

Servisto eniras de la meza pordo.

Zhou Puyuan: Kiu bruas?

Servisto: Ministro Lu Dahai. Li estas malracia kaj insistas nepre renkonti vin.

Zhou Puyuan: Ĉu? (*Hezitas.*) Enlasu lin! Momenton! Venigu sinjoridon Ping ĉi tien. Mi havas demandon al li.

Servisto: Jes, via sinjora moŝto. (*Eliras el la meza pordo.*)

Zhou Puyuan (*al Lu Shiping*): Shiping, ne estu tiel obstina! Vi bedaŭros iutage, se vi rifuzos la monon.

Lu Shiping mute rigardas Zhou Puyuan.

Servistoj enkondukas Lu Dahai. Li staras maldekstre, dum la servistoj dekstre.

Lu Dahai (*vidas Lu Shiping*): Panjo, mi ne scias, ke vi ankoraŭ estas ĉi tie.

Zhou Puyuan (*pririgardas Dahai*): Kiel vi nomiĝas?

Lu Dahai: Ne afektu kun mi! Ĉu vi ne konas min?

Zhou Puyuan: Mi scias nur, ke vi estas la plej tumulta laboristo.

Lu Dahai: Vi pravus. Ĝuste pro tio mi venas vin viziti.

Zhou Puyuan: Kion vi volas?

Lu Dahai: Kiel prezidanto de la Direktoraro de la minejo, vi certe bone scias, pro kio mi venas.

Zhou Puyuan (*kapskuas*): Mi ne scias.

Lu Dahai: Mi iris longan vojon de la minejo kaj ekde la 6-a ĉi-matene atendis vin en la pordistejo de via domo por demandi la prezidanton, ĉu vi konsentas niajn kondiĉojn.

Zhou Puyuan: Sed kie estas la aliaj 3 reprezentantoj?

Lu Dahai: Mi povas diri al vi, ke ili nun kontaktas kun aliaj sindikatoj.

Zhou Puyuan: Hm. Ĉu ili ne diris al vi ion alian?

Lu Dahai: Tio vin ne koncernas. Vi sintenas jen malforte, jen forte. Mi demandas vin, kion vi volas.

Zhou Ping venas el la manĝejo. Vidante, ke lia patro parolas kun fremdulo, li volas foriri.

Zhou Puyuan (*vidante Zhou Ping*): Ping, vi restu ĉi tie! (*Ĵetas rigardon al Shiping.*)

Zhou Ping: Jes, patro.

Zhou Puyuan (*gestante flanken*): Venu kaj staru apud min. (*Al Dahai*) Per sola ekscitiĝemo vi ne sukcesos en intertraktado.

Lu Dahai: Hm. Mi konas ĉiujn viajn artifikaĵojn. Vi prokrastas la traktadon nur por subaĉeti kelkajn senhontajn renegatojn trompe retenante nin ĉi tie.

Zhou Puyuan: Via rezono ne estas senbaza.

Lu Dahai: Sed vi tute malpravus. Ni ministoj estas organizitaj kaj unuanimaj

en la striko. Ni venis ĉi tien ne por submetiĝi al vi. Se vi akceptos niajn kondiĉojn, ĉio estos en ordo. Se vi rifuzos, ni daŭrigos la strikon ĝis la fino. Ni estas certaj, ke via minejo bankrotos en malpli de 2 monatoj pro nia striko.

Zhou Puyuan: Ĉu vi kredas, ke la aliaj reprezentantoj kaj strikestroj estas fidindaj?

Lu Dahai: Jes, ili estas tre fidindaj.

Zhou Puyuan: Do mi montru al vi ion.

Zhou Puyuan serĉas ion sur la tablo kaj servisto donas paperon al li. Ĝuste en tiu momento Zhou Chong enŝteliĝas el la maldekstra kabineto kaj staras tie por aŭskulti.

Zhou Puyuan (*transdonas la paperon al Dahai*) : Jen telegramo sendita el la minejo hieraŭ.

Lu Dahai (*legante*) : Kio? Ili komencis laboron? (Forĵetas ĝin.) Ne, neeble!

Zhou Puyuan: La ministoj jam komencas laboron hieraŭ matene. Ĉu vi ne scias, estante ilia reprezentanto?

Lu Dahai (*indigne*): La policistoj pafmortigis 30 ministojn. Ĉu tio restos senpuna? (*Ekridas.*) Ha, tio estas falsa. Vi volas splitigi nin per la falsa telegramo fare de vi mem. Kia malnobla artifiko!

Zhou Ping (*perdas paciencon*): Kiu vi estas? Kial vi aŭdacas tiel diri?

Zhou Puyuan: Vi ne intervenu! (*Al Dahai*) Ĉu vi plene fidas al la aliaj reprezentantoj kune venintaj kun vi?

Lu Dahai: Ŝparu viajn vortojn! Mi scias, kion vi sugestas.

Zhou Puyuan: Bone. Kion vi diros, se mi lasos vin legi la kontrakton pri la strikoĉesigo?

Lu Dahai (*ridas*): Ne mensogu! Mi ne estas infano facile trompebla. La kontrakto ne validos sen nia subskribo.

Zhou Puyuan: Montru al li la kontrakton!

Servisto iras en la kabineton kaj reiras kun la dokumento kaj donas ĝin al Zhou Puyuan.

Zhou Puyuan: Jen la kontrakto subskribita de viaj 3 kamaradoj.

Lu Dahai (*legante ĝin*): Kio? (*Malrapide*) Ili ĉiuj subskribis? (*Intencas transpreni to kontrakton por refoje legi.*) Kiam ili subskribis sen interkonsiliĝo kun mi?

Zhou Puyuan (*Foprenas la paperon kaj transdonas ĝin al la servisto*): Jes,

stultuleto! Sola kriado kaj sensperteco neniom helpas.

Lu Dahai: Kie estas la tri reprezentantoj?

Zhou Puyuan: Ili reveturis trajne hieraŭ vespere.

Lu Dahai (*kvazaŭ vekigás el songó*): Ho, tri malkuraĝuloj! Ili perfidis la ministrojn. Fi al vi, senhonta prezidanto! Refoje efikas via subaĉeto.

Zhou Ping (*kolere*): vi, kanajlo!

Zhou Puyuan: Gardu vian langon! (*Sin turnante al Dahai*) Nun vi jam ne havas la rajton paroli kun mi, Lu Dahai, vi estas maldungita.

Lu Dahai: Maldungita?

Zhou Chong: Tio estas maljusta, patro.

Zhou Puyuan (*al Zhou Chong*): Fermu vian buŝon kaj iru for!

Zhou Chong kolere eliras el la meza pordo.

Lu Dahai: Bone. (*Grincigas la dentojn.*) Antaŭ longe mi jam konas viajn artifikojn. Por mono vi povas fari ĉiajn senhontaĵojn. Subinstigate de vi, la policistoj mortigis multajn ministrojn, kaj vi...

Zhou Puyuan: Kalumnio!

Lu Shiping (*iras al Dahai*): Ne diru plu! Ni foriru.

Lu Dahai: Hm, mi scias vian pasintecon. Antaŭe vi kontraktis pri pontokonstruado en Harbino kaj intence rompis la digon,...

Zhou Puyuan (*rigore*): For!

Servistoj (*tiras Lu Dahai*): For! Eksteren!

Lu Dahai: Vi intence dronigis 2 200 kuliojn en furioza torento, kaj el ĉiu mortinta kulio vi gajnis 300 juanojn. Vi, damninda, gajnis la senkonsciencan monon. Viaj filoj kaj nepoj estu malbenitaj! Kaj nun vi...

Zhou Ping (*sin ĵetas al Lu Dahai kaj dufoje vangfrapas lin*): Fripono!

Lu Dahai volas kontraŭbati, sed la servistoj kaptas liajn brakojn.

Zhou Ping: Batu lin!

Lu Dahai (*al Zhou Ping*): Vi!

La servistoj kune batas Dahai. Sango fluas sur lia vizaĝo.

Zhou Puyuan (*rigore*): Ĉesu!

La servistoj ĉesas, sed daŭre tenas lin je la brakoj.

Lu Dahai (*baraktante*): For de mi! Vi rabistoj!

Zhou Ping (*al servistoj*): Forkonduku lin!

Lu Shiping (*laŭte ploras*): Centprocentaj rabistoj! (*Irás al Zhou Ping.*) Ĉu vi estas... estas rajtigita bati mian filon?

Zhou Ping: Kiu vi estas?

Lu Dahai: Ne atentu tiun fiulon, panjo! Rigardu, ne lasu tiujn rabistojn...

Lu Shiping (*rigide riyardas al Zhou Ping kaj denove ekploras*): Dahai, ni iru!

Ni iru for!

Lu Dahai estas forpuŝata de la servistoj. Lu Shiping sekvas lin. Restas sur la scenejo nur Zhou Puyuan kaj Zhou Ping.

Zhou Ping (*kun bedaŭo*): Paĉjo.

Zhou Puyuan: Vi estis tro kruda.

Zhou Ping: Sed li ne devas kalumnii vin.

Longa paŭzo.

Zhou Puyuan: Ĉu via patrino ricevis kuracadon de D-ro Kramer?

Zhou Ping: Jes. Ŝia malsano ne estas grava.

Zhou Puyuan: Hm. (*Meditas momenton, kaj abrupte.*) Venu servisto!

Servisto eniras el la meza pordo.

Zhou Puyuan: Diru al la sinjorino, ke ŝi pagu al Lu Gui kaj Sifeng la salajron, ĉar mi jam maldungis ilin ambaŭ.

Servisto: Jes, via sinjora moŝto.

Zhou Ping: Kio? Kion eraran ili faris?

Zhou Puyuan: Ĉu vi ne scias, ke tiu laboristo, kiu estis ĉi tie antaŭ momento, estas frato de Sifeng?

Zhou Ping (*surpizite*): Li esters frato de Sifeng? Paĉjo,...

Zhou Puyuan (*al la servisto*): Diru al la sinjorino, ke la kasisto pagu al ili kromsalajron je du monatoj, ke ili foriru tuj hodiaŭ. Nu, iru!

La servisto eliras tra la manĝejo.

Zhou Ping: Sed paĉjo, Sifeng kaj Lu Gui ambaŭ estas bonaj servistoj kaj tre fidelaj.

Zhou Puyuan: Hm, (*Oscedas.*) Mi estas tre laca. Mi ripozos en la kabineto. Transdiru, ke oni donu al mi tason da forta teo.

Zhou Ping: Jes, paĉjo.

Zhou Puyuan eliras tra la pordo de la kabineto. Zhou Ping profunde suspiras kaj haste iras al la meza pordo.

Zhou Chong aperas el la meza pordo.

Zhou Chong (*maltrankvile*): Paĉjo, kie estas Sifeng?

Zhou Ping: Mi ne scias.

Zhou Chong: Ĉu la patro volas maldungi Sifeng?

Zhou Ping: Jes, kaj ankaŭ Lu Gui.

Zhou Chong: Ŝia frato ja ofendis nian patron, sed ni batis lin. Kial ni tiel severe traktas la knabinon?

Zhou Ping: Vi demandu la patron!

Zhou Chong: Kompleta absurdaĵo!

Zhou Ping: Mi samopinias kun vi.

Zhou Chong: Kie estas la patro?

Zhou Ping: En la kabineto.

Zhou Chong iras en la kabineton. Zhou Ping paŝas tien kaj reen. Sifeng eniras el la meza pordo, viŝante al si larmojn.

Zhou Ping (*rapidas al ŝi*): Pardonon, Sifeng! Mi ne konas lin.

Sifeng svingas la manon, en neesprimebla malĝojo.

Zhou Ping: Sed via frato ne devas diri tiel malĝentile.

Lu Sifeng: Tion ne diru! (*Iras al la manĝejo.*)

Zhou Ping: Kion vi volas?

Lu Sifeng: Mi preparos miajn pakaĵojn. Ĝis revido! Vi forveturos morgaŭ, eble mi ne povos adiaŭi vin.

Zhou Ping: Ne, vi ne foriru! (*Li baras al ŝi la vojon.*)

Lu Sifeng: Ne! Lasu min iri! Ĉu vi ne scias, ke ni estas maldungita, ĵ de vi?

Zhou Ping (*dolore*): Sifeng, ĉu vi ne plendos kontraŭ mi?

Lu Sifeng: Mi scias, ke tio okazos frue aŭ malfrue. Vi neniel vizitu min ĉi-vespere.

Zhou Ping: Sed poste?

Lu Sifeng: Prokrastu tion ĝis poste!

Zhou Ping: Ne, Sifeng, mi nepre devas vidi vin hodiaŭ vespere. Mi havas multon por verŝi al vi. Sifeng, vi...

Lu Sifeng: Ne, vi absolute ne venu al mi!

Zhou Ping: Do vi venu al mi alimaniere!

Lu Sifeng: Mi ne scias alian manieron. Ĉu vi ne komprenas, en kia situacio ni estas?

Zhou Ping: Mi nepre venos al vi.

Lu Sifeng: Ne, ne! Vi neniel faru stultaĵon!

Zhou Fanyi eniras el la manĝejo.

Lu Sifeng: Sinjorino.

Zhou Fanyi: Ha, mi ne scias, ke vi estas ĉi tie. (*Al Sifeng*) Via patro iris voki elektriston kaj baldaŭ revenos. Li portos vian pakaĵon hejmen, aŭ mi sendos iun alian por fari tion. Kie vi loĝas?

Lu Sifeng: N-ro 10, Abrikot-flora Strato.

Zhou Fanyi: Ne ĉagreniĝu! Vizitu min, kiam vi estos libera. Jes, mi sendos vian pakaĵon pere de servisto. La adreso estas n-ro 10, Abrikot-flora Strato, ĉu?

Lu Sifeng: Jes, sinjorino, dankon.

Voĉo de Lu Shiping: Sifeng, Sifeng!

Lu Sifeng: Mi estas ĉi tie, panjo!

Lu Shiping eniras de la meza pordo.

Lu Shiping: Sifeng, kolektu viajn objektojn, kaj ni foriru. Baldaŭ estos pluvego.

Aŭdiĝas ventobruo kaj tondro.

Lu Sifeng: Jes, panjo!

Lu Shiping (*al Zhou Fanyi*): Ni foriras, sinjorino. (*Al Sifeng*) Diru dankon al via sinjorina moŝto, Sifeng!

Lu Sifeng (*riverencas antaŭ Fanyi*): Dankon, via sinjorino moŝto! (*Kun larmoj en la okuloj ŝi rigardas al Zhou Ping, kiu malrapide fortunigas sian vizaĝon.*)

Lu Shiping kaj Sifeng malaperas el la meza pordo.

Zhou Fanyi: Kion vi diris al Sifeng, Ping?

Zhou Ping: Vi ne rajtas demandi.

Zhou Fanyi: Ne opiniu, ke ŝi komprenas vin!

Zhou Ping: Kion vi aludas?

Zhou Fanyi: Ne plu trompu min! Diru al mi, kien vi iros?

Zhou Ping: Tio ne estas via afero. Estu memrespekta!

Zhou Fanyi: Diru, kien vi volas iri ĉi-vespere?

Zhou Ping: Mi, (*Subite laŭte*) mi vizitos ŝin. Nu, kion vi volas?

Zhou Fanyi (*minace*): Ĉu vi scias, kio ŝi estas? Kio vi estas?

Zhou Ping: Mi scias nur, ke mi amas ŝin kaj ankaŭ ŝi amas min. Mi scias, ke vi estas klara pri tio ĉi antaŭ longe. Nun se vi volas malkovri la aferon, mi ne kontraŭas.

Zhou Fanyi: Vi, bonedukita junulo, vivos kun knabino de malalta klaso, servista filino —

Zhou Ping (*eksplosas de kolero*): Deliraĵo! Vi ne rajtas tiel paroli pri ŝi! Vi ne rajtas!

Zhou Fanyi (*rikane*): Estu singardema! Ne tro turmentu la malesperan virinon! Ŝi povas fari ĉion!

Zhou Ping: Mi estas preta por ĉio.

Zhou Fanyi: Bone, foriru! Gardu vin! Nun (Rigardas eksteren tra la fenestro kaj parolas al si mem.) leviĝas ŝtormo.

Zhou Ping (*subkomprene*): Mi scias.

Zhou Puyuan eniras de la kabineto.

Zhou Puyuan: Pri kio vi interparolas?

Zhou Ping: Ni parolas ĝuste pri la ĵusa okazaĵo.

Zhou Puyuan: Ĉu ili jam foriris?

Zhou Fanyi: Jes.

Zhou Puyuan: Fanyi, mi refoje riproĉis Chong ĝis larmoj. Vi elvoku lin kaj lin konsolu!

Zhou Fanyi (*iras al la kabineto*): Chong! Chong! (*Ne aŭdinte respondon el interne, ŝi eniras.*)

Leviĝas ventego kĉij tondro. Zhou Puyuan proksimiĝas al la fenestro. Pli furioziĝas la vento. Aŭdiĝas el ekstere krako de rompiĝo de falinta florvazo.

Zhou Puyuan: Ping! Florvazo estis faligita de la ventego. Tuj sendu fermi la persienojn! Baldaŭ venos fulmotondro!

Zhou Ping: Jes, paĉjo! (*Eliras el la meza pordo.*)

Starante antaŭ la fenestro, Zhou Puyuan rigardas fulmon.

(**La kurteno falas.**)

TRIA AKTO

En la hejmo de Lu Gui, en Abrikot-flora Strato, n-ro10.

Ekstere de la domo

La stacia horloĝo batas la 22-an horon . Homoj junaj kaj maljunaj sin refreŝigas ĉe la lageto, kie tage regas malbonodoro kaj nokte blovas malvarmeta vento. Pluvegis antaŭnelonge, tamen neniom malpliĝis la sufoka varmo. Kun malpacienco oni atendas fulmotondron. Vigle kaj senĉese kvakas ranoj en la lageto. Jen aŭdiĝas, jen silentiĝas la bruoj de interparoloj de la refregŝigantaj homoj. De tempo al tempo ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. Nur ĉe la fulmbriloj vidiĝas la plorsalikoj kun tremantaj vergoj super la akvo. Post la fulmo denove falas netrapenetrebla mallumo.

Oni foriras. Regas silento. De malproksime bruadas tondroj, ĉe kiuj ĉesas kvaki la timemaj ranoj. Denove leviĝas vento, susuras la salik-folioj.

Fulmas pli brile, blue kaj terure, tondras pli furioze, sed fariĝas pli sufoke. La silenton rompas nur malofta kvakado kaj akra klakado far nokta gardisto. Pluvego pendas super la urbeto.

La furioza vento kaj torenta pluvo daŭras ĝis la fino de ĉi tiu akto.

Sur la scenejo vidiĝas ĉambro de Lu Sifeng, t. e. la interna ĉambro de la du-ĉambra domo de Lu Gui.

La familio Lu jam finis vespermanĝon. Ĉiu el ĝiaj kvar membroj estas regata de maltrankvileco kaj havas sian kaŝitan penson. Dahai ion purigas en angulo de la ĉambro. Mutas Shiping kaj Sifeng. Shiping kun malleveita kapo kolektas manĝilaron sur ronda tablo meze de la ĉambro, dum Lu Gui kun ebriaj okuloj kaj nudaj piedoj sidas kiel simio sur eluzita apogseĝo maldekstre. Li ruktas rigardante al Shiping. Lia blanka ĉemizo jam tute malsekiĝis de ŝvito. Li senĉese svingas palmfolian ventumilon.

Sifeng staras antaŭ la meza fenestro kun la dorso al la spektantoj, maltrankvile rigardante eksteren tra la fenestro. Jen aŭdiĝas paroloj de la refreŝigantoj ĉe la lageto, jen aŭdiĝas kvakado de ranoj. Kun maltrankvila mieno Sifeng foj-foje sin turnas por rigardi sian patron kaj tuj malŝate returniĝas. Apud ŝi ĉe la maldekstra muro troviĝas ligna lito kun mato, sur kiu bonorde kuŝas tre pura malpeza litkovrilo, kapkuseno kaj palmfolia ventumilo.

La ĉambro estas ne granda, kaj la plafono preme malalta super la kapo. Sur la muro super la litkapo pendas ilustrita reklamo de cigareda kompanio, kaj sur la maldekstra muro malnova novjara bildo. Sub la bildo

staras malgranda kvadrata tablo kun spegulo, kombilo kaj kelke da ordinaraj kosmetikajoj por virinoj.

Sub la lito de Sifeng troviĝas tri paroj da laŭmodaj ŝuoj. Apud la litkapo kuŝas kesto kovrita per blanka tolo, sur kiu estas porcelana kruĉo kaj kelke da maldelikataj bovloj. Olealampo kun helruĝa lampŝirmilo staras sur la tetableto ĉe la delstra angulo.

La ĉambro havas du pordojn. Sur la maldekstra pendas brilkolora kurteno, interne de kiu konserviĝas karbo. La loko funkcias ankaŭ kiel vestoŝanĝejo de Sifeng. La dekstra pordo kondukas al la ekstera ĉambro, kie tranoktas Lu Gui. Apud la pordo staras litotabuloj.

Kiam leviĝas la kurteno, Lu Gui apenaŭ finis sian lecionon al la tuta familio. La atmosfero estas streĉa. Lu Gui verŝajne tre kontentas pri sia digneco en la familio. Kun la grasa kapo klinita antaŭen, li svingas eluzitan palmfolian ventumilon, rigardante al la ceteraj tri homoj per siaj ebriaj okuloj.

Lu Dahai daŭre viŝas sian pistolon. Silentas la du virinoj, por atendi pluan lekciadon de Lu Gui. Alŝvebas el ekstere rana kvakado, kaj voĉo de strat-kantistinoj.

Starante antaŭ la fenestro, Sifeng profunde vespiras.

Lu Gui: Ve al vi! (*Ekscitiĝe demandas.*) Nu, pripensu, kiu el vi povas rekte rigardi al mi en la vizaĝon? (*Al Sifeng kaj Dahai*) Vi ne devas ne aŭskulti min. Ĉu vi povus elkreski sen mia vivtenado? Sed nun, kion indan vi faris por mi? (*Al Dahai*) Vi respondu! (*Al Sifeng*) Nu, vi respondu! (*Al Shiping, kiu staras apud la ronda tablo meze de la ĉambro.*) Eble vi povus respondi anstataŭ viaj karaj infanoj.

Silento. El ekstere alŝvebas sono de muzikilludado kaj kanto.

Lu Dahai (*al Sifeng*): Kiu kantas en tiel malfrua horo? Jam batis duono post la 22-a.

Lu Sifeng (*malvigle*): Blindulo kaj lia edzino. Ili kantas ĉiutage ĉi tie. (*Ŝi vespiras, svingante ventumilon.*)

Lu Gui: La tutan vivon min akompanas misfortuno! Apenaŭ mi laboris du

jarojn en la hejmo de s-ro Zhou kaj havigis laborpostenon al la infanoj, vi (*montras Shiping*) venis kaj nuligis ĉion ĉi. Ĉiufoje, kiam vi hejmen iras, okazas malagrablaĵo. Kio okazis hodiaŭ? Post kiam mi revenis vokinte elektriston, Sifeng jam estas maldungita. Estas maldungita ankaŭ mi. Ho ve al vi! Se vi (*montras al Shiping*) ne venus, kial povus okazi tiaj malagrablaĵoj?

Lu Dahai (*demetas la pistolon*): Se vi volas, do riproĉu min. Ne ofendu mian patrinon anstataŭe!

Lu Gui: Riproĉi vin? Kiel mi kuraĝas riproĉi vin, sinjorido? Vi kuraĝis riproĉi eĉ riĉulon rekte en la vizaĝon, do kiel mi kuraĝas riproĉi vin?

Lu Dahai (*malpacience*): Vi drinkis nur 2 tasojn kaj babilaĉas senĉese. Kiam vi finos?

Lu Gui: Ho, fino? Mi estas plena de kolero kaj malkontento. Mi ne povas fini mian plendadon. Antaŭe ankaŭ mi havis serviston. Mi bone min distris kaj vivis sinjore. Sed de post edziĝo al via patrino, malfeliĉoj sinsekve trafis min, kaj la vivo malboniĝas tagon post tago...

Lu Sifeng: Vi bone scias, ke hazardludo forrabis de vi la tutan havaĵon.

Lu Dahai: Lin ne atentu! Lasu lin babili!

Lu Gui (*absorbiĝinte en sia elokventeco, kvazaŭ li estus sola suferanto*): Mi diru al vi, mia vivo malboniĝas tagon post tago. Mi estas ofendata dum la servado kaj hejme malbone traktata de vi. Jen ĉio ĉi tio pasis. Nun mi povas nur vivi kun malsata stomako same kiel vi. Vi pensu, kion utilan vi faris al mi? (*Li subite trovis, ke nenien li povas meti siajn krurojn.*) Shiping, donu la tabureton ĉi tien por ke mi metu miajn krurojn sur ĝin.

Lu Dahai (*rigardante al sia patrino, ne volante, ke ŝi tion faru*): Ne, panjo!

Tamen Shiping metis ilian solan tabureton sub la piedojn de Lu Gui. Li metas siajn krumajn sur ĝin.

Lu Gui (*rigardante Dahai*): Kies kulpo tio estas? Vi insultis ilin. Ili ekflamiĝis kaj kompreneble maldungis nin, ĉar mi estas via patro. Pensu, Dahai, se mi, maljunulo, mortos de malsato pro via konduto, se mi mortos de malsato, lasu vian konsciencon juĝi tion!

Lu Dahai (*perdinte paciencon, leviĝas*): Do vi mortu! Kio vi estas esence?

Lu Gui (*iom sobriĝinte*): Ha, vi malbenita!

Lu Shipping: Dahai!

Lu Sifeng (*samtempe*): Frato!

Lu Gui (*antaŭ la alta kaj fortika Dahai kaj la pistolo en lia mano, li estas iom timigita kaj ridas nervoze*): Rigardu! Kia temperamento! (Paŭzas. Mi estas klara, ke tio ne estas kulpo de Dahai. En la famfio Zhou neniu estas bona. Mi laboris tie 2 jarojn kaj konas ĉion, kiel sur mia manplato. Por riĉuloj ĉio estas oportuna. Malnoblaĵojn ili faris, sed sin ŝajnigas dignaj. Ili parolas ĉiam ĝentile, sed la animo plej malvirtas. Rigardu, kiamaniere la gesinjoroj parolis kun mi hodiaŭ posttagmeze. Tamen estu singardemaj! Hm, se estos mia vico! Ili pensas, ke mi ne scias pri ilia konduto.

Lu Sifeng: Sufiĉe, ĉesu!

Lu Gui (*fanfarone*): Ha, atendu, mi malkaŝos ĉiujn hontindaĵojn fare de la sinjorino kaj sinjorido Ping, tiam eĉ la maljuna sinjoro, la damninda bastardo, surgenuiĝos antaŭ mi. Tiuj sendankemuloj! (Tusante) Mi malkaŝos! (Al sia filino) Kie estas la teo?

Lu Sifeng: Ĉu vi vere ebriiĝis, patro? Ĉu vi ne vidis, ke mi metis ĝin sur la tablon antaŭ momento?

Lu Gui (*prenas la tason. Al Sifeng*): Kio estas tio? Simpla akvo!

Lu Sifeng (*malvarme*): Certe ĝi estas akvo. Ni ne havas tefoliojn.

Lu Gui: Malsaĝulo! Mi kutime trinkas bonan teon post manĝo, ĉu vi ne scias?

Lu Dahai: Jes, mia patro trinkas teon post manĝo. (*Al Sifeng*) Sifeng, kial vi ne infuzis por li la multekostan teon Longjing, 153.60 juanojn por unu kilogramo? Ne ĉagrenu lin!

Lu Sifeng: Longjing? Ni ne havas eĉ la plej malmultekostan teon!

Lu Dahai (*al Lu Gui*): Ĉu vi aŭdis? Nu, trinku la bolintan akvon kaj toleru! Ne estu tiel postulema! (*Metas tason da akvo sur la tablon apud Lu Gui kaj iras for.*)

Lu Gui (*ĵetas al li malican rigardon*): Tio estas mia hejmo! Se ĝi ne plaĉas al vi, do vi iru for!

Lu Dahai (*sin ĵetas al Lu Gui*): Nun vi...

Lu Shiping (*baras al Dahai*): Ne, ne, mia infano. Vi ne kverelu kun li, por mi!

Lu Gui: Vi pensas, ke vi estas ne malbona. Vi kaŭzis tian ĉagrenon nur en du tagoj post via hejmenreveno. Mi ne kulpigis vin, kaj vi volas min bati? For tuj!

Lu Dahai (*sin detenante*): Panjo, mi ne povas plu resti ĉi tie, se li tiel kondutas. Mi foriru!

Lu Shiping: Ne diru sensecaĵon! Kien vi iras?

Lu Dahai: Mi havas aferon nepre farendan. Mi devas iri al rilaŝistejo.

Lu Shiping: Sed baldaŭ pluvos.

Lu Gui: Lasu lin for! Li — malriĉa arogantulo! For de mi, tuj!

Lu Dahai: Estu singardema! Ne incitu min!

Lu Gui (*fripone*): Kion vi volas fari kontraŭ via patro antaŭ la okuloj de via patrino? Vi, bastardo!

Lu Dahai: Kio? Kiun vi blasfemas?

Lu Gui: Ĝuste vin!

Lu Shiping (*al Lu Gui*): Vi ne estu senhonta. Fermu vian buŝon!

Lu Gui: Mi estas senhonta? Sed mi ne havas bastardon kaj ne portis iun (*montrante Dahai*) ĉe la nupto.

Lu Shiping (*dolore kaj indigne*): Vi —!

Lu Dahai (*elprenas la pistolon*): Mi, mi mortigos vin, maljunan senhontulon!

Lu Gui (*stariĝas, kriante*): Helpon! Helpon! Li volas pafi! (*Ŝtoniĝas.*)

Lu Sifeng (*kuras al Dahai kaj kaptas lian pojnon*): Frato!

Lu Shiping: Dahai, demetu la pistolon!

Lu Dahai (*al Lu Gui*): Diru al mia patrino, ke vi eraris kaj neniam diros la similajn malpuraĵojn, nek insultos!

Lu Gui: Bone.

Lu Dahai (*pluapaŝe*): Diru!

Lu Gui (*timigite*): Vi, vi demetu ĝin unue.

Lu Dahai (*kolere*): Ne! Vi diru unue!

Lu Gui: Bone. (*Al Shiping*) Mi eraris. Estontece mi ne diros malpuraĵojn, nek insultos.

Lu Dahai (*montrante la rondan seĝon*): Sidu tie!

Lu Gui (*embarase sidiĝas, kun mallecita kapo grumblante*): Bastardo!

Lu Dahai: Kio?

Lu Shiping: Demetu ĝin, Dahai, demetu la pistolon!

Lu Dahai (*demetante la pistolon*): Estu trankvila, panjo! Mi nur volas timigi lin.

Lu Shiping: Donu al mi! Kie vi akiris ĝin?

Lu Dahai: Ĝin perdis policanoj, kiam ili batis nin. Mi prenis ĝin en la minejo.

Lu Shiping: Por kio vi kunportas ĝin?

Lu Dahai: Por nenio.

Lu Shiping: Ne. Diru malkaŝe!

Lu Dahai (*profunde meditante*): Por nenio. Se la faniilio Zhou pelos nin en senelirejon, ĝi frue aŭ malfrue montros utilon.

Lu Shiping: Deliraĵon vi diris! Donu ĝin al mi!

Lu Dahai (*ne volonte*): Panjo !

Lu Shiping: Mi ja diris al vi ĉe la vespermanĝo, ke ni jam finis nian rilaton kun la familio Zhou. Ni neniam menciuj plu ĝin.

Lu Dahai (*malrapide kaj mallauĝte*): Sed hodiaŭ ili vangfrapis min, ĉu mi povas forgesi? Ĉu ni vane sangis en la minejo?

Lu Shiping: Jes, ĉio ĉi jam forpasis. Ni neniam povos kvitigi tiun familion. Ĉio estas destino. Mi volas, ke vi suferu iom multe.

Lu Dahai: Ne ! Ni certe kvitiĝos kun ili.

Lu Shiping (*lauĝte*): Dahai, vi estas mia plej amata filo. Sciu, ke mi neniam parolis kun vi tiamaniere. Se vi vundos iun ajn el la familio Zhou, ĉu sinjoron, ĉu sinjoridon, mi plu ne prenos vin kiel mian filon.

Lu Dahai (*petante*): Sed panjo, ne estu tia !

Lu Shiping (*kategorie*): Vi devas scii mian karakteron. Se vi faros kion mi timas, mi min mortigos antaŭ vi. (*Al Dahai*) Donu al mi la pistolon !

Dahai rifuzas.

Lu Shiping: Donu al mi ! (*Ŝi iras al Dahai kaj deprenas la pistolon.*)

Lu Dahai: Sur la pistolo estas nia sango.

Lu Sifeng: Frato, lasu la patrinon konservi ĝin !

Lu Dahai: Bone. Vi konservu por mi, sed vi devas sciigi min, kie vi ĝin kaŝos.

Lu Shiping: En tiu kesto. (*Enkestigas la pistolon.*)

Lu Gui: Prave. Tio estas prudenta solvo.

Lu Dahai: Tenu vian langon !

Lu Shiping: Do iru, Dahai !

Lu Dahai: Jes, panjo. Ĝis revido. (*Eliras.*)

Aŭdiĝas pordfermado fare de Dahai.

Lu Gui (*murmuras en si mem*): Malbeninda bastardo ! (*Sin turnas al Shiping.*)
Kial vi ne aĉetis teon? Mi ja diris tion al vi.

Lu Shiping: Mi ne havas monon.

Lu Gui: Sed, Sifeng, kie estas mia mono, la salajro, kiun vi ricevis posttagmeze en la domo de Zhou?

Lu Sifeng: Ĉu vi sugestas la duoblan salajron?

Lu Gui: Jes, sume 60 juanoj.

Lu Sifeng (*konsciante, ke ŝi devas sciigi lin frue aŭ malfrue*): Per ĝi mi kvitigis

vin je la ŝuldo.

Lu Gui: Kio? Kvitigi min je la ŝuldo?

Lu Sifeng: Ĵus antaŭe Zhao San venis. Li diris, ke li ne foriros, se ni ne donos al li la monon, kiun vi ŝaldas al li en la hazardludo. Tial la patrino donis al li la monon.

Lu Gui (*sin turnante al Shiping*): Ĉiujn 60 juanojn vi donis al li?

Lu Shiping: Jes, mi kvitigis vin.

Lu Gui (flamiĝas): Fi al vi! Estas ne mirage, ke mia tuta havaĵo estas ruinigita de vi! Ĉu estas tempo por liberiĝi je la ŝuldo?

Lu Shiping (*trankvile*): Estas bone, ke vi estas kvita. La hejmo ĉi tie estas ne plu bezonata por mi.

Lu Gui: Kio? Ne bezonata?

Lu Shiping: Mi volas, ke ni veturos al Ji-nan postmorgaŭ.

Lu Gui: Sed, kiam vi forlasos, ĉi tie restos Sifeng kaj mi. Ni bezonas la hejmon ĉi tie.

Lu Shiping: Ĉi-foje mi forportos Sifeng. Mi ne lasos ŝin sola ĉi tie.

Lu Gui (*ridas al Sifeng*): Sifeng, ĉu vi aŭdis, ke via patrino intencas forporti vin?

Lu Shiping: Lastfoje, kiam mi foriris, mi ne sciis, kio rezultos el mia laboro, ĉar la loko estis fremda por mi, kaj ĉi tie la najbara onklino Zhang povis ŝin prizorgi, tial mi restigis sin hejme, sed nun mia okupo estas aranĝita, kaj krome Sifeng nun estas senlabora. Kial mi ankoraŭ lasos ŝin ĉi tie?

Lu Sifeng (*surprizite*): Panjo, ĉu vi vere volas porti min tien?

Lu Shiping (*dolore*): Jes, estontece mi neniam disiĝos de vi.

Lu Gui: Ne. Pri tio ni devas bone interkonsiliĝi.

Lu Shiping: Tute ne necese! Se vi volas, ankaŭ vi veturu kune kun ni postmorgaŭ. Sed tie vi ne trovos hazardludantojn.

Lu Gui: Kiu volas tien veturi? Kaj por kio vi bezonas Sifeng tie?

Lu Shiping: Kompreneble la filino devas esti ĉe sia patrino. Antaŭe mi devigite forlasis ŝin.

Lu Gui: Ĉe mi Sifeng ne bezonas zorgi pri manĝo kaj vesto kaj povas kontakti mondumanojn. Ĉe vi ŝi estos turmentata de mizera vivo.

Lu Shiping (*ne sciante, kion fari kun li*): Mi ne povas fari vin komprena. Vi demandu pri ŝia prefero.

Lu Gui: Certe ŝi volas resti ĉe mi.

Lu Shiping: Do demandu!

Lu Gui (*en certeco*): Venu ĉi tien, Sifeng! Vi atente aŭskultu. Kion vi

volas? Tute laŭ via volo. Ĉu veturi kun via patrino, aŭ resti ĉi tie?

Sifeng sin turnas kun la vizaĝo plena de larmoj.

Lu Gui: Aĥ, kial vi ploras?

Lu Shiping: Sifeng!

Lu Gui: Diru, Sifeng! Estas nenia devigo.

Lu Shiping (*konsolante ŝin*): Sifeng, diru al mi! Antaŭ momento vi jam konsentis forveturi kun mi, sed kial vi ŝanĝis vian decidon? Diru al mi, mia kara! Diru la veron. Mi ja amas vin.

Lu Gui: Rigardu, via decido ŝin ĉagrenas. Mi klare scias, ke ŝi malvolontas forlasi ĉi tiun lokon. (*Ridas.*)

Lu Sifeng (*al la patro*): Fi al vi! (Al la patrino) Ne demandu min, panjo! Ne afliktiĝis. Ho, mia kara panjo, mi certe veturos kun vi, panjo! (*Ŝi sin ĵetas en la sinon de sia patrino, plorgemante.*)

Lu Shiping: Jes, mia kara. Hodiaŭ vi estas ofendita.

Lu Gui: Ho, pro tia sinjoridineco ŝi certe suferos ĉe vi.

Lu Shiping (*al Lu Gui*): Fermu vian buŝon! (*Al Sifeng*) Pardonu, mia filino, ke mi ne bone prizorgis vin. Sed estontece vi restos ĉiam ĉe mi, kaj neniu vin ofendos, mia koro!

Lu Dahai eniras de maldekstre.

Lu Shiping: Dahai, kial vi revenis?

Lu Dahai: Survoje mi renkontis onklinon Zhang, kaj ŝi diris al mi, ke vi volas vendi niajn meblojn kaj petas ŝian helpon. Ŝi volas, ke vi iru al ŝi por interkonsiliĝi.

Lu Shiping: Do ni iru kune. Sifeng, atendu min hejme. Mi baldaŭ revenos.

Lu Dahai (*al Lu Gui*): Ĉu vi malebriiĝis?

Lu Shiping kaj Lu Dahai elsceniĝas kune.

Lu Gui (*sekvas ilin per la okuloj*): Hm, ve al ili! (*Rimarkinte, ke Sifeng staras ĉe la fenestro, li turnas sin al ŝi.*) Via patrino estas for. Nun diru al mi, Sifeng, kion vi volas?

Lu Sifeng vespiras, tute ne atentante lin. Jen kaj jen

aŭdiĝas de ekstere tondro kaj kvakado de ranoj.

Lu Gui (*malestime*): Aha! Via koro, ŝajnas, estas peza.

Lu Sifeng (*ŝajnigante sin indiferenta*): Ma koro peza? Estas sufoke varme!

Lu Gui: Ne trompu min! Post manĝo via rigardo estis rigida. Pri kio vi pensis?

Lu Sifeng: Pri nenio.

Lu Gui: Vi estas mia saĝa solfilino. Se vi foriros kun via patrino, ĉi tie restos mi sola.

Lu Sifeng: Tion ne diru! Mia koro estas konfuzita. (*Ekstere ekbrilas fulmo.*)
Denove tondro!

Lu Gui: Ne ŝanĝu la paroltemon! Ĉu vi vere intencas veturi al Ji-nan kun via patrino?

Lu Sifeng: Jes. (*Longe suspiras.*)

Lu Gui (*kantas triviale*): Floroj floras, velkas ĉiujare, juneco de homoj forpasas senrevene. (*Abrupte*) Vi sciu, Sifeng, por ĉiu la ora tempo daŭras nur 2-3 jarojn. Se oni preterlasos, ĝi ne revenos.

Lu Sifeng: Bonvolu foriri. Mi sentas dormemon.

Lu Gui: Estu trankvila pri la aferoj en la familio Zhou. Post nelonge ni denove laboros tie. Ĉu vi vere volas forlasi ĝin? Ĉu vi tion ne bedaŭras? Ĉu vi volonte adiaŭos la familion Zhou...

Lu Sifeng: Ĉesu. Iru dormi! La sinrefreŝigantoj jam iris hejmen.

Lu Gui: Estu saĝa! Neniu en la mondo estas fidinda. Ĉiuj amas monon, escepte de vi kaj via patrino.

Lu Sifeng: Aŭskultu! Ŝajne oni frapas je la pordo.

Aŭdiĝas frapado je la pordo.

Lu Gui: Kiu venas? Baldaŭ estos la 23-a.

Lu Sifeng: Mi rigardu, patro.

Lu Gui: Ne! Mi rigardu! (*Malfermas la pordon.*) Kiu?

Voĉo de Zhou Chong: Hallo! Ĉu estas la hejmo de Lu?

Lu Gui: Jes. Kion vi volas?

Voĉo de Zhou Chong: Mi volas viziti iun.

Lu Gui: Kiu vi estas?

Voĉo de Zhou Chong: Mi estas Zhou.

Lu Gui (radias de ĝojo): Ha, estas vi! Ĉu mi ne antaŭdiris? Nin vizitas homo el la familio Zhou.

Lu Sifeng (*maltrankviliĝas*): Ne, patro. Diru al li, ke mi ne estas hejme.

Lu Gui: Ej. (*Ĵetas al ŝi ruzan rigardon.*) Kia maldecaĵo? (*Li eliras.*)

Lu Sifeng rapide ordigas la ĉambron. Ŝi movas la neuzatajn objektojn en la maldekstran ĉambreton. Aŭdiĝas la voĉo de Zhou Chong kaj Lu Gui. Post momento ili ambaŭ eniras.

Zhou Chong (*ekĝojas vidante Sifeng*): Sifeng!

Lu Sifeng: Sinjorido Chong!

Lu Gui (*kaĵole ridas*): Sinjorido Chong, vi ne ridu, ke ni loĝas en tiel damninda loko.

Zhou Chong: Estas ja malfacile trovi vian loĝejon. Ekstere de via loĝejo estas laĝeto, (*ridas*) estas bele.

Lu Gui: Sidiĝu, sinjorido! Sifeng, prezentu la pli komfortan seĝon!

Zhou Chong (*rimarkas, ke Sifeng silentas*): Sifeng, ĉu vi sentas vin nebone?

Lu Sifeng: Ne. Sinjorido, pro kio vi venis ĉi tien? Se la sinjorino scios pri tio...

Zhou Chong: Mi ja venis laŭ ŝia ordono.

Lu Gui (*komprene*): Laŭ sia ordono?

Zhou Chong: Jes. Ankaŭ mi volas viziti vin. (*Al Sifeng*) Kie estas viaj frato kaj patrino?

Lu Gui: Ili forestas.

Lu Sifeng: De kiu vi informiĝis pri nia adreso?

Zhou Chong (*naive*): De mia patrino. Ekster mia atendo, ke ĉi tie estas laĝeto. Post pluvo la vojo estas glitiga. Nokte oni tre facile falas pro malatento.

Lu Sifeng: Ĉu vi falis, sinjorido?

Zhou Chong: Ne, mi venis per rikiŝo. Interese! (*Ĉirkaŭ rigardas la meblaron kaj ĝoje ridas al Sifeng.*) Ha, vi ja estas ĉi tie!

Lu Sifeng: Mi proponas, ke estus bone, se vi rapidus hejmen.

Lu Gui: Pro kio?

Zhou Chong (*subite*): Ha, mi preskaŭ forgesas, pro kio mi venis. Mia patrino diris, ke ŝi estas maltrankvila post kiam vi forlasis nian hejmon. Ŝi timas, ke vi ne tuj trovos laboron, kaj sendas min transdonaci al via patrino cent juanojn. (*Elpoŝigas monbiletojn.*)

Lu Sifeng: Kio?

Lu Gui (*opiniante, ke la familio Zhou timas ofendi lin kaj kontente ridas al*

Sifeng): Vidu, kiel bonkoraj ili estas !

Lu Sifeng: Ne, sinjorido. Bonvolu transdoni miajn elkorajn dankojn al la sinjorino. Nun ni ankoraŭ povas nin vivteni. Kunportu la monon hejmen!

Lu Gui (*turnas sin al Sifeng*): Ej, kion vi diris? Ĉu estas dece ne akcepti ŝian komplezon? (*Akceptas la monon.*) Bonvolu transdoni mian dankon al la sinjorino kaj sciigi ŝin, ke ni fartas bone. Ŝi ne estu maltrankvila pri ni! Dankojn al ŝi.

Lu Sifeng (*obstine*): La monon ne akceptu, patro!

Lu Gui: Vi estas tro juna por tion kompreni.

Lu Sifeng: Miaj patrino kaj frato neniel konsentos kun vi.

Lu Gui (*ignorante ŝin, sin turnas al Zhou Chong*): Grandan dankon por via alveno. Mi iru aĉeti por vi fruktojn. Bonvolu resti ĉi de kun Sifeng! Pardonon, ke mi devas foriri.

Lu Sifeng: Patro, vi ne foriru! Tion ne faru!

Lu Gui: Ĉesu argumenti kaj prezentu al la sinjorido teon! Mi baldaŭ revenos. (*Haste eliras.*)

Zhou Chong: Estas bone, ke li estas for.

Lu Sifeng (*antipatie*): Fi! Kiel humilaĉa li estas! (*Neagrable*) Kiu lasis vin ĉi tien kun la mono?

Zhou Chong: Ŝajne vi ne volas vidi min. Pro kio?

Lu Sifeng (*penas trovi paroltemon*): Ĉu la sinjora moŝto jam vespermanĝis?

Zhou Chong: Jes, li ĵus vespermanĝis. Li denove ekflamiĝis kaj la patrino iris supren antaŭ ol ŝi finis la manĝon kaj tie koleras. Mi sidis longan tempon ĉe ŝi por ŝin trankviligi, alie mi venis ĉi tien pli frue.

Lu Sifeng (*senzorge*): Kion faras sinjorido Ping?

Zhou Chong: Mi ne vidis lin, sed mi scias, ke li estas malĝoja. Li sin ŝlisis en la ĉambro kaj drinkis, eble li ebriiĝis.

Lu Sifeng: Ho. (*Vespiras.*) Kial vi ne alsendis subulon? Pro kio vi mem venis ĉi tien, kie vivas malriĉuloj?

Zhou Chong (*sincere*): Nun vi plendas kontraŭ ni. (Honte) Mi kore bedaŭras pri la hodiaŭa okazaĵo. Vi ne pensu, ke mia frato Ping estas homo aĉa. Nun ankaŭ li tre bedaŭras. Krome, li tre ŝatas vin, ĉu vi ne scias?

Lu Sifeng: Sinjorido, nun mi ne estas servistino de via familio.

Zhou Chong: Ĉu ni tamen ne povas esti la plej bona j amikoj?

Lu Sifeng: Mi veturos al Ji-nan kun mia patrino.

Zhou Chong: Ne, vi ne foriru tiel haste. Vi kaj via patro povos reveni al ni pli malpli frue. Krome, ni transloĝiĝos en novan loĝejon. La patro probable

revenos al la minejo. Tiam vi revenu al ni, kaj kiel ĝoja mi estos!

Lu Sifeng: Vi estas bonkora!

Zhou Chong: Ne ĉagreniĝu pro tiu bagatelo! La mondo estas vasta. Vi devas viziti lernejon kaj tiam vi scios, ke en la mondo estas multaj homoj, same kiel ni, kiuj eltenas suferon kaj pene vivas laborante. Ili akiros feliĉon nur poste.

Lu Sifeng: Ve, virino finfine restas virino. (Subite) Aŭskultu!

Aŭdiĝas kvakado de ranoj.

Zhou Chong: Ne, vi ne estas virino ordinara. Vi estas forta kaj povas elteni suferon. Ni ambaŭ ankoraŭ estas junaj kaj certe faros bonaĵojn por la homaro. Mi malamas tiun malegalan socion kaj la hegemoniĉasantojn. Ne abomenas mian patron. Ni ambaŭ estas subpremataj.

Lu Sifeng: Vi eble estas soifa, sinjorido. Mi prenu por vi akvon. (*Stariĝas kaj verŝas akvon por Zhou Chong.*)

Zhou Chong: Ne, mi ne bezonas.

Lu Sifeng: Lasu min refoje servi al vi.

Zhou Chong: Ne parolu tiamaniere! La hodiaŭa mondo ne devas ekzisti. En miaj okuloj vi neniam estis servistino. Vi estas mia pliaĝa fratino kaj vivogvidanto. Nia mondo, la vera mondo, ne estas ĉi tie.

Lu Sifeng: Ho, vi bele parolas.

Zhou Chong: Iam mi forgesas la nuntempon. (*Kun ravita mieno*) Mi forgesas mian hejmon, vin, mian patrinon kaj eĉ min mem. Ŝajne en vintra mateno sub la lazura ĉielo... sur senlima maro... flugas velboato malpeza, kiel marhirundo. La vento forte blovas, kaj la aero odoras sale. Kiel aglo kunetenditaj flugiloj la boato kun plumblovita velo flugas super la akvosurfaco. Ĝi flugas al la horizonto. Sur la ĉielo flosas nur kelkaj flokoj da blanka nubo. Ni, sidante ĉe la pruo, rigardas antaŭen. Antaŭe ja estas nia mondo.

Lu Sifeng: Nia?

Zhou Chong: Jes, la mondo de vi kaj mi. Ni povas flugi, flugi al pura kaj ĝoja loko. Tie ne estas konflikto, nek hipokriteco kaj malegaleco... (Li levas la kapon, kvazaŭ aperus la aspirata mondo antaŭ liaj okuloj. Subite.) Ĉu estas bone laŭ vi?

Lu Sifeng: Vere bela estas via imago.

Zhou Chong (intime): Ĉu vi volas iri tien kun mi? Vi povas kunporti eĉ lin,

se vi volas.

Lu Sifeng: Kiun?

Zhon Chong: Tiun, pri kiu vi diris al mi hieraŭ. Vi diris, ke via tuta koro apartenas al li. Tiu homo certe estas tre aminda, kiel vi.

Eniras Lu Dahai.

Lu Sifeng: Frato.

Lu Dahai (*malvarme*): Kio estas tio?

Zhou Chong: Saluton, sinjoro Lu!

Lu Sifeng: Sinjorido Chong venis nin viziti.

Lu Dahai: Ha, mi ne atendis, ke vi estas ĉi tie. Kie estas la patro?

Lu Sifeng: Li eliris por ion aĉeti.

Lu Dahai (*al Zhou Chong*): Haha! En tiel malfrua horo vi, juna sinjorido de la familio Zhou, venis al ĉi tiu damninda loko por viziti nin. Neimageble!

Zhou Chong: Mi ĝuste volas vidi vin. Mi petas de vi pardonon.

Lu Dahai: Pro kio?

Zhou Chong (*ruĝiĝas*): Hodiaŭ posttagmeze en nia hejmo——

Lu Dahai (*bolas de kolero*): Ĉesu!

Lu Sifeng: Frato, ne estu tia! Li ja venis kun sincereco por nin konsoli.

Lu Dahai: Sinjorido, ni ne bezonas vian konsolon! Ni estas denaske malriĉaj kaj ne bezonas vian noktomezan konsolon.

Zhou Chong: Vi, verŝajne, miskomprenas min.

Lu Dahai (*klare*): Ne, mi ne miskomprenas vin. (*Sin turnas al Sifeng.*) Vi eliru.

Lu Sifeng: Frato!

Lu Dahai: Vi eliru unue. Mi volas diri ion nur al li. (*Trovinte, ke ŝi ne eliras.*) Eliru!

Sifeng malrapide eliras tra la maldekstra pordo.

Lu Dahai: Ni havis interparolon, kaj pro tio mi scias, ke vi estas relative prudenta en via familio. Sed memoru, ke se vi refoje venos ĉi tien por nin konsoli, (*abrupte*) mi traktos vin ne ĝentile.

Zhou Chong (*ridas*): Mi pensas, ke oni neniel rifuzas alies simpation.

Lu Dahai: Tio ne estas afero inter mi kaj vi. Tion decidis ankaŭ la sociala pozicio!

Zhou Chong: Lu Dahai, mi trovis, ke iam via antaŭjuĝo estas tro forta. Riĉuloj

ne estas krimuloj. Kial mi ne povas amikiĝi al vi?

Lu Dahai: Vi estas tro juna kaj ne povas kompreni tion. Mi diru al vi malkaŝe, ke vi ne devas veni ĉi tien. La loko ne estas vizitinda por vi.

Zhou Chong: Kiel?... Mi diris hodiaŭ matene, ke mi volas esti amiko de vi kaj Sifeng. Ĉu mi ne povas iamaniere helpi vin, estante via amiko?

Lu Dahai: Sinjorido, ne pensu, ke tio estas via bonkoreco. Mi informiĝs, ke vi instigas Sifeng viziti lernejon, vere? Ŝi estas mia fratino, filino de malriĉulo. Estontece ŝi estos edzino de laboristo kaj lavos vestojn, preparos manĝaĵojn kaj kolektos karbetojn. Hm, viziti lernejon estas sonĝo por ŝi!

Zhou Chong: Kvankam viaj vortoj ne estas tute senbazaj, tamen...

Lu Dahai: Se vi, filo de la mineja posedanto, vere zorgas pri ŝi, do ne plu kontaktu ŝin!

Zhou Chong: Mi pensas, ke vi estas antaŭjuĝema. Ne estas kaŭzo, ke pro mia patro, mineja posedanto, vi...

Lu Dahai (*larĝe malfermas siajn okulojn*): Nun mi vin avertas.

Zhou Chong: Avertu?

Lu Dahai: Se mi refoje vidos vin kun mia fratino en nia loĝejo, mi certe... (*La tono subite mildiĝas.*) Nu, estas malfrue, kaj ni devas enlitiĝi.

Zhou Chong: Tute ekster mia atendo, ke vi eldiris la suprajn vortojn, ke prava estas mia patro.

Lu Dahai (*eksplozas*): Via patro estas maljuna kanajlo!

Zhou Chong: Kio?

Lu Dahai: Kaj via frato estas...

Lu Sifeng enkuras tra la maldekstra pordo.

Lu Sifeng: Ĉesu! Ĉesu! (*Montrante Dahai*) Vi ja estas strangulo!

Lu Dahai: Rap-nap-kapo!

Lu Sifeng: Mi havas nenion por paroli kun vi. (*Al Zhou Chong*) Vi iru for, iru for. Ne parolu kun li.

Zhou Chong (*embarasite rigardas al Lu Dahai*): Bone, mi foriru. (*Al Sifeng*) Mi tre bedaŭras, ke mia vizito estigis al vi plian malagrablaĵon.

Lu Sifeng: Tion ne diru! Vi foriru!

Zhou Chong: Bone, bone. (*Milde al Dahai*) Mi ankoraŭ volas amikiĝi al vi. (*Etendas sian manon.*) Ĉu vi volas etendi la manon por manpreno?

Lu Dahai sin forturnas de li.

Lu Sifeng: Hm!

Zhou Chong ne plu parolas kaj estas foriranta.

Ĝuste en tiu momento eniras Lu Gui tra la maldekstra pordo kun fruktoj, vino kaj almanĝaĵoj en la manoj.

Lu Gui (*trovas, ke Zhou Chong estas elironta*): Kial?

Lu Dahai: Cedu al li la vojon! Li foriras!

Lu Gui: Ne, sinjorido! Vi ja venis ĵus antaŭe. Kial vi tiel hastas foriri?

Lu Sifeng (*kolere*): Vi demandu Dahai!

Lu Gui (*ridas al Zhou Chong*): Lin ne atentu! Bonvolu sidiĝi!

Zhou Chong: Ne! Mi volas foriri.

Lu Gui: Sed vi manĝu ion unue. Mi aĉetis por vi la manĝaĵojn de malproksime. Trinku tason da vino antaŭ la foriro!

Zhou Chong: Ne. Estas malfrue, kaj mi devas iri hejmen.

Lu Dahai (*al Sifeng*): De kie li akiris monon por aĉeti tiujn aĵojn?

Lu Gui (*sin turnante*): Tio estas mia mono, mono perlaborita de mi mem.

Lu Sifeng: Ne, tio estas mono de la familio Zhou, patro! Vi denove malŝparis. (*Sin turnante al Dahai*) Sinjorino Zhou donacis cent juanojn al nia patrino. Nia patrino forestas, kaj nia patro akceptis malgraŭ mia malkonsento.

Lu Gui (*ĵetas pikan rigardon al Sifeng kaj sin turnas al Dahai*): Tio eatas alportita de sinjorido Chong mem. Ĉu estas dece ĝin rifuzi?

Lu Dahai (*iras al Zhou Chong*): Kio? Ĉu vi venis por donaci al ni monon?

Lu Sifeng (*al Dahai*): Ĝis nun vi komprenas!

Lu Gui: Rigardu, ĉiuj en la familio Zhou estas bonkoraj.

Lu Dahai (*sin turnas al Lu Gui*): Donu al mi la monon!

Lu Gui (*kun timo*): Kion vi volas?

Lu Dahai: Ĉu vi ne volas doni? (*Minace*) Memoru, kio estas en la kesto!

Lu Gui (*terurite*): Mi donas, certe! (*Elpoŝigas monbiletojn kaj donas al Dahai*.)
Jen la mono, cent juanoj.

Lu Dahai (*kalkulas*): Kial mankas du juanoj?

Lu Gui (*nervoze ridas*): Mi, mi elspezis.

Zhou Chong (*ne volas vidi tion plu*): Nu, ĝis revido!

Lu Dahai (*kaptas lian brakon*): Ho, ne! Ne pensu, ke ni estas facile

trompeblaj!

Zhou Chong: Kion tio signifas?

Lu Dahai: Nu, mi prenu monon. (Elpoŝigas monbiletojn kaj monerojn.) Nu, ĝuste du juanoj! Jen via mono!

Lu Gui: Centprocenta absurdaĵo!

Zhou Chong: Vi vere ne komprenas humanecon!

Lu Dahai: Vi prave diris. Mi ne komprenas vian hipokritecon, vian pseŭdan humanismon. Mi ne komprenas...

Lu Sifeng: Frato!

Lu Dahai: Prenu la monon! For! For tuj!

Zhou Chong (*malespere staras momenton, subite alprenas la monon*): Jes, mi iras for! Mi eraras!

Lu Dahai: Aŭskultu, kiu ajn el via familio venos ĉi tien, mi tuj lin batmortigos!

Zhou Chong: Dankon! Mi pensas, ke neniu el mia familio estas tiel stulta kiel mi. Ĝis revido! (*Iras al la dekstra pordo.*)

Lu Gui: Dahai!

Lu Dahai (*laŭte*): Lasu lin for!

Lu Gui: Jes, jes. Mi lumigu lanternon por vi. Ekstere estas mallume.

Zhou Chong: Dankon.

Lu Gui kaj Zhou Chong eliras tra la dekstra pordo.

Lu Sifeng: Sinjorido! (*Elkuras.*)

Lu Dahai: Sifeng, Sifeng!

Lu Shiping eniras tra la dekstra pordo.

Lu Dahai: Panjo, venis iu de la familio Zhou.

Lu Shiping: Jes. Mi vidis rikiŝon ĉe la pordo, tial mi ne eniris.

Lu Dahai: Mi forpelis lin.

Lu Shiping (*kapjesante*): Mi aŭskultis minutojn ĉe la pordo.

Lu Dahai: Sinjorino Zhou sendis al vi cent juanojn.

Lu Shiping (*indigne*): Ni ne bezonas sian monon. Mi foriros morgaŭ kun Sifeng.

Lu Dahai: Morgaŭ?

Lu Shiping: Mi ŝanĝis la planon.

Lu Dahai: Bonege! Do mi ne bezonas diri al vi pri tio.

Lu Shiping: Pri kio?

Lu Dahai: Nenion. Kiam mi revenis hejmen, mi vidis, ke Sifeng babilas kun sinjorido Chong.

Lu Shiping: (*pretervole*) Pri kio?

Lu Dahai: Mi ne aŭdis.

Lu Shiping (*al si mem*): Ho, malsaĝa knabino!

Lu Dahai: Panjo, se venos iu el la minejo, diru al li, ke mi estas en la rikiŝejo.

Lu Shiping (*sen kompreno*): Kiu el la minejo?

Lu Dahai: Ma amiko. Panjo, hodiaŭ vespere mi ne revenos.

Lu Shiping: Kial?

Lu Dahai (*kun plena amo kaj fido al sia patrino*): Eble mi reiros al la minejo.

Lu Shiping (*kun maltrankvilo kaj timo*): Dahai, ĉu vi volas denove levi tumulton?

Lu Dahai (*mallaŭte kaj milde sin konsolas*): Ni certe ion gajnos. Panjo, malgraŭ ilia tiraneco, ilia regado daŭros nelonge.

Lu Shiping (*maltrankvile*): Ho, mia filo. Estu tolerema! Mia sorto estas sufiĉe mizera!

Lu Dahai: Panjo, ne tiel admonu min. Ni ne devas obei la sorton! Mi devas foriri! Vi admonu Sifeng! (Eliras.)

Sifeng eniras.

Lu Sifeng: Hallo, panjo! (*Maltrankvile*) Vi estas hejme.

Lu Shiping: Vi estis okupita de adiaŭo al sinjorido Chong kaj ne vidis min.

Lu Sifeng (*sin senkulpigante*): Li venis laŭ la ordono de sia patrino.

Lu Shiping: Via frato diris al mi, ke vi havis longan interparolon kun li.

Lu Sifeng: Kun sinjorido Chong?

Lu Shiping: Kion li diris?

Lu Sifeng: Nenion. Tute bagatelajn vortojn.

Lu Shiping: Ĉu vere?

Lu Sifeng: Kion la frato diris al vi?

Lu Shiping (*serioze*): Sifeng. (Fikse rigardas ŝin.)

Lu Sifeng: Kion vi volas, panjo?

Lu Shiping: Ĉu vi scias, ke mi amas vin pli ol ĉiujn aliajn?

Lu Sifeng: Kial vi demandas min pri tio?

Lu Shiping: Mi havas peton al vi.

Lu Sifeng: Kian?

Lu Shiping: Diru al mi, kia rilato estas inter vi kaj la knabo de la familio Zhou?

Lu Sifeng: Mia frato refoje senbridigis la langon. Kion li diris al vi?

Lu Shiping: Nenion li diris al mi. Nur mi mem volas scii pri tio.

Tondro de malproksime.

Lu Sifeng: Panjo, kial vi demandas pri tio? Mi jam diris al vi, ke nenio okazis. Panjo, vere nenio.

Tondro de malproksime.

Lu Shiping: Aŭdu! Denove tondras. Kompatu vian patrinon! Vi, mia filino, neniel devas trompi min en tiu afero!

Lu Sifeng (*paŭzas*): Panjo, mi ne trompas vin. Ĉu mi ne diris al vi, ke en la pasintaj du jaroj...

Voĉo de Lu Gui (*el la ekstera ĉambro*): Shiping, venu dormi! Estas malfrue!

Lu Shiping: Ne zorgu pri mi! Vi mem dormu! (*Al Sifeng*) Kion vi volas diri?

Lu Sifeng: Dum la pasintaj du jaroj mi hejmeniris ĉiuvespere.

Lu Shiping: Mia infano, vi devas diri al mi la veron. Mi ja ne povas elteni alian baton.

Lu Sifeng: Panjo, (*Plorĝemante*) kial vi ne kredas vian filinon? (*Sin ĵetas en la sinon de la patrino.*)

Lu Shiping (*larmante*): Mia kompatinda filino, (*dolore*) mi ne kredas ne vin, sed ĉi mondon. Mia stultuleto, vi ne scias, ke mia sufero estas malfacile eldirebla. Unu fojon mi faris eraron, kaj min sekvis aliaj eraroj. En mia juneco neniu rimarkigis mi. Ho, mia kara. Vi estas mia solfilino kaj neniel devas ripeti miajn erarojn! Kompatu min! Se vi min trompas, tio egalas, ke vi min mortigas. Ho, mia mizera filino!

Lu Sifeng: Panjo, mi vin ne trompas kaj de hodiaŭ mi restos ĉe vi por ĉiam.

Lu Shiping (*subite*): Ĉi tie mi suferas maltrankvilon ĉiutage. Ni nepre foriru morgaŭ.

Lu Sifeng (*stariĝas*): Morgaŭ?

Lu Shiping (*kategorie*): Jes. Mi ŝanĝis la planon. Mi forveturos morgaŭ kaj neniam revenos.

Lu Sifeng: Neniam? Ne, panjo, kial ni forveturos tiel haste?

Lu Shiping: Kion vi volas ankoraŭ?

Lu Sifeng (*hezite*): Mi, mi...

Lu Shiping: Ĉu vi ne volas foriri kun mi kiel eble plej baldaŭ?

Lu Sifeng (*vespirante kun amara rideto*): Bone, ni foriru morgaŭ.

Lu Shiping (*subite suspektas*): Sifeng, ŝajnas al mi, ke vi sekretigas ion antaŭ mi.

Lu Sifeng (*forviŝante siajn larmojn*): Nenion.

Lu Shiping (*karese*): Ĉu vi memoras miajn vortojn, mia kara?

Lu Sifeng: Jes, mi memoras.

Lu Shiping: Mi volas, ke vi vizitu neniun de la familio Zhou dum via tuta vivo.

Lu Sifeng: Mi obeas.

Lu Shiping (*gravmiene*): Vi devas fari ĵuron al mi.

Sifeng timeme rigardas al la severa vizaĝo de la patrino.

Lu Sifeng: Kial vi volas tion?

Lu Shiping (*severe*): Vi devas ĵuri.

Lu Sifeng (*genuiĝas*): Panjo! (*Sin ĵetas al ŝi en la sinon.*) Ho, panjo, mi ne povas.

Lu Shiping (*larmoj falas el la okuloj*): Ĉu vi volas korŝiri min? Ĉu vi forgesas, ke por vi, dum mia tuta vivo mi... (*Sin turnas kaj ploras.*)

Lu Sifeng: Mi ĵuras, panjo.

Lu Shiping (*stariĝas*): Vi do ĵuru surgenue!

Lu Sifeng: Panjo, mi konsentas. Mi ĵuras: estontece mi vizitos neniun de la familio Zhou.

Rulas tondro.

Lu Shiping: Nun tondras sur la ĉielo. Kio do sekvas, se vi rompos vian ĵuron?

Lu Sifeng (*timeme*): Panjo, tio ne eblos.

Lu Shiping: Diru, mia infano! Diru, se vi forgesos miajn vortojn...

Tondro krakas.

Lu Sifeng (*ĉion spitante*): Do min frapu tondro! (*Ŝi sin ĵetas al Lu Shiping en la sinon.*) Ho!

Bruegas tondro.

Lu Shiping (*ĉirkaŭbrakas sian filinon*): Ho, mia kara.

Lu Gui en vesto eniras de la dekstra pordo.

Lu Gui (*al Shiping*): Kial vi ankoraŭ ne dormas en tiel malfrua horo? Pri kio vi babilas?

Lu Shiping: Tio vin ne koncernas.

Lu Gui: Kial?

Lu Sifeng: Panjo, vi iru enlitiĝi kaj lasu min sola ĉi tie.

Lu Gui: Sifeng estis malĝoja la tutan tagon. Kial vi ree maltrankviligas ŝin?

Lu Shiping: Ĉu vi ne volas mian kuneston?

Lu Sifeng: Panjo, lasu min esti sola!

Lu Gui eliras.

Lu Shiping: Do havu bonan dormon!

Lu Sifeng: Bonan nokton, panjo!

Lu Shiping eliras.

Lu Sifeng fermas la dekstran pordon. Denove aŭdiĝas zumkanto de Lu Gui el la najbara ĉambro. Sifeng iras al la ronda tablo kaj faros la lampon malpli hela. Ekstere leviĝas kvakado de ranoj kaj bojado de hundoj. Ŝi malbutonumas, faros du paŝojn, sidiĝas sur la lito, profunde vespiras kaj kuŝiĝas en la lito. Ekster la domo sonas horbatado fare de noktogardisto. Sifeng leviĝas, denove sidiĝas sur la lito kaj forte svingas la ventumilon. Pro sufoka varmo ŝi malfermas la fenestron kaj staras antaŭ ĝi.

Lu Gui en pantofloj eniras de la dekstra pordo.

Lu Gui: Kial vi ne enlitiĝis?

Lu Sifeng (*rigardas lin*): Jes.

Lu Gui (*prenas vinon kaj almanĝaĵojn*): Ripozu!

Lu Sifeng (*apatie*): Jes.

Lu Gui (*ĉe la pordo*): Estas malfrue! (*Eliras.*)

Sifeng iras al la dekstra pordo, fermas ĝin, staras tie momenton, kaj aŭdas interparolon de siaj gepatroj. Ŝi iras apud la tablon, profunde vespiras, mallaŭte sed peze frapas ĝin kaj plorsingultas, sin apogante sur la tablo. Aŭdiĝas fajfado de ekstere. Surprizite, Sifeng subite leviĝas, heligas la lampon, kuras al la fenestro, elrigardas kaj denove fermas ĝin. Ŝi maltrankvile staras tie. Fariĝas pli kaj pli klara la fajfado. Ŝi movas la lampon ŝirmitan per ruĝa papero antaŭ la fenestron. Pli proksimiĝas la fajfado. Denove tondras malproksime. Jam aŭdiĝas paŝbruo ekster la fenestro.

Frapo je la fenestro.

Lu Sifeng (*per tremanta voĉo*): He!

Voĉo de Zhou Ping (*mallaŭte, sub la fenestro*): Hallo, malfermu!

Lu Sifeng: Kiu vi estas?

Voĉo de Zhou Ping (*malklare*): Divenu!

Lu Sifeng (*per tremanta voĉo*): Kial, kial vi venas?

Voĉo de Zhou Ping: Divenu!

Lu Sifeng: Nun mi ne povas vin akcepti. (*Maltrankvile*) Panjo estas hejme.

Voĉo de Zhou Ping: Ne trompu min! Ŝi endormiĝis.

Lu Sifeng (*zorgeme*): Estu singardema! Mia frato malamegas vin!

Voĉo de Zhou Ping (*neglektante*): Mi scias, ke li ne estas hejme.

Lu Sifeng: Vi devas foriri!

Voĉo de Zhou Ping: Ne!

Li forte puŝas la fenestron de ekstere, dum Sifeng kontraŭpuŝas ĝin laŭ sia eblo.

Lu Sifeng (*maltrankvile*): Ne, ne, vi ne eniru!

Voĉo de Zhou Ping (*mallaŭte*): Sifeng, malfermu, mi kore petegas.

Lu Sifeng: Ne, ne, estas noktomezo, kaj mi jam malvestis min.

Voĉo de Zhou Ping (*urĝe*): Kio?

Lu Sifeng: Mi jam enlitiĝis.

Voĉo de Zhou Ping: Do... do... mi... (*Longa vespiro*)

Lu Sifeng (*sincere petante*): Do vi foriru, ĉu bone?

Voĉo de Zhou Ping (*per alia tono*): Do lasu. Mi foriru! (*Denove urĝe*) Sed unua vi malfermu la fenestron, kaj mi...

Lu Sifeng: Ne, vi foriru tuj!

Voĉo de Zhou Ping (*urĝe*): Ne, lasu min... nur kisi vin.

Lu Sifeng (*dolore*): Ho, sinjorido Ping, ĉi tie ne estas via hejmo, pardonon!

Voĉo de Zhou Ping (*indigne*): Tio signifas, ke vi forgesas min kaj vi ne...

Lu Sifeng (*kategorie*): Vi pravas. Mi forgesas vin. Iru tuj!

Voĉo de Zhou Ping (*subite*): Ĉu mia frato venis ĵus antaŭe?

Lu Sifeng: Jes. (*Hezite*) Li estis ĉi tie.

Voĉo de Zhou Ping (*pike*): Ho! (*Longe veas.*) Tio ja ne estas senkaŭza. (*Malame*) Hm, vi estas senkora. Se vi perfidos min...

Lu Sifeng: Kiu perfidas?

Voĉo de Zhou Ping (*senpacience*): Do kial vi ne malfermas la fenestron kaj enlasas min? Ĉu vi ne scias, ke mi... mi amas vin?

Lu Sifeng: Bonvolu ne plu ĝeni min! Kiom da ĉagreno hodiaŭ vi faris al ni? Ĉu tio ankoraŭ ne sufiĉas?

Voĉo de Zhou Ping: Mi konscias mian eraron, sed nun mi volas vidi vin.

Lu Sifeng (*vespirante*): Lasu ĝis morgaŭ, ĉu bone? Morgaŭ mi faros ĉion laŭ via volo.

Voĉo de Zhou Ping (*suspekte*): Morgaŭ, ĉu vere?

Lu Sifeng: Jes.

Voĉo de Zhou Ping: Do interkonsentite. Ne trompu min!

Aŭdiĝas paŝbruo.

Lu Sifeng: Ĉu vi iras for?

Voĉo de Zhou Ping: Jes.

La paŝbruo fariĝas pli kaj pli malproksima.

Lu Sifeng (*malstreĉiĝas en la koro kaj parolas al si mem*): Li iras for. (*Malfermas la fenestron. Enblovas vento.*) Ve!

Zhou Ping subite aperas de la fenestro.

Lu Sifeng: Ho, mia ĉielo! (*Intencas tuj fermi la fenestron.*)

Zhou Ping (*malfermetas la fenestron kaj penas por plene malfermi ĝin*): Nu, ĉi-foje vi ne sukcesos forpeli min.

Lu Sifeng (*pene fermante*): Vi... vi... vi iru for!

Zhou Ping, kun la kota korpo kaj la vizaĝo makulita de sango, finfine eniras tra la fenestro.

Zhou Ping: Jen mi eniris.

Lu Sifeng (*retiriĝante*): Vi refoje ebriiĝis!

Zhou Ping: Pro kio vi min evitas? Pro kio vi timas renkonti min? (*Sin turnas.*)

Lu Sifeng (*kun timo*): Kio estas sur via vizaĝo?

Zhou Ping (*palpas sian vizaĝon kaj trovas sangon*): Por viziti vin mi falis survoje. (*Fermas la fenestron.*)

Lu Sifeng: Vi foriru, mi petas! Foriru!

Zhou Ping (*ridas strange*): Ne, mi volas detale rigardi vin.

Tondras.

Lu Sifeng (*evitante*): Ne, mi timas.

Zhou Ping (*Proksimiĝas al ŝi*): Kion vi timas?

Lu Sifeng (*kun tremanta voĉo*): Mi timas. (*Retiriĝas.*) Rigardu! Via vizaĝo... estas plena de sango. Mi eĉ ne povas rekoni vin.

Zhou Ping (*ridas strange*): Kiu vi prenas min? Stultulineto! (Tiras ŝian manon.)

Bruegas tondro.

Lu Sifeng: Ho, ĉielo. (Sin ĵetas en la sinon de Zhou Ping.) Mi timas.

Je tondro falas pluvego. Malheliĝas iom post iom sur la scenejo. Malfermiĝas la fenestro. Ekstere regas densa mallumo. Subite fulmas, kaj el la lumo vidiĝas la palavizaĝo de Zhou Fanyi, kaj strioj da pluvakvo falas sur ŝian taŭzitan hararon.

Zhou Fanyi etendas sian manon kaj fermas la fenestron. Pli laŭtiĝas tondro. La tuta ĉambro mallumiĝas.

Lu Sifeng (*aŭdante la tondron*): Mi timas. Pli firme ĉirkaŭbraku min!

Iom post iom heliĝas sur la scenejo.

Aŭdiĝas pordfrapo de Lu Dahai.
Zhou Ping sidas sur la ronda seĝo. Sifeng kun konsternita mieno staras ĉe la pordo.

Zhou Ping (*atente aŭskultante*): Kiu li estas?

Lu Sifeng: Silentu!

Voĉo de Lu Shiping: Kial vi revenis, Dahai?

Voĉo de Dahai: Por ion preni.

Lu Sifeng (*mallaŭte kaj urĝe*): Revenis nia frato. Vi foriru tuj!

Zhou Ping rapidas al la fenestro por malfermi ĝin.

ZhouPing (*ne sukcesas malfermi ĝin*): Diable!

Lu Sifeng: Kio?

Zhou Ping (*maltrankvile*): Kiel la fenestro fermiĝis?

Lu Sifeng (*time*): Ĉu? Kiu faris tion?

Zhou Ping (*refoje penas*): Ne, mi ne povas malfermi ĝin.

Lu Sifeng: Silenton! Ili estas tuj ĉe la pordo.

Voĉo de Lu Shiping: Dahai, kion vi volas preni?

Voĉo de Lu Dahai: Mi volas veturi al la minejo.

Lu Sifeng: Ili volas eniri. Vi kaŝiĝu!

*Lu Sifeng kondukas Zhou Ping al la maldekstra pordo,
kiam Lu Dahai eniras kun lampo en mano.*

Lu Dahai: Kio? (Rimarkante la ŝtoniĝantajn Sifeng kaj Zhou Ping.) Panjjo, venu ĉi tien! Tuj! Mi vidas fantomon!

Enkuras Lu Shiping.

Lu Shiping(*en raŭka voĉo*): Ho, ĉielo!

Lu Sifeng (*sin pafas for el la pordo*): Ho!

Shiping haste kaptas la riglilon kaj apenaŭ staras.

Lu Dahai: Ho, estas vi! (*Levas tabureton kaj sin ĵetas al Zhou Ping.*)

Lu Shiping (*forte kaptas la veston de Dahai*): Dahai, haltu! Alie mi mortos

antaŭ vi!

Lu Dahai: Lasu min! Lasu! (*Piedbatas la plankon.*)

Lu Shiping (*rimarkante, ke Zhou Ping staras tie senmove*): Stultulo, kuru for!

Zhou Ping forkuras el la dekstra pordo.

Lu Dahai (*krias*): Kaptu lin! Kaptu lin!

Lu Shiping (*trovante, ke Zhou Ping jam fuĝis, ŝi liberigas Dahai kaj gape rigardas foren ĉe la tablo*): Ho, ĉielo!

Lu Dahai (*piedbatante*): Panjo, panjo! Kian stultaĵon vi faras?

Eniras Lu Gui.

Lu Gui: Li foriris? Kie estas Sifeng?

Lu Dahai: Ŝi estas senhonta! Ŝi forkuris.

Lu Shiping: Ho, mia infano. La rivero ŝveliĝas. Vi ne faru stultaĵon, Sifeng!
(*Kuras.*)

Lu Dahai (*ŝin tenante*): Kien vi volas?

Lu Shiping: Mi serĉu ŝin!

Lu Dahai: Bone. Mi nepre trovos ŝin.

Lu Shiping: Revenu, (*krias*) Sifeng! (*Forkuras de la scenejo.*)

Ankaŭ Lu Gui metas sur sin ĉapon kal elkuras. Lu Dahai prenas la pistolon el la kesto, enpoŝigas ĝin kaj rapide eliras. Furiozas fulmotondro.

(Rapide falas la kurteno.)

KVARA AKTO

*En la salono de la familio Zhou. La 2-a horo, noktomeze.
Kiam leviĝas la kurteno, Zhou Puyuan sole legas
ĵurnalon, sidante sur la kanapo. Starlampo brilas apud li, sed
ĉirkaŭe regas mallumo.*

*Aŭdiĝas pluva susurado. Pendas la fenestra kurteno. La
meza pordo estas strikte fermita. Tra la pordofenestro
videblas, ke la tuta ĝardeno kaŝiĝas en mallumo.*

Zhou Puyuan (*demetante la ĵurnalon kaj rektigante sian talion*): He, venu!
(*Li iras maldekstren al la pordo de la manĝejo, viŝante siajn okudvitrojn.*) Ĉu
estas iu ajn ĉi tie? (*Fulmas ekstere. Li iras dekstren al la ŝranko kaj sonorigas.*)

Aperas servisto.

Servisto: Sinjora moŝto!

Zhou Puyuan: Mi longe vokis vin.

Servisto: Ĉar pluvas, mi ne aŭdis.

Zhou Puyuan (*montrante la horloĝon*): Kiel la horloĝo haltas?

Servisto (*sin senkulpigante*): Antaŭe la horloĝo estis ĉiam streĉita de
Sifeng. Hodiaŭ ŝi foriris, kaj ni forgesis.

Zhou Puyuan: Kioma horo nun estas?

Servisto: Eble ĉirkaŭ la 2-a.

Zhou Puyuan: Mi ordonis, ke la kasisto poŝtsendu sumon da mono al
Ji-nan. Ĉu oni estas klara pri tio?

Servisto: Al iu nomata Lu en Ji-nan, ĉu?

Zhou Puyuan: Jes.

Servisto: La monon oni jam pretigis.

Fulmas. Zhou Puyuan sin turnas kaj rigardas en la ĝardenon.

Zhou Puyuan: La, elektra drato difektiĝis ĉe la visteria pergolo. Ĉu la sinjorino
sendis ripari?

Servisto: Jes, sed la elektristo diris, ke en pluvego ripari estas dangere kaj li
riparos morgaŭ.

Zhou Puyuan: Ĉu sekure?

Servisto: Ne. Antaŭ nelonge la hundo de sinjorido Ping tuŝis la draton kaj tuj mortis. Nun oni ĉirkaŭis la lokon per ŝnuro por bari aliron.

Zhou Puyuan: Hm. Kioma horo nun estas?

Servisto: Baldaŭ estos la 2-a. Ĉu vi volas enlitiĝi?

Zhou Puyuan: Petu la sinjorinon malsupren!

Servisto: Ŝi enlitiĝis.

Zhou Puyuan (*senpripense*): Kion faras Chong?

Servisto: Li enlitiĝis jam antaŭ longe.

Zhou Puyuan: Do vi rigardu Ping!

Servisto: Li eliris post la vespermanĝo kaj ankoraŭ ne revenis.

Longa silento.

Zhou Puyuan (*iras antaŭ la kanapon kaj sidiĝas sur ĝi kaj sentas solecon*):

Kial neniu alia estas en la domo?

Servisto: Via sinjora moŝto, ĉiuj enlitiĝis.

Zhou Puyuan: Bone, vi povas foriri.

Servisto: Ĉu vi ne bezonas ion ajn?

Zhou Puyuan: Ne.

La servisto eliras tra la meza pordo. Zhou Puyuan stariĝas, malbonhumore paŝas tien kaj reen en la salono, haltas antaŭ la dekstra ŝranko, ŝaltas la mezan lampon kaj medite rigardas la foton de Lu Shiping.

Zhou Gong eniras el la manĝejo.

Zhou Chong (ne atendinte, ke lia patro estas ĉi tie): Patro!

Zhou Puyuan (*gaje*): Vi ne enlitiĝis?

Zhou Chong: Ne.

Zhou Puyuan: Ĉu vi volas vidi min?

Zhou Chong: Ne. Mi pensis, ke mia patrino estas ĉi tie.

Zhou Puyuan (kun malkontento): Hm. Ŝi estas supre.

Zhou Chong: Eble ne. Mi longe frapetis je ŝia pordo antaŭ ol mi trovis la pordon ŝlosita. Oh, jes, eble ŝi estas interne. Mi foriras.

Zhou Puyuan: Chong,

Zhou Chong haltas.

Zhou Puyuan: Ne foriru !
Zhou Chong: Kion vi volas?
Zhou Puyuan: Nenion. (*Ameme*) Kial vi ankoraŭ ne enlitiĝis?
Zhou Chong (*obeeme*): Pardonon. Mi tuj iros enlitiĝi.
Zhou Puyuan: Ĉu vi prenis la medikamenton preskribitan de D-ro Kramer post la vespermanĝo?
Zhou Chong: Jes, mi prenis.
Zhou Puyuan: Ĉu vi ludis tenison?
Zhou Chong: Jes.
Zhou Puyuan: Ĉu vi ĝuis?
Zhou Chong: Ho jes.
Zhou Puyuan (stariĝas kaj prenas Zhou Chong je la mano): Ĉu vi timas min?
Zhou Chong: Jes, mi timas.
Zhou Puyuan (seke): Ŝajnas al mi, ke vi estas iom malkontenta, ĉu ne?
Zhou Chong (*embarasite*): Mi ne scias, kiel diri, patro.

Longa silento.

Zhou Puyuan reiras al la kanapo, sidiĝas kaj vespiras. Li alproksimigas Zhou Chong.

Zhou Puyuan (*solece*): Hodiaŭ, nu, mi iom sentas, ke mi maljuniĝis. (*Paŭzo*) Ĉu vi scias?
Zhou Chong (*indiferente*): Ne, mi ne scias.
Zhou Puyuan (*subite*): Ĉu vi ne timas, se iutage mi mortos, forlasinte vin sola?
Zhou Chong (*senesprima*): Mi ja timas.
Zhou Puyuan (*montras sin amema, por ke ankaŭ Chong intimiĝu al li*): Matene vi diris, ke vi volas helpi iun per parto de la mono por via lernado. Nu, diru al mi! Se tio estas racia, mi konsentos.
Zhou Chong: Mi estis stulta kaj estontece mi ne plu mencios tion.

Longa silento.

Zhou Puyuan (*ĵetas riproĉan rigardon al Zhou Chong*): Vi tre malmulte parolas kun mi.
Zhou Chong: Mi ne scias, kion diri. Ŝajne vi ne volas esti kun ni. (*Balbutas kun timo.*) Sed hodiaŭ, vi... vi estas iom diferenca. Vi...

Zhou Puyuan (ne volas plu aŭskulti): Nu, vi povas foriri.

Zhou Chong: Jes, patro. (Eliras tra la pordo de la manĝejo.)

Zhou Puyuan kun malespero rigardas la forirantan filon kaj prenas la foton de Lu Shiping.

Senbrue aperas Zhou Fanyi de la meza pordo, en pluvmantelo, de kiu gutas akvo. Ŝi estas morte pala, kun malsekegaj haroj.

Zhou Fanyi (rimarkas, ke Zhou Puyuan rigardas ŝin kun miraj okuloj, indifere): Ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝis? (Haltas ĉe la pordo.)

Zhou Puyuan: Vi? (Alproksimiĝas al ŝi.) Kie vi estis? Chong serĉis vin la tutan vesperon.

Zhou Fanyi: Mi iris promeni.

Zhou Puyuan: En tia pluvego?

Zhou Fanyi: Jes. (Subite venĝeme) Ĉar mi estas freneza.

Zhou Puyuan: Mi demandas, kie vi estis.

Zhou Fanyi (abomene): Tio vin ne koncernas.

Zhou Puyuan (pririgardas ŝin): Viaj vestoj estas tute malsekaj. Demetu ilin!

Zhou Fanyi: Mi estas varma en la koro kaj volas malvarmiĝi en la pluvo.

Zhou Puyuan (senpacience): Ne deliru! Kie vi estis?

Zhou Fanyi (rekte rigardas al li en la okulojn kaj diras vorton post vorto): En via hejmo!

Zhou Puyuan (abomene): En mia hejmo?

Zhou Fanyi (kun rideto): Jes, mi ĝuis pluvadon en la ĝardeno.

Zhou Puyuan: La tutan vesperon?

Zhou Fanyi (gaje): Jes, mi ĝoje pasigis la tutan vesperon en la pluvo.

Longa silento. Zhou Puyuan kun miro kaj dubo rigardas al Zhou Fanyi, kiu senmove staras de la pordo kiel ŝtona statuo.

Zhou Puyuan: Fanyi, iru supren por ripozi!

Zhou Fanyi (krude): Ne! (Subite) Kio estas en via mano? (Malestime) Ree ŝia foto! (Etendas la manon por preni la foton.)

Zhou Puyuan: Vi povas ne rigardi. Tio estas la patrino de Ping.

Zhou Fanyi (deprenas la foton de li kaj rigardas ĉe la lampo): Bela estas la

patrino de Ping.

Tute ne atentante ŝin, Zhou Puyuan sidiĝas sur la kanapo.

Zhou Fanyi: Ĉu vi samopinias kun mi?

Zhou Puyuan: Jes.

Zhou Fanyi: Ŝi aspektas tenera.

Zhou Puyuan ŝin ignoras.

Zhou Fanyi: Ankaŭ saĝa.

Zhou Puyuan (*absorbiĝinte en medito*): Hm.

Zhou Fanyi (*aprezante*): Kaj juna.

Zhou Puyuan (*pretervole*): Jes, juna.

Zhou Fanyi (*demetante la foton*): Estas mire, ke mi ie vidis ŝin.

Zhou Puyuan (*levante la kapon, kun dubo*): Kie vi vidis ŝin? Nu, vi iru dormi!
(*Stariĝas kaj prenas la foton.*)

Zhou Fanyi: Por kio vi tenas ĝin?

Zhou Puyuan rigardas Zhou Fanyi sen respondo.

Zhou Fanyi (*reprenas la foton el lia mano*): Metu ĉi tien! (*Ridas komike.*) Ĝi ne perdiĝos. Mi gardas ĝin por vi. (*Metas ĝin sur la tablon.*)

Zhou Puyuan: Ne simulu frenezon! Nun vi faras simple sensencaĵojn!

Zhou Fanyi: Mi vere freneziĝis. Ne zorgu pri mi!

Zhou Puyuan (*kolere*): Nu, iru supren, kaj mi volas sola ripozi ĉi tie.

Zhou Fanyi: Ne! Mi volas sola ripozi ĉi tie. Vi eliru!

Zhou Puyuan (*serioze*): Fanyi, mi volas, ke vi supreniru!

Zhou Fanyi (*malestime*): Mi ne volas! Mi diras al vi, ke mi ne volas!

Longa silento.

Zhou Puyuan (*mallaŭte*): Atentu ĝin! (Montras al la kapo.) Memoru, kion diris D-ro Kramer. Li diris, ke vi devas esti kvieta kaj malmulte paroli. Mi jam invitis lin veni morgaŭ.

Zhou Fanyi (*rigardante antaŭen*): Morgaŭ? Ĉu?

Zhou Ping melankolie eliras el la manĝejo kaj sin direktas al la kabineto kun klinita kapo.

Zhou Puyuan: Ping!

Zhou Ping (*levante la kapon, kun miro*): Patro, vi ankoraŭ ne enlitiĝis?

Zhou Puyuan (*riproĉe*): Pro kio vi revenas nun?

Zhou Ping: Mi revenis antaŭ longe, patro. Mi eldomiĝis por ion aĉeti.

Zhou Puyuan: Por kio vi venas ĉi tien?

Zhou Ping: Mi iras al la kabineto por serĉi la referencon skribitan de vi.

Zhou Puyuan: Vi veturos morgaŭ matene, ĉu ne?

Zhou Ping: Mi subite rememoris, ke je duono post la 2-a nokte startos trajno, tial mi planas vetun jam nun.

Zhou Fanyi (*subite*): Nun?

Zhou Ping: Jes.

Zhou Fanyi: Tiel haste?

Zhou Ping: Jes, patrino.

Zhou Puyuan (*afable*): Eble estas ne oportune por vi foriri noktomeze en pluvego?

Zhou Ping: Se mi nun forveturos, mi atingos la minejon morgaŭ matene. Tiam estos facile trovi la deziratan homon.

Zhou Puyuan: La referenco kuŝas sur la skribotablo en la kabineto. Bone, se vi volas tuj forveturi.

Zhou Ping kapjesas kaj iras al la kabineto.

Zhou Puyuan: Momenton! (*Al Zhou Fanyi*) Vi iru preni la referencon por li!

Zhou Fanyi (*rigardas al Zhou Puyuan, kun malfido*): Jes. (Iras en la kabineton.)

Zhou Puyuan (*trovante, ke Zhou Fanyi eliris, diras singardeme*): Ŝi rifuzas iri supren. Mi volas, ke vi akompanu ŝin iri supren kaj ordonu servistinon prizorgi sian enlitiĝon.

Zhou Ping: Jes, patro.

Zhou Puyuan (*singardeme*): Venu ĉi tien!

Zhou Ping iras al Zhou Puyuan.

Zhou Puyuan (*per mallaŭta voĉo*): Diru al la servistoj, ke ili estu

singardemaj. (*Abomenete*) Mi rimarkis, ke ŝia malsano graviĝis. Ĵus antaŭe ŝi sole eliris.

Zhou Ping: Ĉu?

Zhou Puyuan: Jes. (*Serioze*) Ŝi staris en pluvo la tutan vesperon. Ŝi parolis strange. Mi timas, ke tio aŭguras malbone. Mi maljuniĝis kaj volas, ke nenio malbona okazos en la hejmo.

Zhou Ping (*maltrankvile*): Laŭ mi, se vi rigardas la aferon ne tro serioza, ĉio forpasos baldaŭ.

Zhou Puyuan (*timeme*): Ne, ne! Iatempe iuj aferoj estas tute ne antaŭvideblaj. La mondo estas stranga loko. Hodiaŭ mi konscias, ke ne facilas vivi vivon. (*Lace*) Mi tre ĝojas, ke vi volas vin hardi en la minejo. Vi povas havi ion sub la mano. (*Kondukas Zhou Ping al la kvadrata tablo kaj malfermas la tirkeston por sia filo.*) Sed vi uzu ĝin nur por memdefendo kaj neniel faru malutilon. (*Ŝlosas la tirkeston.*) Tenu la ŝlosilon! Ne forgesu kunporti la objekton ĉe la forveturo. (*Donas la ŝlosilon al Zhou Ping.*)

Zhou Fanyi aperas kun la referenco en la mano.

Zhou Fanyi (*abomene*): Jen la referenco.

Zhou Puyuan (*kvazaŭ subite vekigatas el la sonĝo, al Zhou Ping*): Bone. Vi iru for. Mi volas dormi. Fanyi, ankaŭ vin ripozu!

Zhou Fanyi (*esperas lian foriron*): Jes.

Zhou Puyuan eliras tra la kabineto.

Zhou Fanyi (*kiam Zhou Puyuan estas for, ŝi parolas malgaje*): Vi nepre foriros?

Zhou Ping: Jes.

Zhou Fanyi (*subite*): Kion via patro diris al vi antaŭ momento?

Zhou Ping (*evitante*): Li diris, ke mi akompanu vin supreniri, kaj vi enlitiĝu.

Zhou Fanyi (*rikanante*): Pli bone, ke li ordonus al grupo da homoj porti min supren kaj enŝlosi.

Zhou Ping (*ŝajnigas nekompmon*): Kion vi diris?

Zhou Fanyi (*eksplode*): Ne trompu min! Mi scias. Mi scias. (*Amare*) Li diris, ke mi estas freneza. Li volas, ke ankaŭ vi tiel opiniu. Li volas, ke ĉiuj aliaj prenu min frenezulo.

Zhou Ping (*nervoze*): Ne, vi ne tiel pensu!

Zhou Fanyi (*kun stranga mieno*): Vi, ankaŭ vi trompas min? (*Melankolie*) El viaj okuloj mi scias, ke ambaŭ vi kaj via patro volas, ke mi fariĝu frenezulo. Vi, patro kaj filo, postdorse rikanas je mi kaj faras malicon kontraŭ mi.

Zhou Ping (*trankvile*): Ne estu tiel nervoza! Mi akompanu vin supren.

Zhou Fanyi (*subite*): Mi ne bezonas vian akompanion! For de mi! (*Mallaŭte*) Mi ne volas, ke via patro postdorse prenas min frenezulo kaj lasas vin akompani min supren.

Zhou Ping (*pene sin regi*): Do donu al mi la referencon! Mi iru for!

Zhou Fanyi (*nekomprene*): Kien vi?

Zhou Ping (*nevole*): Mi forveturos kaj nun bezonas pretigi Miajn pakaĵojn.

Zhou Fanyi (*trankvile*): Mi demandas, kien vi iris ĉi-vespere?

Zhou Ping (*malamike*): Vi ne demandu! Vi scias.

Zhou Fanyi (*timige*): Vi finfine iris al ŝi.

Zhou Fanyi longe rigardas Zhou Ping, kaj tiu mallevas sian kapon.

Zhou Ping (*kategorie*): Jes, mi iris, mi iris. (*Defie*) Kion vi volas?

Zhou Fanyi (*iom pli milde*): Nenion. (*Rigide ridetante*) Hodiaŭ posttagmeze mi diris maldece. Ne kulpigu min! Mi volas scii nur, kion vi faros kun ŝi post via forveturo?

Zhou Ping: Post mia forveturo? (*Abrupte*) Mi edziĝos al ŝi.

Zhou Fanyi: Ĉu?

Zhou Ping: Jes.

Zhou Fanyi: Kion vi diros al via patro?

Zhou Ping (*indiferente*): Mi diros al li poste.

Zhou Fanyi (*mistere*): Ping, nun mi donas al vi ŝancon.

Zhou Ping (*nekomprene*): Kio?

Zhou Fanyi (*persvade*): Se vi ne forveturos, mi povos propeti vian patron pro vi.

Zhou Ping: Ne, ne estas necese. Mia faro estas justa kaj malkaŝema. Pri tio mi povas diri al ĉiuj.

Zhou Fanyi (*melankolie*): Ho, Ping!

Zhou Ping: Kio?

Zhou Fanyi (*melankolie*): Ĉu vi scias, kio okazos al mi post via forveturo?

Zhou Ping: Mi ne scias.

Zhou Fanyi (*kun timo*): Rigardu vian patron! Ĉu vi ne povas imagi al vi, kio okazos?

Zhou Ping: Mi ne komprenas vin.

Zhou Fanyi (*montrante sian kapon*): Ĉu vi ne scias, kion mi aludas?

Zhou Ping (*ne certe*): Kion tio signifas?

Zhou Fanyi (*kvazaŭ rakontas pri iu alia*): Unue, d-ro Kramer venos ĉiutage kaj devigos min preni medikamenton kaj medikamenton. Iom post iom la homoj servontaj al mi plimultiĝos. Ili ĉirkaŭos min, kvazaŭ ili gardos monstron.

Zhou Ping (*senpacience*): Mi konsilas, ke vi ne tiel pensu, ĉu bone?

Zhou Fanyi: Ili ĉiuj papage ripetas la vortojn de via patro: “Estu singardema! Ŝi estas freneza!” Ili ĉiuj flustros pri mi postdorse, kaj poste ĉiuj senescepte evitos min, ne kuraĝos rigardi min kaj fine katenos min per fera ĉeno, kaj tiam mi fariĝos vera frenezulo.

Zhou Ping (*ne sciante, kion fari*): ve! (*Rigardante la horloĝon*) Nu, estas ne frue. Donu al mi la referencon! Midevas pretigi miajn pakaĵojn.

Zhou Fanyi (*petante*): Ping, tio ne estas neebla. Ping, pensu, ĉu vi estas neniam kortuŝita?

Zhou Ping (*kun intenca furiozeco*): Kion mi povas fari, se vi volantas tiel kondukti?

Zhou Fanyi (*indigne*): Kio? Ĉu vi forgesis, ke ankaŭ via propra patrino mortis pro la kolero je via patro?

Zhou Ping (*kategorie*): Inter mia patrino kaj vi estas granda diferenco. Ŝi sciis amon. Ŝi amis sian filon kaj minimume fidelis al mia patro.

Zhou Fanyi (*la okuloj brilas per furioza indigno*): Kiel vi rajtas tiel diri? Ĉu vi forgesis, ke vi faris pekon ĝuste en ĉi tiu ĉambro, antaŭ 3 jaroj? Ĉu vi forgesis? (*Subite haltas, sinregante.*) Ha, ĉio jam forpasis. Mi ne plu mencios.

Zhou Ping mallevas sian kapon kaj sidiĝas sur la kanapo.

Zhou Fanyi (*sin turnas al Zhou Ping*): Oh, jes, Ping. Nun mi petas vin, mi petas vin lastfoje. Mi neniam parolis tiel humile. Sed nun mi petas vian kompaton. Mi ne povas plu elteni en tiu familio. (*Dolore plendente*) Vi ja propraokule vidis, kiel mi suferadis en tiu ĉi tago. Poste tia sufero turmentos ne unu tagon, sed monaton post monato, jaron post jaro, ĝis

mia morto. Via patro antipatas min. Li estas klara, ke mi scias ĉiun lian sekreton. Pro la timo al mi, li volas, ke cĉiuj aliaj prenu min kiel monstron, frenezulon. Ho, Ping!

Zhou Ping (*ege maltrankvile*): Ne, vi tion ne diru!

Zhou Fanyi (*insiste*): Mi ne havas parencojn, nek amikojn. Neniun mi povas fidi. Nun mi petas, ke vi ne foriru.

Zhou Ping (*pene sin eviti*): Ne, tion mi ne povas.

Zhou Fanyi (*sincere petegante*): Se vi nepre foriros, do kunportu min!

Zhou Ping (*timeme*): Kio? Kia deliraĵo!

Zhou Fanyi (*humile petante*): Vi kunportu min! Kunportu min for de ĉi tie!
(*Ĉion spitante*) Mi eĉ toleros, se vi volos venigi Sifeng por kune vivi. (*Pasie*) Nur se vi ne forlasos min!

Zhou Ping (*rigardante sin kun timo kaj miro*): Ĉu, ĉu vi vere freneziĝis?

Zhou Fanyi: Ne, vi ne tiel parolu! Mi sola vin konas. Mi konas viajn mankojn, kaj ankaŭ vi konas la miajn. Mi scias ĉion vian. (*Subite tente ridetas*). Venu al mi! Kion, kion vi skrupulas?

Zhou Ping (*rigardante sin, krias nereteneble*): Ne plu tiel ridu! (*Pli akcente*) Vi ne tiel ridu al mi! (*Batante sian kapon en konsterniĝo*) Ho, mi abomenas min, mi abomenas, por kio mi ankoraŭ vivas.

Zhou Fanyi (*amare*): Ĉu mi estas tiel balasta por vi? Vi scias, ke mi ne vivos multe da jaroj.

Zhou Ping (*malĝoje*): Ĉu vi ne scias, ke nia afero naŭzos ĉiujn?

Zhou Fanyi (*malvarme*): Mi jam diris al vi multfoje, ke mi ne tiel opinias. Mia konscienco tiel parolas al mi. (*Serioze*) Ping, hodiaŭ mi eraris. Se nun vi aŭskultas min kaj ne forlasos la hejmon, mi povas revenigi Sifeng.

Zhou Ping: Kio?

Zhou Fanyi (*klare*): Ni ankoraŭ havas tempon por sin revenigi.

Zhou Ping (*iras antaŭ sin kaj laŭte krias*): For de mi!

Zhou Fanyi: Kio?

Zhou Ping: Nun vi ne estas prudenta. Iru supren por dormi!

Zhou Fanyi (*konscia pri sia sorto*): Do, ĉio finita.

Zhou Ping: Hm, iru for!

Zhou Fanyi (*malespere*): Mi vidis vin kaj Sifeng en ŝia hejmo ĉi-nokte.

Zhou Ping (*mirege*): Kio? Ĉu vi iris tien?

Zhou Fanyi (*sidiĝante*): Jes, mi longe staris ĉe ŝia hejmo.

Zhou Ping (*kun timo*): Kiam vi estis tie?

Zhou Fanyi (*mallevente la kapon*): Mi vidis, ke vi eniris tra la fenestro.

Zhou Ping (*maltrankvile*): Vi?

Zhou Fanyi (*rigardante antaŭen kun malviglaj okuloj*): Mi staris antaŭ la fenestro.

Zhou Ping: Kiam vi foriris de tie?

Zhou Fanyi (*klare*): Ĝis kiam vi foriris.

Zhou Ping (*iras apud ŝin*): Do vi fermis la fenestron.

Zhou Fanyi (*malserene*): Jes, mi tion faris.

Zhou Ping (*kun abomenego*): Vi estas neimagebla monstro!

Zhou Fanyi (*levante la kapon*): Kio?

Zhou Ping: Vera frenezulo!

Zhou Fanyi (*rigardante lin apatie*): Kion vi volas?

Zhou Ping (*malamege*): Mi volas, ke vi mortis! (*Eliras tra la manĝejo kaj forte fermas la pordon.*)

Zhou Fanyi (*gape sidante, rigardas la pordon de la manĝejo. Ŝi trovas la foton de Lu Shiping, prenas ĝin kaj demetas. Ŝi silente starigās kaj faras du paŝojn*): Strange! Kion mi volas fari?

Senbrue malfermiĝas la meza pordo. Zhou Fanyi sin turnas. Lu Gui enŝteliĝas.

Lu Gui (*sin klinante*): Saluton, via sinjorina moŝto!

Zhou Fanyi (*kun mireto*): Por kio vi venis?

Lu Gui (*kun falsa rideto*): Mi venis saluti vin. Mi jam longe atendis ĉe la pordo.

Zhou Fanyi (*aplombe*): Ha, vi estis ĉe la pordo?

Lu Gui: Jes. (*sekrete*) Mi rimarkis, ke vi kverelis kun sinjorido Ping kaj... kaj (*ŝajnigante rideton*) mi ne kuraĝis eniri.

Zhou Fanyi (*aplombe*): Por kio vi venis?

Lu Gui (*kun plena memfido*): Mi volas raporti al vi, ke sinjorido Ping ebriiĝis ĉi-vespere kaj venis al ni. Ĉar ankaŭ vi estis tie, do ne estas necese por mi tion mencii

Zhou Fanyi (*abomene*): Kion vi volas do?

Lu Gui (*arogante*): Mi volas vidi la sinjoron.

Zhou Fanyi: Li jam enlitiĝis. Por kio vi volas vidi lin?

Lu Gui: Por nenio grava. Se via sinjorina moŝto bonvolos fari, ne estos necese ĝeni la sinjoron. (*Ion aludante*) Tio dependas de via sinjorina moŝto.

Zhou Fanyi (*post longa silento, sin detenante*): Diru do! Eble mi povos vin

helpi.

Lu Gui (*ruze*): Se via sinjorina moŝto volontos decidi kaj ne lasos min ĝeni la sinjoron, do estos oportune por ni ambaŭ. Ni nur petas de vi vivrimedojn.

Zhou Fanyi (*ne ĝoje*): Ĉu vi opinias, ke... (*modere*) Bone, tio ne gravas.

Lu Gui (*kontente*): Dankon al vi! (*Sprite*) Do bonvolu decidi la daton de nia reveno, sinjorino!

Zhou Fanyi: Do postmorgaŭ.

Lu Gui (*riverencante*): Dankon por via bonkoreco.

Malfermiĝas la meza pordo.

Lu Gui (*kapturnante*): Kiu?

Tra la meza pordo eniras Lu Dahai, tute malseka, kun malserena vizaĝo. Zhou Fanyi mire rigardas lin.

Lu Dahai (*al Lu Gui*): Ha, vi estas ĉi tie.

Lu Gui: Kiamaniere vi eniris?

Lu Dahai: Ĉar la fera pordo estas ŝlosita kaj ne malfermiĝis post mia longa vokado, mi do eniris trans la muron.

Lu Gui: Por kio vi venis? Kie estas Sifeng?

Lu Dahai (*forviŝante la pluvakvon de sur la vizaĝo*): Ni ne trovis ŝin. Mia patrino nun atendas ekstere.

Lu Gui (*opiniante, ke Dahai troigis la aferon, li kun abomeno kuntiras siajn brovojn*): Pri tio vi ne zorgu! Sifeng baldaŭ hejmeniros. Vi iru hejmen kune kun mi. Mi jam kontraktis kun la familio Zhou. Ĉio estas en ordo. Ni foriru!

Lu Dahai: Ne. Vi elvoku por mi sinjoridon Ping!

Lu Gui (*kun dubo kaj timo*): Por kio?

Lu Dahai (*fikse rigardante lin*): Ĉu vi voku aŭ ne?

Lu Gui (*timigite*): Vi volas denove fuŝi mian aferon, ĉu?

Lu Dahai: Mi diras al vi, ke mi venas ne por kvereli.

Zhou Fanyi (*trankvile*): Lu Gui, voku lin. Mi ja estas ĉi tie. Nenio okazos.

Lu Dahai: Estu singardema, se vi sola foriros sen venigi lin! Nun malfermigu la pordon por enlasi mian patrinon!

Lu Gui: Jes, jes! Post tio mi ja foriros. (*Mallaŭte al si mem*) Bastardo! (*Eniras*

en la manĝejon.)

Zhou Fanyi (*stariĝas*): Kiu vi estas?

Lu Dahai: Frato de Sifeng.

Zhou Fanyi: Ĉu vi volas vidi sinjoridon Ping?

Lu Dahai: Jes.

Zhou Fanyi (*malrapide*): Oni diris al mi, ke li tuj forveturos.

Lu Dahai (*kapturnante*): Kio?

Zhou Fanyi: Li tuj forveturos.

Lu Dahai: Li volas fuĝi?

Zhou Fanyi: Jes, ĝuste li!

Zhou Ping aperas el la manĝejo kaj tuj rimarkas Lu Dahai.

Zhou Ping (*pene sin regante*): Ha!

Lu Dahai: Bone, ke vi estas ĉi tie. (*Montrante Zhou Fanyi*) Petu ŝin foriri!
Mi volas paroli kun vi sola.

Zhou Ping (*rigardante Fanyi, kiu neniom moviĝas. Li iras al ŝi*): Bonvolu iri
supren!

Zhou Fanyi: Jes. (*Eliras tra la manĝejo.*)

Lu Dahai indigne rigardas Zhou Ping.

Zhou Ping (*kun timo*): Mi ne atendis, ke vi venis tiel rapide.

Lu Dahai (*malserene*): Mi aŭdis, ke vi volas foriri.

Zhou Ping (*kun rigida rido*): Sed ankoraŭ ne malfrue. Vi venis en la ĝusta
tempo. Kion vi volas? Mi estas preta.

Lu Dahai (*kun malamo*): Ĉu vi estas preta?

Zhou Ping (*rigardante Dahai rekte en la vizaĝon*): Jes.

Lu Dahai (*irante rekte antaŭ lin*): Nu, vi atendu! (*Forte vangfrapas Zhou
Ping.*)

Zhou Ping (*sin retenante kun la pugnigitaj manoj*): Kial vi... (*Elpoŝigas
nastukon kaj kovras per ĝi sian vangon.*)

Lu Dahai (*grincigante siajn dentojn*): Ha, vi volas forkuri!

Longa silento.

Zhou Ping (*pene retenante la indignon kaj sin ekskuzante*): Mi delonge tion

planis.

Lu Dahai (*malice ridante*): De longe?

Zhou Ping: Mi opinias, ke inter mi kaj vi estas tro da miskomprenoj.

Lu Dahai: Miskomprenoj? Mi vin ne miskomprenas. Vi estas malkuraĝa kaj egoisma fripono!

Zhou Ping: Nia dufoja renkontiĝo senescepte okazis tiam, kiam mi estis en la plej malbona humoro, kio malbone impresis vin.

Lu Dahai (*kun malestimo*): Ne trovu pretekston. Vi, sinjorido, denaska fripono! La vivo estas por vi tro facila. Vi havas tro da energioj kaj amuzas vin per filino de malriĉulo. Farinte malbonon, pri nenio vi respondecas.

Zhou Ping: Mi pensas, ke nun neniom utila estas mia ekskuzo. Mi scias, ke vi venis kun la klara celo. (*Time*) Elprenu vian ponardon aŭ pistolon kaj faru ĉion, kion vi volas.

Lu Dahai: Vi estas vere saĝa. Fari tion en via hejmo? Tio ne indas por mi. Mi ne volas oferi mian vivon valoran kontraŭ vi, duonmortinta!

Zhou Ping (*pene sin senkulpigante*): Ĉu vi pensas, ke mi vin timas? Vi eraras. Estas pli bone diri, ke mi timas min mem pli ol vin. Mi faris eraron kaj ne volas ripeti.

Lu Dahai (*mokridante*): Laŭ mi, por la homoj, kia vi, vivi estas erare. Se mia patrino ne barus al mi ĵus antaŭe, mi jam mortigus vin. Ankaŭ nun via vivo estas tenata en miaj manoj.

Zhou Ping: Estas feliĉo por mi la morto. Ĉu vi pensas, ke mi timas morton? Ne, mi ne timas. Via alveno estas atendata. Por mi la vivo estas enuiga.

Lu Dahai: Ha, vi enuas je la vivo, sed kial vi kompanigas mian fratinton?

Zhou Ping (*kun rigida rido*): Ĉu vi opinias, ke mi estas egoisto? Ĉu vi opinias, ke mi estas senkora kaj mi nur ĉasas plezuron en mia kunesto kun ŝi? Demandu vian fratinton! Ŝi estas klara, ke mi vivas nur por ŝi. Mi amas ŝin tutkore.

Lu Dahai: Ĉu? Vi amas ŝin tutkore? (*Ironie*) Kial do vi ne sciigas vian patron pri tio?

Zhou Ping: Tio ja estas doloriga por mi. La cirkonstancoj por mi estas malbonaj. Pensu, ĉu mia familio povus toleri tian aferon?

Lu Dahai: Tial vi vin ŝajnigas, ke vi kore amas ŝin kaj ĉion vi povas fari kun ŝi unuflanke kaj kaŝas tion antaŭ via patro aliflanke. Se li ordonos al vi forlasi ŝin kaj edziĝi al iu konvena fraŭlino de egala familio, vi do obeos, ĉu?

Zhou Ping: Pri tio mi eĉ ne pensis. Ĉar vi estas frato de Sifeng, mi malkaŝis mian koron al vi. Mi amas Sifeng kaj ŝi amas min. Ni ambaŭ estas junaj, kaj ni ambaŭ estas karnuloj. Ni estas kune ĉiutage, kaj la rezulto estas eble iom maldeca. Sed mi neniam ŝanceliĝas en tio, ke mi prenos ŝin kiel mian edzinon. En tio mi estas tute konscienca.

Lu Dahai: Aha! Vi estas justa. Sed via sinjorida moŝto, kiu kredas, ke vi povas enamiĝi al fratino de laboristo kaj filino de malriĉa servistino?

Zhou Ping: Mi diris al vi la veron. Kредu al mi, mi neniam trompis ŝin.

Lu Dahai (*severe*): Ĉesu do! Elvoku mian fratino!

Zhou Ping (*mirigite*): Kio?

Lu Dahai: Sifeng. Ŝi certe estas ĉe vi.

Zhou Ping: Ne, ne. Mi ja pensis, ke ŝi estas hejme.

Lu Dahai (*abomene*): Mi ne havas tempon babilaĉi kun vi. Poste mi faros kvitigon kun vi! Ĉu vi pensas, ke ni silente toleras la ŝanĝadon en la minejo?... Tute ne necesas diri tion al vi! Elvoku mian fratino! Ja urĝa afero atendas min.

Zhou Ping: Ne. Ŝi ne estas ĉi tie.

Lu Dahai (*grancigante siajn dentojn*): Vi vere ne volas plu vivi, ĉu? (*Elpoŝigas la pistolon, levas ĝin rekte kontraŭ Zhou Ping.*)

Aŭdiĝas fajfado de ekstere.

Zhou Ping: Tiu estas ŝi. Ŝi venas.

Lu Dahai: Kio?

Zhou Ping (*per tremanta voĉo*): Jes, tiu estas ŝi. Ni ĉiam tiamaniere rendevuas. (*Haste*) Vi iom atendu en la najbara ĉambro. Ŝi ne scias, ke vi estas ĉi tie. Mi pensas, ke ŝi ne eltenos plian surprizon.

Zhou Ping kondukas Lu Dahai al la manĝejo. Dahai eliras.

Zhou Ping (*iras al la meza pordo*): Sifeng! (*Malfermas la pordon.*) Eniru!

Sifeng eniras de la meza pordo kun larmoj kaj pluvakvo sur la vizaĝo kaj malordaj, malsekaj haroj de la tempioj.

Lu Sifeng (*timeme*): Ĉu neniuj estas?

Zhou Ping: Neniu. (Tenas ŝiajn manojn.)

Lu Sifeng: Ping! (*Plorsingultas, ĉirkaŭbrakante Zhou Ping.*)

Zhou Ping: Kial vi aspektas tiel? Kiel vi trovis min? Kiel vi eniris?

Lu Sifeng: Mi englitis tra la flanka pordeto.

Zhou Ping: Viaj manoj estas glacie malvarmaj. Unue vi ŝanĝu vestojn!

Lu Sifeng: Ne. (*Kun larmoj en la okuloj rigardas Zhou Ping.*) Ping, vi ankoraŭ estas ĉi tie, sed ŝajnas al mi, ke forpasis pluraj jaroj.

Zhou Ping: Kie estis vi, mia stultulineto?

Lu Sifeng: Mi sola kuris en la pluvo, ne sciante kie. Sur la ĉielo tondris, kaj mi forgesis ĉion. Ŝajnis al mi, ke mia patrino min vokas, sed mi, timigita, kuris per mia tuta forto. Mi volis min dronigi en la lageto antaŭ mia hejmo.

Zhou Ping: Sifeng, mi estas ŝulda al vi. Pardonu min kaj ne plendu kontraŭ mi!

Lu Sifeng: Mi, tute konfuzite, kuris al la elektra drato en la ĝardeno. En mia kapo zumis la penso pri mono. Mi scias, ke ĉion mi forgesus, se mi ektuŝus la elektran draton. Tamen la lampo ĉe via fenestro frapis miajn okulojn, kio atentigis min, ke vi estas ene. Mi tiam konsciigis, ke mi ne povas morti tiamaniere unusola, forlasante vin. Mi pensas, ke por ni estas pli bone kune foriri de ĉi tie.

Zhou Ping (*per peza tono*): Jes, ni kune foriru!

Lu Sifeng (*urĝe*): Tio estas mia sola elirejo. Ping, mia kara, nun mi ne havas hejmon. (*Amare*) Mia frato min abomenas, kaj mi hontas vidi mian patrinon. Nun mi havas nenion, nek parencojn, nek amikojn. Mi havas nur vin. Ping, ni iru morgaŭ, ĉu bone?

Longa silento.

Zhou Ping (*paŭzetas*): Ne, ne.

Lu Sifeng (*kun malespero*): Ping!

Zhou Ping (*rigardante la pordon de la manĝejo*): Ni foriru nun!

Lu Sifeng: Nun?

Zhou Ping: Jes, mi pensis, ke unue mi foriru unusola kaj poste revenu preni vin. Sed nun mi ŝanĝis mian decidon.

Lu Sifeng: Ĉu ni kune?

Zhou Ping: Sendube.

Lu Sifeng (*ekstaze kisas la manon de Zhou Ping, larmante*): Ĉu vere? Ping, vi estas mia karulo, la plej bona sub la ĉielo. Vi, vi savis min.

Zhou Ping (stariĝas): Sifeng, antaŭ nia forveturo ni devas vidi iun kaj foriros tuj poste.

Lu Sifeng: Kiun?

Zhou Ping: Vian fraton.

Lu Sifeng: Lin?

Zhou Ping: Li serĉadis vin, kaj nun estas en la manĝejo.

Lu Sifeng: Ne, ne! Ne vidu lin! Li malamas vin kaj eble mortigos vin. Ni iru tuj!

Zhou Ping: Ne. Ni devas vidi lin, alie nia foriro neeblos.

Lu Sifeng: Ping, sed vi...

Zhou Ping iras al la manĝejo kaj malfermas la pordon.

Zhou Ping: Ho, li ne estas ĉi tie.

Lu Sifeng: Pli bone ni iru tuj!

Sifeng iras al la meza pordo, tirante Zhou Ping je la mano. Malfermiĝas la pordo, kaj eniras Lu Shiping kaj Lu Dahai. Lu Shiping, tute ŝanĝiĝis en la aspekto kaj multe pli maljuniĝis. Ŝia voĉo raŭkigis pro kriadado kaj plorado en la pluvego.

Lu Sifeng (surprizite kaj time): Panjo !

Mallonga paŭzo.

Lu Shiping (etendante sian manon al Sifeng, diras malĝoje): Sifeng!

Lu Sifeng (sin ĵetas al la patrino): Panjo !

Lu Shiping (karesante la kapon de sia filino): Ho, mia kompatinda finjo!

Lu Sifeng (forte plorsingultante): Panjo, indulgu min!

Lu Shiping: Kial vi ne sciigis min pli frue?

Lu Sifeng (mallevante sian kapon): Mi timis, ke vi koleros kontraŭ mi, min malestimos kaj forlasos. Tial mi ne kuraĝis diri al vi.

Lu Shiping (malĝoje): Kulpas mia malsaĝeco. Mi ja devis tion supozi antaŭe. (Amare) Kiu scias, ke tia malfeliĉo trafis mian infanon? Mia sorto estas mizera, sed la via...

Lu Dahai (pene sinregante, konsolas): Panjo, tion vi ne diru! Mi devas foriri. Nun vi iru kune kun Sifeng!

Lu Shiping (*nekomprene*): Dahai, kial vi nepre devas foriri?

Lu Dahai (*milde*): Panjo, mi mendu por vi rikiŝon! (*Sin deturnas.*)

Lu Shiping: Dahai!

Lu Dahai foriras.

Zhou Ping (*vidante, ke Lu Dahai foriris, haste*): Onjo Lu, mi interkonsiliĝis kun Sifeng, ke ni kune forveturos nun.

Lu Shiping (*duonkonscie*): Ho, ho.

Zhou Ping: Onjo Lu, ĉu tiel decidite?

Lu Shiping: Kio? Kion vi diris?

Zhou Ping: Kредu al mi, Onjo Lu. Mi certe bone traktos ŝin. Mi tuj foriros kune kun ŝi.

Lu Shiping (*ekkomprenas*): Ĉu vi volas foriri kun li, Sifeng?

Lu Sifeng (*firme tenante la manojn de la patrino*): Panjo, lasu min forlasi vin portempe.

Lu Shiping (*kategorie*): Vi ne povas vivi kune!

Lu Sifeng: Panjo!

Lu Shiping: Sifeng, ni iru hejmen! Ni foriru de ĉi tie kiel eble plej rapide!

Lu Sifeng (*sin retirante*): Vi tion ne faru, panjo!

Lu Shiping: Ne, ne eblas! Ni iru!

Lu Sifeng (*petegante*): Panjo, ĉu vi volas, ke via filino mortos antaŭ vi?

Zhou Ping (*iras al Lu Shiping*): Onjo Lu, mi scias, ke mi estas kulpa, tamen mi povas korekti mian eraron laŭ mia eblo. Nun la afero estas jam farita. Ĉu vi...

Lu Shiping (*al Sifeng*): Sifeng, aŭskultu! Mi preferas perdi vin ol lasi vin vivi kune kun li. Ni foriru!

Lu Sifeng: Ho, panjo! (*Svenas en la sino de sia patrino.*)

Lu Shiping (*tenante Sifeng en siaj brakoj*): Ho, mia finjo, vi...

Zhou Ping (*maltrankvile*): Ŝi svenis.

Lu Shiping (*Premante la frunton de Sifeng, vokas mallaŭte*): Sifeng!

Zhou Ping rapide verŝas tason da akvo kaj ĝin prezentas al Lu Shiping.

Lu Shiping (*prenas la akvon kaj trinkigas al Sifeng*): Mia finjo, vekigu!

Lu Sifeng (*ĝemante*): Aj, panjo!

Lu Shiping (*konsolante*): Mia finjo, ne kulpigu vian patrinon! Miaj suferoj estas neesprimeblaj.

Lu Sifeng (*profunde ĝemas*): Panjo!

Lu Shiping: Kio?

Lu Sifeng (*al Zhou Ping*): Nun, mi, mi ne devas plu prisekreti al vi.

Zhou Ping: Sifeng, ĉu vi sentas vin pli bone?

Lu Sifeng: Mi, mi ĉiam kaŝis tion al vi, kaj ankaŭ al vi. (*Fiksas siajn indulgopetajn okulojn al Lu Shiping.*) Mi ne povas diri.

Lu Shiping: Kion, mia finjo?

Lu Sifeng (*plorsingultante*): Mi, mi kaj li jam havas... (*Laŭte ploras.*)

Lu Shiping: Kio? Ĉu vi aludas, ke vi... (*Ne povas daŭrigi.*)

Zhou Ping (*prenas la manon de Sifeng*): Sifeng, ho, ĉu vi...

Lu Sifeng (*plorante*): Jes.

Zhou Ping: Kiam? Kiom longe?

Lu Sifeng (*klinas sian kapon*): Jam 3 monatojn.

Zhou Ping: Ej, Sifeng, kial vi ne sciigis min?

Lu Shiping (*mallaŭte*): Ho, ĉielo!

Zhou Ping (*iras al Lu Shiping*): Onjo Lu, ne persistu en via decido, mi petas. Ĉio ĉi estas mia kulpo. Mi petas, ke vi liberigu ŝin. Mi ĵuras, ke mi bone traktos ŝin kaj ne vanigos vian bonkorecon.

Lu Sifeng (*iras al sia patrino kaj genuiĝas*): Panjo, kompatu nin! Permesu, ke ni foriru kune.

Lu Shiping (*stupore sidante*): Ĉu tio estas sonĝo? Miaj infanoj, miaj gefiloj, post 30 jaroj... Ho, ĉielo! (*Ŝirmas sian vizaĝon kaj svingas sian manon.*) Vi foriru! Mi ne konas vin. (*Sin deturnas.*)

Zhou Ping: Bone. (*Al Sifeng*) Ni do iru!

Sifeng stariĝas.

Lu Shiping (*pretervole*): Ne, tio ne eblas!

Lu Sifeng (*denove genuiĝas*): Panjo, kiel vi? Mi jam decidis. En ĉiu ajn okazo mi estas lia. Panjo, nun mi devas tiel fari, kie li estos, tie ankaŭ mi estos. Ĉu vi ne komprenas, panjo?

Lu Shiping (*ĉesigas Sifeng, diras korŝire*): Mia finjo.

Zhou Ping: Onjo Lu, se vi neniel forlasus ŝin, ni do malobeus vin kaj mem forirus... Sifeng!

Lu Sifeng (*kapskuante*): Ne! (*Rigardas sian patrinon.*) Panjo!

Lu Shiping (*mallaŭte*): Ho, mia ĉielo ! Kiu kulpas? Kiu faris la pekon? Ili estas povraj infanoj, ili ne scias, kion ili faris. Ho, mia ĉielo, se vi volas puni, do punu min solan! (*Korŝire*) Ili estas miaj puraj infanoj kaj devas bone vivi. Mi faris la pekon kaj mi mem puniĝu. (*Stariĝas, fikse rigardas la ĉielon.*) Hodiaŭ nokte, estas mi, kiu permesis al ili foriri kune. Mi scias, kian pekon mi faris, kaj mi respondecas pri tio. Ho, mi respondecu! (*Sin returnas.*) Sifeng!

Lu Sifeng (*maltrankvile*): Panjo, kion vi diris?

Lu Shiping (*sin deturnas*): Ne, nenion. (*Milde*) Starigu, kaj vi iru kune!

Lu Sifeng (*stariĝas kaj brakumas sian patrinon*): Panjo!

Zhou Ping: Ni ekiru! (*Rigardas la horloĝon.*) Estas ne frue. Restas nur 25 minutoj. Mi voku aŭton eksteren. Ni iru!

Lu Shiping (*aplombe*): Ne. Sifeng, nun vi ŝtele foriru en malluma nokto kaj lasu neniun scii. (*Al Sifeng, malĝoje*) Venu al mi, mia finjo, kaj mi vin karesu!

Sifeng venas al sia patrino kaj ĉirkaŭbrakas ŝin.

Lu Shiping (*al Zhou Ping*): Ankaŭ vi venu, kaj mi vin rigardu!

Zhou Ping iras antaŭ Lu Shiping kun mallevita kapo.

Lu Shiping (*rigardas Zhou Ping kaj forviŝas larmojn*): Bone, vi foriru! Mi volas, ke vi promesu al mi ion antaŭ via foriro.

Zhou Ping: Bonvolu diri!

Lu Shiping: Se vi ne konsentos, mi ne forlasos Sifeng.

Lu Sifeng: Diru, panjo! Mi konsentos.

Lu Shiping (*fiksrigardante ilin ambaŭ*): Ju pli foren vi iros, des pli bone, kaj ne rigardu returnen. Post via foriro hodiaŭ, vi neniam revenu al mi!

Lu Sifeng (*malĝoje*): Ne, panjo!

Zhou Ping (*haltigas Sifeng per okulsigno, dirass mallaŭte*): Nun ŝi estas malĝoja, kaj iom poste faciliĝos ŝia koro.

Lu Sifeng: Jes, panjo. Ni do iras for. (*Genuiĝas kaj kun larmoj adorkliniĝas al Lu Shiping.*)

Lu Shiping penas sin regi.

Lu Shiping (*mansvingante*): Vi iru!

Zhou Ping: Ni eliru tra la manĝejo. Tie estas miaj pakaĵoj.

Zhou Ping, Sifeng kaj Lu Shiping iras al la manĝejo. Malfermiĝas la pordo, kaj eliras Zhou Fanyi.

Lu Sifeng (*surprizite*): Sinjorino!

Zhou Fanyi (*trankvile*): Ho, kien vi iras? Tondras ja ekstere!

Zhou Ping (*al Fanyi*): Fi, vi subaŭskultis!

Zhou Fanyi: Ne mi sola. Estas ankaŭ iu alia. (*Iras al la manĝejo.*) Vi eliru!

Zhou Chong timeme eliras el la manĝejo.

Lu Sifeng (*surprizite*): Sinjorido Chong!

Zhou Chong (*maltrankvile*): Sifeng!

Zhou Ping (*malserene*): Frato, mi ne atendis, ke vi estas tiel naiva!

Zhou Chong (*nekomprene*): La patrino vokis min ĉi tien. Mi ja ne scias, kion vi faras.

Zhou Fanyi (*malvarme*): Nun vi komprenas.

Zhou Ping (*malpacience al Fanyi*): Kion vi volas?

Zhou Fanyi (*moke*): Mi venigas vian fraton por ke li adiaŭu vin.

Zhou Ping (*indigne*): Vi malnobla!

Zhou Chong: Frato!

Zhou Ping (*al Zhou Chong*): Pardonon! (*Subite al Fanyi*) Sed en la mondo ne troveblas tia patrino, kia vi!

Zhou Chong (*konfuzite*): Kio estas tio, panjo?

Zhou Fanyi: Vi mem rigardu! (*Al Sifeng*) Sifeng, kien vi volas?

Lu Sifeng (*balbute*): Mi... mi...

Zhou Ping: Ne mensogu! Rekte diru al ili, ke ni kune forveturos.

Zhou Chong (*fine komprenante*): Kio? Sifeng, ĉu vi decidis forveturi kune kun li?

Lu Sifeng: Jes, sinjorido Chong. Mi... mi...

Zhou Chong (*malkontente*): Kial vi ne sciigis min pli frue?

Lu Sifeng: Ne estas tiel, ke mi ne volis sciigi vin. Mi jam petis vin, ke vi ne venu al mi, ĉar mi jam ne estas...

Zhou Ping (*al Sifeng*): Diru al ili, (*montrante al Fanyi*) ke baldaŭ vi edzniĝos al mi.

Zhou Chong (*mirigite*): Sifeng, kiel vi —

Zhou Fanyi (*al Zhou Cong*): Jen vi estas klara!

Zhou Cong mallevas sian kapon.

Zhou Ping (*subite al Fanyi, malame*): vi, malnobla homo! Ĉu vi opinias, ke li faros anstataŭ vi malbonaĵon por disigi nin? Frato Chong, kiun ideon vi havas pri tio? Nu, kion vi volas fari kontraŭ mi? Diru!

Zhou Cong ĵetas rigardon unue al Fanyi, poste al Sifeng kaj mallevas sian kapon.

Zhou Fanyi: Diru! (*Longa paŭzo, malpacience*) Kial vi silentas? Kial vi ne demandas lin? Kial vi ne demandas vian fraton? (*Paŭzo*)

Ĉiuj rigardas Zhou Gong, sed li silentas.

Zhou Fanyi: Diru, Chong! Kio? Ĉu vi estas mutulo aŭ idioto? Ĉu vi neniom plendos en tia situacio?

Zhou Chong (*levas sian kapon, milde kiel ŝafido*): Ne, panjo! (*Rigardas al Sifeng kaj denove klinas sian kapon.*) Se Sifeng volantas, mi ne kontraŭas.

Zhou Ping (*iras antaŭ Zhou Cong*): Fraĉjo!

Zhou Chong (*en dubo pri si mem*): Mi ŝajne subite trovis, ke fakte mi ne amas Sifeng. (*Kun necerteco*) Antaŭe mi faris nur senpripensaĵon. (*Rigardante al la pasia mieno de Zhou Ping*) Frato, vi ŝin kunportu kaj bone traktu!

Zhou Fanyi (*malesperiĝas*): Ho, vi! (*Kun subita indigno*) Vi ne estas mia filo! (*Konfuzite*) Vi havas neniom da vireco! Se mi estus vi, (*montrante Sifeng*) mi do mortigus ŝin, detruus ŝin! Vi neniom similas al mi! Vi ne estas mia filo, ne estas!

Zhou Chong (*malĝoje*): Kio estas al vi, panjo?

Zhou Fanyi (*al Zhou Chong, duonfrenze*): Ne opiniu, ke mi estas via patrino. (*Laŭte*) Ŝi jam mortis antaŭ longe. Ŝi mortis turmentite de via patro, (*Forviŝante siajn larmojn, diras dolore.*) Kiom da jaroj mi pasigis en tiu malbeninda loko, la prizona domo de Zhou. Mi akompanas la damnindan tiranon 18 jarojn. Sed mia koro ne mortis. Via patro naskigis Chong, sed mia koro restas mia propra, ankaŭ mia persono restas la

mia. (*Montrante Zhou Ping*) Li estas la sola, kiu okupis mian korpon, sed nun li forlasas min, ne plu bezonas min.

Zhou Chong (*frakasite*): Panjo, mia plej kara, kio tio estas?

Zhou Ping: Ne atentu ŝin! Ŝi frenezas.

Zhou Fanyi (*furioze*): Tute la samaj vortoj de via patro! Hipokrita kreitaĵo!
Mi ne frenezas. Neniom! Nun vi diru, diru al ili ĉiuj!

Zhou Ping (*embarasite*): Kion mi diru? Pli bone vi iru supren por dormi!

Zhou Fanyi (*rikane*): Ne afektu! Diru al ili, ke mi ne estas via duonpatrino!

Ĉiuj surpriziĝis.

Zhou Chong (*senhelpe*): Panjo!

Zhou Fanyi (*ĉion spite*): Diru al ili. Diru al Sifeng! Diru tuj!

Lu Sifeng (*ne elteneble*): Panjo! (*Sin ĵetas al la sino de Lu Shiping.*)

Zhou Fanyi (*al Zhou Ping*): Memoru, ke estas vi, kiu trompis vian fraton, vian patron kaj min!

Zhou Ping (*al Sifeng*): Ŝin ne atentu! Ni iru!

Zhou Fanyi: Vi ne povas foriri. La pordo estas ŝlosita, kaj mi sendis voki vian patron. Li tuj malsupreniros.

Lu Shiping: Ho, ĉielo!

Zhou Ping: Kion vi volas?

Zhou Fanyi (*malvarme*): Mi volas, ke via patro vidu propraokule sian estontan bofilinon, kaj poste vi foriru. (*Krias.*) Puyuan! Puyuan!

Zhou Chong: Panjo, tion ne faru!

Zhou Ping (*iras al Fanyi*): Frenezulo, ne krii!

Zhou Fanyi kuras al la kabineto kaj krias.

Lu Shiping (*konsternite*): Sifeng, ni eliru!

Zhou Fanyi: Ne, li venas!

Zhou Puyuan eniras de la kabineto, ĉiuj silentiĝas.

Zhou Puyuan (*ĉe la pordo*): Kion vi krias? Kial vi ne dormas?

Zhou Fanyi (*arogante*): Mi petas, ke vi konatiĝu kun viaj boparencoj.

Zhou Puyuan (*surpriziĝas vidante, ke kune estas Shiping kaj Sifeng*): Ho, vi, kion vi faras?

Zhou Fanyi (*tiras Sifeng al Zhou Puyuan*): Jen via bofilino. (*Montrante Zhou Puyuan, diras al Sifeng.*) Nomu lin bopatro! (*Montrante Lu Shiping, diras al Zhou Puyuan.*) Vi konu ankaŭ tiun maljunulinon!

Lu Shiping: Sinjorino!

Zhou Fanyi: Iru ĉi tien, Ping! Adorkliniĝu al ŝi, via bopatrino ĉe la apudesto de via patro!

Zhou Ping (*embarasite*): Patro, mi...

Zhou Puyuan (*komprene*): Kio? (*Al Lu Shiping*) Shiping, finfine vi revenis.

Zhou Fanyi (*mirigite*): Kio?

Lu Shiping (*konsternite*): Ne, ne, vi eraras.

Zhou Puyuan (*malvarme*): Shiping, mi ja antaŭvidis, ke vi revenos.

Lu Shiping: Ne, ne! (Klinas sian kapon.) Ho, ĉielo!

Zhou Fanyi (forte mirigite): Kio? Ai esters Shiping?

Zhou Puyuan (*kun malŝato*): Vi ne demandu min kun malice intenco. Ŝi ja estas patrino de Ping, la homo, kiu laŭdire mortis antaŭ 30 jaroj.

Zhou Fanyi: Ho, ĉielo!

Longa silento, poste rompita de dolora krio de Sifeng. Ŝi fikse rigardas sian patrino, kiu dolore klinas la kapon. Zhou Ping nekomprene rigardas sian patron kaj Lu Shiping. Tiam Zhou Fanyi proksimiĝas al Zhou Chong.

Zhou Puyuan (*korpremate*): Ping, venu ĉi tien! Via propra patrino ne mortis. Ŝi ankoraŭ vivas en la mondo.

Zhou Ping (*duonfrenze*): Ne, ŝi ne povas esti! Patro, tiu ne estas ŝi!

Zhou Puyuan (*severe*): Malsaĝulo! Ne parolu tiajn sensencaĵojn! Ŝi ne estas el bona familio, tamen estas via propra patrino!

Zhou Ping (*kun granda doloro*): Ho, patro!

Zhou Puyuan (*serioze*): Ne hontu, ke vi kaj Sifeng havas la saman patrino. Kaj ne forgesu, ke vi ŝuldas al via patrino vian vivon. (*Al Shiping*) Mi pretis sendi al vi dudek mil juanojn, sed nun vi revenis...

Lu Shiping: Ne, ... Sifeng, ni tuj foriru!

Zhou Puyuan (eksplozante de kolero, diras al Zhou Ping): Genuiĝu, Ping! Rekonu ŝin, via propra patrino!

Lu Sifeng (plene kofuzite): Panjo, tio ne estas vera.

Silentas Lu Shiping.

Zhou Fanyi (*kun bedaŭro diras al Zhou Ping*): Mi ne atendis, ke la afero estas tia, Ping!

Zhou Ping (*al Zhou Puyuan*): Patro! (*Al Lu Shiping*) Patrino!

Lu Sifeng (*Ŝi kaj Zhou Ping rigardas unu al la alia, kaj ŝi subite ne povas sin regi*): Ho, ĉielo! (*Kuras for tra la meza pordo.*)

Zhou Ping falas en la kanapon.

Zhou Fanyi (*maltrankvile vokas*): Sifeng! Sifeng! (*Sin turnas al Zhou Chong.*)
Chong, ŝi aspektas anormale. Vi rapidu rigardi ŝin!

Zhou Chong elkuras tra la meza pordo, kriante: "Sifeng!"

Zhou Puyuan (*iras al Zhou Ping*): Ping, kio okazis?

Zhou Ping (*subite*): Vi ne devis generi min! (*Kuras for tra la manĝejo.*)

De malproksime aŭdiĝas terura aj-krio de Sifeng. Zhou Chong vokas "Sifeng" plenvoĉe kaj tuj poste ankaŭ li terure aj-krias.

Lu Shiping (*krias*): Sifeng! Kio okazis?

Zhou Fanyi (*krias samtempe*): Chong, mia filo!

Lu Shiping kaj Zhou Fanyi elkuras samtempe tra la meza pordo.

Zhou Puyuan (*haste iras al la fenestro, fanken tiras la kurtenon kaj demandas per tremanta voĉo*): Kio? Kio okazis?

Servisto venas kurante tra la meza pordo.

Servisto (*anhelante*): Sinjora moŝto!

Zhou Puyuan: Diru, kio okazis?

Servisto (*balbutas pro teruriĝo*): Sifeng, ŝi... ŝi mortis!

Zhou Puyuan (*urĝe*): Kio al Chong?

Servisto: Ankaŭ li mortis.

Zhou Puyuan (*per tremanta voĉo*): Ho, kio?

Servisto: Sifeng trafis la likantan elektran draton, ne sciante tion, sinjorido
Chong haste tiris ŝin, tial ankaŭ li estas elektrofrapita.

Zhou Puyuan: Tio ne povas esti! Tio ne eblas, ne eblas!

Zhou Puyuan kaj la servisto forkuras.

Zhou Ping kun pala vizaĝo kaj trankvila mieno aperas el la manĝejo. Li iras al la kvadrata tablo, malfermas la tirkeston, prenas la pistolon kaj iras dekstren en la kabineton.

Ekstere aŭdiĝas rumorro, plorego, kriado, tute sen ordo.

Lu Shiping aperas el la meza pordo, sekvate de maljuna servisto kun poŝlampo en la mano.

Lu Shiping mute staras en la mezo de la scenejo.

Maljuna servisto (*konsolante*): Sinjorino, vi ne stuporu! Tio estas danĝera. Vi devas ploregi. Havu sufiĉan ploregon!

Lu Shiping (*ŝtoniĝante*): Hm.

Maljuna servisto: Tio jam estas ne riparebla, kaj vi devas ploregi.

Lu Shiping: Ne, ne, mi... (*ŝtoniĝas.*)

Large malfermiĝas la meza pordo. Aperas Zhou Fanyi ĉirkaŭita de multaj servistoj. Oni malfacile povas konstati, ĉu ŝi ploras aŭ ridas.

Servisto (*malantaŭ ŝi, ekster la pordo*): Eniru, sinjorino! Ne plu rigardu!

Zhou Fanyi atingas la mezan pordon, sekvate de aliaj.

Zhou Fanyi (*lamente*): Chong, ho, mia filo. Kial vi malfermas la buŝon? Kial vi ridas al mi? Ho, mia filo, stultulo!

Zhou Puyuan eniras tra la meza pordo.

Zhou Puyuan: Fanyi, eniru! Miaj manoj sensentiĝas. Vi ne plu rigardu!

Maljuna servisto: Via sinjorina moŝto, eniru! Ili jam estas karbigitaj kaj ne saveblaj.

Zhou Fanyi (*eniras en plorado*): Chong, ho, mia filo! Vi estis viva antaŭ

momento. Kiel vi povas morti? Kial vi mortis tiel malfeliĉe?

Zhou Puyuan: Estu kvieta! (Viŝas siajn darmojn.)

Zhou Fanyi (*kun malamo*): Chong, mia filo. Vi devas morti. Vi devas morti. Havante tian patriron, kia mi, vi devas morti!

De ekstere aŭdiĝas rumoro.

Zhou Puyuan: Kiu tiel bruas?

Foriras la maljuna servisto, kaj aperas alia servisto.

Zhou Puyuan: Kio okazis ekstere?

Servisto : Venus Lu Dahai, kiu estis ĉi tie en la mateno. Li venis denove kaj diris, ke lia patrino estas ĉi tie.

Zhou Puyuan (*post momenta hezito, ĵetas rigardon al Lu Shiping*): Bone, enlasu lin!

Lu Shiping: Ne necese! (*Stariĝas kaj iras al la meza pordo. Tie ŝi sin turnas al Zhou Puyuan.*) Li ne eniros. Li malamas vin. (*Eliras kun levita kapo.*)

Foraras ĉiuj servistoj. En la ĉambro restas nur Zhou Puyuan kaj Zhou Fanyi.

Regas silento.

Zhou Puyuan (*subite*): Kie estas Ping? Ping! Ping! (*Ne aŭdeblas respondo.*) He, venu! (*Sen respondo*) Venu kaj serĉu lin por mi!

Aŭdiĝas pafo en la kabineto. Tomba silento en la ĉambro.

Zhou Fanyi (*subite*): Aĥ! (*Kuras en la kabineton. Zhou Puyuan senmove staras. Zhou Fanyi elkuras kriegante*) Li, li...

Zhou Puyuan: Li, li...

Zhou Puyuan kaj Zhou Fanyi kune kuras en la kabineton.

(Fino) 1933